## Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)

### Estraranoj kaj komitatanoj de ISAE

Prezidanto *Prof. Dr. Rüdiger SACHS* *<ISAESachs@aol.com>*
*Vor dem Brückentor 3, DE-37269 Eschwege*

Vicprezidanto *Prof. Dr. Ottó HASZPRA* *<haot@freemail.hu>*
*Húr u. 9A. III.lph.1/3, HU-1223 Budapest*

Ĝenerala Sekretario *Dr. José-Antonio VERGARA* *<joseantonio.vergara@gmail.com>*
*Casilla 508, CL-Puerto Montt*

Estrarano *Prof. Dr. Heiner EICHNER* *<heiner.eichner@univie.ac.at>*
*Lueger-Ring 1, AT-1010 Wien*

Komitatano *S-ro Jacques JOGUIN* *<jjoguin.esperanto@m6net.fr>*
*5, Impasse du repos, FR-38100 Grenoble*

Komitatano *D-rino Nina Korjenevskaja-Gouriou* *<nina.gouriou@wanadoo.fr>*
*Bat.C, L'Espiguette, Rue de Verdun, FR-13140 Miramas*

Komitatano A *de ISAE ĉe UEA* *D-ro José Antonio VERGARA* (poŝta kaj reta adreso vd. sub «Ĝenerala Sekretario»)

Honora membro de ISAE *D-ro Josef Kavka, Lužná 7 - Vokovice, CZ-160 00 Praha 6*

Honora mambro de ISAE *S-ro Rob Moerbeek, Zwaansmeerstr.48, NL-1946 AE Beverwijk*

Kasrevizoro *Inĝ. Peter HAUSER* *<Ercmontara.EC@t-online.de*
*Pf. 401243, DE-63277 Dreieich*

Kasrevizorino *S-ino Jutta BUSS* *<BussJutta@aol.com>*
*Sossenheimer Weg 53, DE-65824 Schwalbach*

### Landaj Delegitoj de ISAE

Bosnio-Hercegovino *Dr. Ljubiša PRERADOVIĆ* *<ljubopr@inecco.net>*
*Braœe Pantiœ 7, 78000 – Banja Luka*

Bulgario *Prof. Božidar LEONOV* *<leonov@rozabg,com>*
*p.k. 44, BG – 4300 – Karlovo*

Ĉeĥio *S-ro Marek BLAHUŠ* *<marek@blahus.cz>*
*Rudy Kubicka 1002, CZ-68605 Uherske Hradiste*

Ĉilio *Dr. José Antonio VERGARA* *<joseav@llanchipal.cl>*
*Casilla 508, CL - Puerto Montt*

Danlando *S-ro Jan NIEMANN* *<niemann@kabelmail.dk>*
*Hovedvagtstrade 9 E1, DK – 3000 Helsingør*

Germanio *S-ino Jutta BUSS, adreso vd. supre*

Hungario *S-ro SZILVÁSI László* *<szilvasi@eszperanto.hu>*
*Pk. 87, HU – 1675 Budapest*

Japanio *S-ro NOMRA Tadacuna* *<nomra@helen.ocn.ne.jp>*
*Sakae-maĉi 248-1, Uto-ŝi, JP – Kumamoto-ken 869-0453*

Kanado *Prof. Stevens T. NORVELL jr.* *<stevens.norvell@dal.ca>*
*2, Windermere Rd., NS Halifax CA, B3M 1N9*

Rumanio *D-rino Maria BUTAN*
*Aleea Ripensia 34, apt. 3, RO – 1900 Timişoara*

**Responsa eldonanto de Scienca Revuo:** *R. Sachs (DE) – sa*

**Ĉefredaktoro de tiu ĉi SR-kajero:** *J. Kavka (CZ) – ka*


Adreslisto laŭ kotizoj ricevitaj antaŭ ekspedo. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la koncernaj aŭtoroj. Ili ankaŭ respondecas pri formo kaj formato, se ili mem kompostis.

*Scienca Revuo* Vol. 60 (2009) (1) / n-ro 216 p. 1

# Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature kaj terminologie

(kontribue al La Nova PIV)

*Josef KAVKA*

## Enhavo


| | | Paĝo |
|---|---|---|
| | Prefaco | 2 |
| 1. | A, E, I, O, U | 3 |
| 2. | AD | 7 |
| 3. | AN, ON | 11 |
| 4. | AR, ER | 15 |
| 5. | AT, IT, OT | 19 |
| 6. | ED, (ET), EG | 28 |
| 7. | EN, IN | 31 |
| 8. | IK | 35 |
| 9. | IL | 40 |
| 10. | IS, ID | 44 |
| 11. | IV | 47 |
| 12. | KS | 49 |
| 13. | OL, UL | 54 |
| 14. | OR | 56 |
| 15. | PUS | 60 |
| 16. | UM | 61 |
| 17. | US | 64 |
| | Bibliografio | 69 |
| | Dankesprimo | |

## Prefaco

En 1996, *KAVA-PECH* eldonis kajeron KONTRIBUE AL PIV, kiu temis pri **homonimoj** en Esperanto, konsiderataj nomenklature. En 10 ĉapitroj, aranĝitaj laŭ diversaj radikfinoj, mi atentigis pri ties homonima koincido kun Esperanto sufiks(oid)oj.

Homonimeco estas lingva okazo, kiam vorto servas por esprimi pluron da nocioj, foje iom parencaj (tiam oni nomas la fenomenon **polisemio**), foje tre distancaj. Ekzemplo de polisemia homonimo povas esti **lukso** kiel ekstera komforto aŭ aliflanke kiel unuo de lumiga intenso.

Ĉiaspeca homonimeco estas ĝena por terminologioj kaj nomenklaturoj. Bedaŭre, neniu lingvo kapablas eviti ĝin. Tiom malpli sukcesas ĉi-kampe la planlingvo Esperanto, kies afiksa sistemo evidente kunportas pli oftan koincidon de vortoj etimologie kaj morfologie diverĝaj, sed fakte samformaj (ekz. laŭ-tema, laŭt-ema).

La nun prezentata traktaĵo estas iom relaborita kaj plivastigita versio de tiu el 1996. Ĝi akompanu la dume aperintan LA NOVA PLENA ILUSTRITA VORTARO (NPIV, 2002), kontraŭ kies multnombraj misoj reagas mia SCIENCA VORTARO DE ESPERANTO (SVE, 2003), aranĝita laŭalfabete kaj eldonita fare de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE).

La ĉefa celo de ambaŭ miaj verketoj estas averti nomenklaturajn vortaristojn antaŭ misformado de internacie kodigitaj nomoj. Tia misformado estas plej ofte motivata por eviti eventualan homonimecon. Ĉi-loke sufiĉu unusola ekzemplo: la konifernomo *Taxus* ne misformiĝu en Esperanto al "taksuso" (PIV, NPIV) por eviti homonimecon kun la fundamenta radiko **taks/** , sed nepre fariĝu **takso**, kohera kun la famili-nomo **taksacoj** (*Taxaceae*), kun la veneno **taksolo** k.t.p.

La kondamninda klopodo, ĉiuokaze evitadi homonimecon en Esperanto, kaŭzas nepardoneblan perturbon en la internacie establitaj sistemoj de nomenklaturo kaj terminologio, ĉu biologia, geografia, ĥemia, medicina, mineralogia, pterologia, ĉu aliscienca. Tia malkohera perturbado estus tragedia por Esperanto, kiu ambicias modele funkcii kiel internacia planlingvo.



### 1. A, E, I, O, U

La unua konsidero tuŝu jenan problemon: Se ekzemple *A* estas **ne** radikparto, sed substantiva finaĵo latina, ĝi apenaŭ povas konsistigi radikfinon de Eo-vorto. Ekz. en *flamma* malkaŝas forfalon de tiu *A* la plurala dativo *flammis*. Nature, la **fundamenta** vorto estas **flamo**, ne "flamao". Same oni devas procedi okaze de ĉiu latindevena nomenklatura analogo.

Bedaŭre ekzistas alia fundamentaĵo, la serpent-nomo boao. Spite al la dusilabeco de la nomo en etnolingvoj, t.e. *boa*, Esperanto havas nomon trisilaban, iom kurioze kun la osceda vokaltriopo…

Aliflanke **kakao** ne koncernas nian problemon: la hispana lingvo adoptis ĉi tiun indiĝenaĵon, kiu do havas nenion komunan kun la latino. Da ceteraj nomoj eblas prave ataki multon:

"alkao" en NPIV referencas al "aŭko", sed ambaŭ formoj estas misaj. *Alca* devus fariĝi **alco**, *Alcidae* **alcedoj** (kp. ankaŭ la italan: *alca*);

"arao" esperantiĝu **aro** malgraŭ la fakto, ke oni kreus homonimecon de la papagogenro *Ara* kun la plantogenro *Arum*;

"damao" el la cervedoj, nomenklature *Dama*, latine *damma*, devus fariĝi **damo**, sendanĝere homonima kun nobla sinjorino;

"firmao" = firmo 2 laŭ NPIV; malfacile mi komprenas, kial oni devas apliki paroniman radikon al la komerca entrepreno, la fundamenta **firmo** (la germana pluralo estas *Firmen*, do tiu *A* ne apartenas al la radiko, same la itala kaj portugala pluraloj: *firme*).

"Ganao" = **Gano**; la nomo ne originas en la lingvo latina, tamen mi ne preterlasu la okazon por pruvi, ke en eŭropaj lingvoj tiu fina *A* forfalas en derivaĵoj *ghanský, Ghanian, Ghanéen*; la problemon solvis ankaŭ PM (1971), sekve pri radikfinaj vokaloj traktis d-ro *Pumpr* kaj mi (1972);

"Gazao" = **Gazo**;

"Iovao" = **Iovo**;

"gutao" = **gut(t)o**;

"jukao" = **juk(k)o**; oni ne timu, ke la sandominga planto kaŭzus jukadon; cetere, la speci-epiteto *yuccodes* = jukeca, ne "jukaeca";

"kalao" (*Calla*) el la aracoj (*Araceae*), laŭ NPIV "arumacoj", estas nomenda simple **kalo**; analoge al jukko oni povus skribi kallo, kies prononco estus same (mal)facila kiel de la vorto mallarĝa;

"kalandrao" = **kalandro**; ne minacas konfuzo de la koleoptero kun la birdo melanokorifo kalandra;

"kamerao" (*camera*) liveras tute superfluan, nepre evitindan paronimon al la fundamenta **kamero**, kiu laŭ PIV – sed ne NPIV – povas signifi ankaŭ kinokameron, kies itala pluralo estas *càmere*;

"kanao" el "kanaacaoj" estu **kan(n)o** el **kan(n)acoj** (*Canna, Cannaceae*);

"karao" devas esti ĥaro (*Chara*), ĉar la gluo de A al la originala radiko prezentas apenaŭ kompreneblan timon antaŭ la homonimeco kun la fundamenta radiko **kar/** ; same la NPIVa "kara-ficoj" por la algoklaso *Charophyceae* estas kondamninda perturbo de la nomenklaturo;

"kavao" taŭgas por nomi nek *Piper methysticum*, nek la el ĝi pretigatan narkotan trinkaĵon *kawa-kawa*, kiu meritus esperantiĝi pli eble **kavakavo**;

"kolerao", jen vera monstro, kiu eĉ en la Ĥ-alergia NPIV referencas al la fundamentaĵo **ĥolero**;

"kolao" klopodas eviti koincidon kun la fundamenta **kolo**, kiu sendanĝere povas servi ankaŭ por la tropikaj specioj de *Cola*;

"komao" certe devas esti la fundamenta **komo**, kun la 3-a, la muzika senco;

"limao": se oni ne timas konfuzon de la ĉefurbo Limo kun ajna limo, kial oni timu okaze de la moluskogenro **limo** (*Lima*)?

"majao" = **majo**;

"molao" = **molo** (*Mola*) el la moledoj (*Molidae*), la rondkorpaj fiŝoj;

"nepao" = **nepo** (*Nepa*), kohere kun nepedoj (*Nepidae*): oni ne timu, ke la hemiptera insekto "akvoskorpio" konfuziĝus kun "prafilo";

"novao": En la seslingva *Astronomical Dictionary* (1961) ni legas, ke la pluralo estas *novae*, laŭ la formo latina; en multaj lingvoj la radiko estas nov/ : itale *stella nuova*, plurale *stelle nuove*, do ankaŭ en Eo estu **novo** aŭ **nova stelo** (germane *Neuer Stern*);

"pinao", la moluskogenro *Pinna*, povas nomiĝi **pin(n)o**;

"poao" kaj "poaacoj" estas nomenklatura misformaĵo por poo (*Poa*), registrita ankaŭ en EB (1988); memkomprene la familio devas esti **poacoj** (*Poaceae*), la ordo **poaloj** (*Poales*);

"Portvilao", la ĉefurbo de Vanuato, estu simple **Vilo**;

"purpurao" alportas superfluan paronimon al la fundamenta **purpuro** (laŭ la 3-a senco en PIV, tamen ne NPIV), bone kohera ekz. kun la botanikaj speciepitetoj *purpuratus, purpureus* k.a., kun **purpurino**, kun la franca *Pourpre de Cassius*, k.t.p.;

"raĵao" = **raĵo**, kohera kun Raĵastano (NPIVe "Raĝastano", ortografie apenaŭ internacia);

"reao" (*Rhea*), la strutsimila birdo, devus fariĝi **reo**, homonima kun la planto (*Rheum*, NPIVe "reumo"), tamen tute sendanĝere; krome, la troa oscedeco de "reao" memorigas pri tiu de "boao" = **boo**;

"Sanao" = **Sano**, la ĉefurbo de Jemeno;

"senao" (*senna, folia sennae*) fariĝu **seno**; la kompleta nomo estas **kasio sena** (*Cassia senna*); temas pri tropika planto, enhavanta glikozidecajn **senozidojn** (ne "senaozidojn" kun efiko laksetiga; konfuzoj kun la



prepozicio **sen**, la substantivo **seno**, adjektivo **sena**, verbo **sen(ig)i**, apenaŭ okazus; se tamen, Akademio de Esperanto povus perspektive pripensi bone motivitan duobligon de konsonantoj: **kasio senna** (laŭ la precedentaj finna, vatto, villo k.a.).

"supernovao", vd. la pli supran "novao".

"tifao" de EB (1988), mankanta en PIV, fariĝis en NPIV "tifeo": nomenklature devus esti **tifo** (*Typha*), kvankam homonima kun la infekta malsano (latine *typhus*, greke *tyfos*); la familio *Typhaceae* estu tifacoj (nek "tifaacoj", nek "tifeacoj").

**Tongo** subite aperas en NPIV kvazaŭ anĝelo; pravege oni forigis la finvokalon A, spite al la indiĝena originalo *Tonga*. Jen kiel malkonsekvence redaktita estas la vortarego: "Ganao, Gazao, Iovao, Sanao" jes – sed "Tongao" ne.

"verugao", hispane *verruga* el la latina *verruca*, orginie signifis ajnan verukon; do, por nomi la haŭtmalsanon endemian en Sudameriko nepre sufiĉas la hispaneska **verugo**.

"vilao" (*villa*); NPIV referencas al la zamenhofa **villo**: jen denove inspiro por Akademio de Esperanto koncerne eventualan duobligon de konsonantoj.

"Voltao" por la fizikisto kaj la rivero en Burkino (ne "Voltalando") fariĝu **Volto**, kohere kun **volto**, la unuo de elektra tensio.

Resume oni povas konkludi, ke la senpripense homonim-fobia enkondukado de –A-vortoj draste perturbas la nomenklaturajn sistemojn. Se ekzemple *Betulo* fundamentiĝis kiel **betulo**, kial ekz. *Yucca* fariĝu "jukao"?

Nun sekvu la NPIVa aperado de -E-vortoj, nome tiuj, kies radikfinon malprave konsistigas E.

Tiaspecan vorton oni vane serĉus inter la **fundamentaĵoj**. Ne apartenas tien ĉi ekz. hordeo (*Hordeum*), kazeo (*caseum*), oleo (*oleum*), piceo (*Picea*), tineo (*Tinea*) k.t.p., ĉar iliaj E konsistigas la latinajn, do ankaŭ la esperantlingvajn radikojn.

Sed:

"akneo" estas laŭ NPIV distingenda de la fundamenta **akno**: tamen, laŭ mia scio, la moderna medicino uzas la laste nomitan terminon ankaŭ por diversaj haŭtmalsanoj; la latina *acnitis* = **aknitido** (nepre ne "akneito" laŭ NPIV).

"akreo" (*ager*) devas esti la zamenhofa **akro**: NPIV registras jene: akro$^{Z}$ = akreo; kial? Nu jes, pro la timo antaŭ homonimo kun la fundamenta adjektivo **akra**...

"baloteo" (*Ballota* el lamiacoj) = **baloto**; denove la fobio kondukis al misformi la latinan originalon.

"bovisteo" (*Bovista*) estas neakceptebla misformo de **bovisto**; estus ridinde konfuzi bovpaŝtiston kun la manĝebla fungo…

"cefaleo" estas superflua termino por **cefalalgio** (kapdoloro); la fina E ja forfalas en ceteraj derivaĵoj: cefalino, cefalometro, cefalopodo, cefalotomio k.t.p.

"diatomeoj" por *Bacillariophyta*? NPIV forgesis registri la primaran genronomon **diatomo** (*Diatoma*), kohere kun la organogena sedimento **diatomito**; tre kurioze aspektas la NPIVa termino "diatomea tero".

"gramineoj" estas eksmoda termino por la ordo **poaloj** (*Poales*).

"karpeo" en NPIV referencas al **karpo** 2: temas do pri misformita paronimo, tute superflua.

"Krimeo" = **Krimo** (*cs: Krym, de: Krim, po+ru: Krym*).

"lupeo" (*la: lupa*); la fundamenta **lupo** devus alpreni la 3-an sencon, nome tiun de konveksa lenso, semantike kohera kun "lupino".

"nereo" en NPIV prave referencas al **nereido**, korektante la malvastigitan vortformon el PIV.

"patroneo" el la fako teksindustria estas superflua por **patrono** laŭ lingvoj etnaj: *es: patrona, fr: patron*, k.t.p. Se ĉiu fako procedus analoge al la teksindustria, la leksiko de Esperanto fariĝus kolekto de "balastaj, eĉ molestaj" paronimoj; ekz. ĉu geologio lanĉu la terminon "sedimenteo" por distingi la rokaĵon sedimentan disde sedimento ĝeneralsenca: kafa, sanga, urina…?

"peroneo" eĉ laŭ NPIV estas evitinda por fibulo.

"satureo" (*Satureja*) ne alprenis E, sed ellasis J; devas esti **saturejo**, sen timi la homoniman koincidon kun la fundamenta sufikso –ejo; *saturejaefolius* = saturejofolia.

"tifeo" vd. pli supre: "tifao".

Preskaŭ neglektindaj estas okazoj de radik-plivastigo per I. Da nomoj kun la radikfina I estas vera inundo, sed tiu I plene pravas.

El la fundamentaĵoj mi menciu almenaŭ du animalojn: *Ciconia* = **cikonio**, simia = simio, kaj du vegetaĵojn: *Lilium* = lilio, *Vaccinium* = **vakcinio**. La latinaj originaloj estas do laŭnature esperantigitaj. Tamen, riproĉindaj estas jenaj NPIVaĵoj: "adulario" = **adularo** (*cs. adulár, de: Adular, fr: adulaire*), "okulario" devas esti **okularo** (*cs; okulár, de: Okular, fr: oculaire*), apenaŭ konfuzebla lenso kun aro da okuloj…

"sajmirio" = **saimiro** (*Saimiri*), la simieto amerika.

Ĉi-loke revenu la demando, laŭ kiu enigma regulo NPIV traktis la problemon de la radikfina vokalo. Ekz. la japana *tsunami* fariĝis **cunamo**, ne "cunamio". Kial?

Ankaŭ –O-vortoj riproĉindaj raras:



"soloo" referencas en NPIV al **solo** 2, la koloida pseŭdosolvaĵo.

"tiroo", jen kurioza mallongigo de tiroido en "kunmetaĵoj": ja la en NPIV registritaj terminoj tirogenea kaj tirotropa ne estas kunmetaĵoj.

Inter la –U-vortoj, la koncerna "rikolto" jenas:

"cirkuo" (*Circus*) = **circo** el la subfamilio circenoj (*Circinae*).

"emuo" referencas al dromiceo.

"jabiruo" (*Jabiru*), la tropika birdo el la ordo cikoniformaj estu **jabiro**.

"kaĉuo" kaj "kateĉuo" = **kateĥo** ankaŭ por akacio kateĥa.

"koenduo (*Coendu*), la sudamerika mamulo, = **koendo**..

"Kŭanĵuo" = **Kvanĵo**.

"marabuo" havas la sciencan nomon: **lepropilo**, la granda birdo el la ordo cikoniformaj.

"nanduo" referencas al "reao", pli ĝuste **reo** (vd. pli supre).

"paruo" (*Parus*) meritus la sciencan nomon **paro** el la familio *Paridae* = paredoj.

"puduo" (*Pudu*) = **pudo**, ne nur por la rusa pezunuo, sed homonime ankaŭ por la parhufulo.

"tukuo" havas la sciencan nomon **ktenomiedo**, la sudamerika ronĝulo.

"Vanuatuo" = **Vanuato**.

Ne apartenas ĉi tien noktuo (*noctua*), kies U konsistigas la radikfinon.

## 2. AD

Jen la fundamenta sufikso, esprimanta agon kaj daŭron. Aliflanke ekzistas vortoj, kie -AD- estas konsistiga parto radikfina; tio ja povas kunporti homonimecon.

En la leksiko **fundamenta** troviĝas **limonado**, kiu apenaŭ kapablas generi homonimecon kun limon-ado. Nu, el la neoficiala limono (*Citrus limon*) tamen eblus derivi transitivan verbon limoni, analoge al sali, sukeri k.s. Do, limon-ado estus aldonado de limono en trinkaĵon kaj fari el ĝi limonad-on… Alia ekzemplo estas **parado**, sed NPIV ne konas transitivan verbon: pari, sole la faktitivan parigi.

Tamen, la leksiko **nefundamenta** liveras da tiaspecaj okazoj multon:

**Arkado**, laŭ NPIV oficiala, eĉ kun referenco al citaĵo zamenhofa, povas interpretiĝi ankaŭ kiel ark/ado, ĉar jes ekzistas la fundamenta ark/o… "Danĝeron" de homonimeco ĝi alportas apenaŭ: ĉu ekzistas verbo arki, analoge al linii, punkti k.t.p.? NPIV registras sole la faktitivon arkigi. Tamen oni pripensu, ke la latina verbo *arquare* kaj la franca *arquer* signifas: kurbigi arkforme, nepre do, por Esperanto restas aperta problemeto: ĉu arki, ĉu arkigi?

**Asklepiado**, same zamenhofa laŭ NPIV, estas botanika genronomo el la familio de la asklepiadacoj (*Asclepias, Asclepiadaceae*). Pluraj specioj liveras fibromaterialon, do oni nomas ilin "silkoplantoj". Aliflanke Asklepio: helena dio de medicino;

**Aviado**, la oficiala radiko, igas cerbumi, ĉu ne sufiĉus la radiko avi/o, kiu laŭ NPIV estas sinonimo de aviad/ilo. Nu, avio povus signifi aerveturilon, avi/ado la teĥnikon de aerveturado; sekve la pezmova termino "aviadilo" fariĝus superflua...

**Balado**, same oficiala, akompaniĝas de la fundamenta balo kaj konjektigas pri eventuala verbo bali, neregistrita fare de NPIV, dum ekzistas la latina *ballare* kaj la franca *baller*; oficiala estas aparta (ĉu superflua?) radiko balet/o, el kiu deriviĝas ekz. baletistino. Tute parenteza interesaĵo: la oficialigantoj ne rifuĝis al misformi per ED (kp. la koncernan ĉapitron) laŭ la precedentoj bankedo, bufedo k.a.

**Barbado** memorigas pri la fundamenta **barbo**, kiu tute bone povus alpreni la homonimecon kun la barb(fiŝ)o (*Barbus*), dum kiel nepra misformo restu la NPIVa "barbio" (kp. la unuan ĉapitron). Sed denove: ĉu estas pensebla la verbo barbi? Ja la latina *barbatus*, franca *barbé*, hispana *barbudo* kaj itala *barbuto* supozigus tion: ja temas pri participoj pasivaj...

**Blokado** estas jam oficiala kiel bloko, sed NPIV prave registras: blokad/o = blok/ado. Do, oni "rajtas" kritiki oficialan vorton: ne ĉiam nia Akademio funde pripensis la Esperanto-leksikon;

**Brigado** ree oficiala, kunekzistas apud la neoficiala brigo, sinonima al brigantino, ne temas pri la brigskuno. Hipoteze pri eventuala verbo brigi oni argumentu per la italaj *brigare* kaj *brigata*;

**Cikado**, ree oficiala, estu ĉi tie tuŝita ne tial, ke akompanus ĝin iu "ciko", sed tial, ke la NPIVa "cikaso" kaj "cikasacoj" oni konsideru misformaj. La latinaj *Cycas* kaj *Cycadaceae* devas esperantiĝi cikado kaj cikadacoj, malgraŭ la homonimeco kun la hemiptera genro cikado el cikadedoj;

**Cikladoj**, la insularo en Egea maro, lingve apudas al la oficiala ciklo, en kies NPIVa kapvorto mankas eventuala verbo cikli, dum jes troviĝas tie la faktitivoj cikligi kaj recikligi. Tramen, la angla participo *recycled* pledus por cikli, laŭ la modeloj punkti, linii, arki k.s.

**Dekado**, laŭ NPIV zamenhofaĵo signifanta tagdekon, montras al la fundamenta numeralo dek. La latinaj verboj *decimare* kaj *decumare*, en Esperanto pli eble respondas al dekumi ol al "deki";

**Enado** por specio de kolombo (*Columba oenas*, NPIVe "nas", eble pro tajperaro) estas homonima kun en/ado, t.e. enestado;

**Estrado**, oficiala, eĉ zamenhofa laŭ NPIV, por la signifo de podio estas homonima kaj sinonima kun la fundamenta estr/ado;

**Farado**, la fizika unuo, sendanĝere homonimas kun la fundamenta far/ado;



**Folado** por la marmolusko *Pholas*, akompaniĝas de la neoficialaĵo fola = frenezeta;

**Granado**, la urbo en Andaluzio, homonime koheras kun la zamenhofa grano, la pezunuo; etimologio de la urbo originas en la latina *granum* = grajno; fine, la participo *granatus* povas konjektigi pri la verbo *granare* = grani; fakte, Granado, konstruita sur kvar altaĵoj, memorigas pri aranĝo de grajnetoj-semoj en la frukto de granato (*Punica granatum*). Etimologio ja estas rava scienco...

**Grenado**, la insularo en Malgrandaj Antiloj, tute analoge homonimas kun la fundamenta gren/ado, sed jen la hispana nomo: La Granada!

**Hagado** restu sen komento, ĉar Hago apenaŭ generus verbon;

**Iliado** akompaniĝas de la pronomo ili kaj de la osto ilio; tamen, verbigo de ambaŭ estas neverŝajna;

**Kanado**, la ŝtatnomo, devenas el la hurona lingvo: *kanata* = kabanaro; kano estas fundamentaĵo por esprimi pluron da nocioj botanik-originaj, sed laŭ nia ĉapitro unua ĝi povus signifi ankaŭ kan(n)on (*Canna*) kaj fine – laŭ nia ĉapitro pri IS – same la genronomon zoologian (*Canis*). Jen vera plejado da signifoj! La ĝenan homonimecon NPIV "solvas" per la misformoj "kanao" kaj "kaniso" respektive;

**Karbonado**, la zamenhofa vorto, havas tri signifojn: du kulinarajn, unu mineralogian, dum la oficialan karbonon ne akompanas verbo registrita fare de NPIV; aliflanke karbonato aspektas participe; finfine oni konsideru la francan *charbonner* kaj la hispanan *carbonear*;

**Kaskado**, la zamenhofaĵo ne timis la fundamentan kaskon; ja la vorton ne akompanas verbo kaski, sed ree atentindas la franca *casqué* = kaskita;..

**Kolorado** kaj koloro: la hispana *colorado* havas du signifojn: kolorita kaj ruĝkolora;

**Monado**, la zamenhofaĵo, akompaniĝas de la fundamenta mono, kiu restas sen eventuala verbo moni, sed la angla, participe aspektanta *moneyed* = monhava, kaj fine ankaŭ la franca verbo *monnayer* estas transitiva;

**Najado**, la nimfo, najo la serpento...

**Nevado**: la hispana *nevada* = neĝado, dum la rivero Nevo havas alian etimologion: la ugrofinna *neva* signifas marĉon; fine, la fundamenta nevo, france *neveu*, iel kondukas al la latina *nepos* = nepo!

**Nomado**, jen klasika oficialaĵo, kiu ne timas la fundamentan nom/adon; bela ekzemplo, ke homonimojn oni ne timu, eĉ ne "solvu" la problemon per misformado! Ja estas necese agnoski, ke nur en kunteksto akiras sian veran signifon-funkcion ajna vorto. Misformi nomadon ekz. per "nomadeo" laŭ la recepto, antaŭ kiu ni insiste avertis en la ĉapitro unua, signifus perturbi internacian sciencan leksikon pro emocia homonimofobio...

**Olimpiado** akompaniĝas de la zamenhofa Olimpio kaj Olimpo;

**Orkadoj**, la insularo norde de Skotlando, estas akompanataj de Orko, la dio de infero, kaj orko, la specia nomo por la cetaco *Orcinus orca*;

**Oreado**, la montara nimfo, ore/ado, ellasado de organisma likvo;

**Pilado**, laŭ NPIV zamenhofa, estas helena nomo, dum la oficiala pilo devenas de la latina *pila*, al kiu jes apartenas la verbo *pilare*;

**Plejado** kaj **plejado** kun pluro da signifoj akompaniĝas de plej/ado, kvankam ĉe la fundamentaĵo plej, NPIV ne registras eventualan verbon pleji;

**Pomado**, la oficialaĵo, pomo, la fundamentaĵo, sed apenaŭ ekzistas eventuala verbo pomi, kvankam la franca lingvo posedas la netransitivan *pommer*;

**pulado**, zamenhofa laŭ NPIV: 1 = rul/ado 2, 2 = rulaĵo 2 kaj 3; el tio sekvas, ke nian Majstron ne ĝenis koincido inter rulad/o kaj rul/ado;

**Saŭdado** kaj Saudo? Evidente, la diakrita signo super U malhelpas homonimecon kun "Saud/ado";

**Serenado** estas same oficiala kiel la adjektiva serena, do seren/ado ne ĝenis dum la oficialigo;

**sporada** estas zamenhofa laŭ NPIV, sed la fungoj ne ŝparas pri sporoj, do ili emas "malspor/ad-i"...

**Tiberiado**, la israela urbo, Tiberio la dua romia imperiestro, krome ankaŭ la rivero trafluanta Romon; ĉu do Tiberi/ado povus esti la tempo, dum kiu regadis la imperiestro?

**Tirado** estas elvokiva pri tir/ado, samkiel

**tornado** pri torn/ado, ambaŭ verboj fundamentaj;

**Triado** memkomprene koneksas kun la fundamenta numeralo, sen ĝeni iun ajn pro tri/ado;

**Troado** = Trojio laŭ NPIV, sed eblas, konforme al la fundamenta partikulo, konsideri ankaŭ la verban substantivon tro/ado;

**Vanado** estas la ĥemia elemento, sed NPIV ne registras sub la fundamentaĵo vana eventualan verbon vani, kvankam ĝi jes povas ekzisti laŭ la fundamentaj ekzemploj por senpera verbigo de adjektivoj: kuraĝi, sani k.a. La belan citaĵon el *Zamenhof* "vana kaptado de nekapteblaj sunaj radioj" oni povus apliki al van/ado = vana estado;

**Venado**, laŭ NPIV sudamerika mamulo, koneksas kun ven/ado:

Nu, post la pritrakto de pli ol 40 ekzemploj, ni povas ĝoje konstati, ke ne okazis provo misformi vorton kun radikfina AD pro timo antaŭ homonimeco kun vorto enhavanta sufiksan AD. Tiom pli bedaŭrindaj estas la pli ol 60 ekzemploj de senmotiva misformado, prezentitaj en nia ĉapitro unua. Ĉu ĝuste Esperanto procedu tiom malplanlingve?



### 3. AN, ON

La radikfinaj -AN- kaj -ON- evidentiĝas "preskaŭ sendanĝeraj", kiel atestas la leksiko **fundamenta**, kiom temas pri homonimeco kun la paralelaĵoj sufiksaj:

**Ĉikano**. Ja ĉiko estas tropika afaniptero, pli moderne sifonaptero (*Siphonaptera*), t.n. "sablopulo".

**Fazano**, science faziano. Fazo, la plurfaka termino.

**Fontano** ne ĝenis nian Majstron pro malprobabla koincido kun font-ano.

**Korano**, jen interesa hazardo kun kor-ano...

**Mangano** koincidas kun mango...

**Membrano**; membr-ano liverus pleonasmon, ĉar ano kaj membro povas sinonimi.

**Turbano**, turb-ano, sen komento.

Resume: Kiam aperis koincido de -AN- radikfina kun sufiksa, *Zamenhof* ne timis ĝin.

Da **nefundamentaj** nomoj ĉi-koncernaj mi kalkulis preskaŭ centon, sed oni kontentiĝu pri jenaj:

**Albano** (albo = pastra vesto).

**Altano**, alt-ano, sen komento.

**Alkano** (alko = fundamenta nomo por *Alces* el cervedoj).

**Amano**, am-ano, sen komento.

**Argano**, la borsonda turo homonimas kun loĝanto de la peloponeza ĉefurbo.

**Arĝentano** nur similas arĝenton, sed koincidas kun arĝent-ano.

**Arkano**, ark-ano, sen komento.

**Atmano** de NPIV referencas al atmo...

**Avano**, av-ano, sen komento.

**Banano**, ban-ano, sen komento.

**Bramano**, bramo = fundamenta nomo por la fiŝo *Abramis brama*; krome termino marista.

**Bukano**, buk-ano, sen komento.

**Butano**, la hidrokarbono, buti = termino terkultura.

**Ciano**, ci-ano?

**Ciklano**, cikl-ano...

**Dekano**, dek-ano...

**Dogano**, dog-ano?

**Elano**, el-ano?

**Emano**, em-ano?

**Etano**, et-ano?

**Furano** = la heterocikla hidrokarbono; **furo** = *Mustela eversmani furo* (la "ĉasputoro"), la rusa putorio.

**Galbano**, speco de rezingumo, galbo (belarta termino).

**Humana**, hum-ana, sen komento.

**Irano**, ir-ano, same senkomenta.

**Kabano**, kab-ano...

**Kardano**, kard-ano?

**Konstantano**, jen alojo kun konstanta elektra rezistanco, ne "konstanta ano".

**Kvartano**, kvart-ano...

**Lantano** (*Lantana*) estas tropika kuracplanto kaj samtempe rara ĥemia elemento kun atom-numero 57, fine homonima kun lant-ano; bedaŭre, la planton NPIV senbaze rebaptis al "lentano".

**Lukano** (*Lucanus*) = la granda koleoptero kaj samtempe la roma poeto, loĝanto de Lukanio en la suda Italio, krome luk-ano povus esti adepto de la evangeliisto.

**Majorano** (*Majorana*), la planto ofte uzata en kuirejo, homonima kun major-ano.

**Mediano**, la termino geometria, medi-ano?

**Mentano**, la monocikla terpeno, nomita laŭ la aroma mento (*Mentha*).

**Metano**, la plej simpla hidrokarbono, met-ano?

**Nonano**, hidrokarbono, konsistaĵo de benzino, nono = diservo, Nonoj, la naŭa tago ĉe Romanoj.

**Oktano**, ree ingredienco de benzino; okto, la muzika intervalo.

**Pagano**, pag-ano, sen komento.

**Pavano**, pavano, same senkomenta.

**Paviano** koincidas kun loĝanto de la itala urbo kaj loĝanto de pavi-arbaro (*Aesculus pavis* el *Hippocastanaceae*; pavio estas nomita laŭ *Peter Paw* el Lejdeno; ĉi-okaze oni esperu, ke NPIVuloj future ne emos rebapti la belan arbon per "paviao" (kp. la unuan ĉapitron de miaj konsideroj); fine estas menciinde, ke paviano servu sole por uzo laika, dum ĝia nomo scienca estas **papiono**.

**Piano**, pi-ano...

**Pentano**, la saturita hidrokarbono, havas nenion komunan kun la fundamenta verbo penti (latine *paenitere*), sed devenas el la greka numeralo *penta* = kvin.



**Pirano**, la heterocikla kombinaĵo, ne estas derivita de piro (*Pyrus*), sed de la greka *pyr* = fajro.

**Platano** (*Platanus*) ricevis sian nomon laŭ la greka *platys* = plata.

**Pulmano**, la luksa vagono, pulm-ano?

**Radiano**, la geometria mezurunuo, radi-ano?

**Rodano**, la sulfociano, estas homonima kun okupito en rodo, la eksterhavena parto de maro.

**Romano**, jen kun konsiderinda plejado de homonimoj.

**Rumano** neniel estas koneksa kun la fundamenta nomo de la konata alkoholaĵo.

**Satano**, sat-ano, sen komento.

**Savano** (la zamenhofaĵo), sav-ano?

**Sekvano** laŭ NPIV referencas al Sejno.

**Silano**, la kombinaĵo de silicio kaj hidrogeno, koincidas kun prizorganto de silo.

**Solano** (*Solanum*) estas homonima kun sol-ano (ĉu ermito, piulo vivanta en soleco)?

**Sudano**, la suda lando, ne estas sud-ano.

**Ŝamano** kaj ŝam-ano, ŝamo la fundamentaĵo por delikata ledo.

**Tirano**, tir-ano, sen komento.

**Titano**, tit-ano, ĉu adepto de la romia imperiestro, ĉu de la jugoslavia ŝtatestro?

**Tomano**, la persa monero, tom-ano, ĉu adepto de tomismo?

**Tramontano**, la frida vento, bele homonima kun ekz. kontrabandisto migranta tra montoj.

**Tukano** (hispane *tucán*) servu por uzo laika, dum la nomo scienca estas ramfasto (*Rhamphastos*), la brazila birdo, nomita fare de tieaj indianoj: ĝi ne havas tukon, sed grandan bekon.

**Uretano** povas "ŝvarce" (t.e. laŭ *Raymond Schwartz*) interpretiĝi kiel ur-et-ano, sed temas pri estero de karbamata acido.

**Valeriano** (*Valeriana*) el valerianacoj ricevis nomon laŭ la romia *Valerius*.

**Varano** (*Varanus*) el varanedoj (*Varanidae*) estas granda lacertulo.

**Veterano** havas nenion komunan kun vetero.

**Volano**, la plumprovizita pilko, vol-ano?

Fine restus por pritrakti -ON-vortojn. Por konsciigi, mi menciu sole tiujn **fundamentaĵojn**, el kiuj povus generiĝi homonimoj, konsistantaj el fundamenta radiko plus la sufikso -ON-:

**Bastono**, bast-ono, basto, la fundamenta nomo por histo…

**Burĝono**, burĝ-ono, sen komento.

**Citrono**, citr-ono; citro taŭgus ne nur por la muzikilo, sed ankaŭ por *Citrus* (kp. la ĉapitron pri US).

**Ĉifono**, ĉif-ono, ĉif-aĵo, senkomentaj.

**Galono** signifas pasamenton, dum "galjono" mezurunuon. Jen plua ekzemplo, kiel misformi internacian nomon pro la homonimeco kun la fundamentaĵo. *Zamenhof* ne timis gal-onon.

**Kapono**, kap-ono, sen komento.

**Kartono**, kart-ono, same senkomentaj.

**Kolono** en NPIV havas 8 signifojn, sed ne tiun de la dika intesto (latine *colon*). Tiun ĉi oni misformis per "kojlo", timante homonimecon ne nur kun kolo, sed ankaŭ kun kolono… Fine restas la enigmo, kion signifu kol-ono.

**Kotono**, kot-ono, sen komento.

**Masono**, mas-ono, same sen komento.

**Melono** (*Cucumis melo*), melo (*Meles meles*), mel-ono.

**Mentono** (*mentum*), mento (*Mentha*), ment-ono?

**Miliono**, milio (*Milium*), mili-ono?

**Ordono**, ord-ono, sen komento.

**Salono**, sal-ono, same sen komento.

**Timono**, ligna stango, timo, sed *Thymus* = timiano, dum *thymus* = "timuso" (kp. la ĉapitron pri US), do ĉiam oni timas…

**Vagono**, vag-ono, sen komento.

Sume de 17 ekzemploj, dokumentantaj, ke mankis timo antaŭ homonimo kun la sufkso –ON, sed tamen restis timo pro iuj homonimoj koneksaj.

Da ekzemploj **nefundamentaj** ekzistas tro multe, por ke ili estu listigataj ĉi-loke. Jen almenaŭ kelkaj:

**Balono**, bal-ono, sen komento.

**Barono**, bar-ono…

**Baritono**, barit-ono, barito (mineralo).

**Blazono**, la heraldika termino; blazo, la haŭta veziketo, blaz-ono?

**Betono**, bet-ono, beto (*Beta* el ĥenopodiacoj).

**Ciklono**, cikl-ono, ciklo, sen komento.

**Dragono**, drag-ono, dragi…

**Elektrono**, elektr-ono, elektro…

**Festono**, ornamaĵo, fest-ono, festo…



**Fotono**, la fizika termino, fot-ono, foto…

**Frontono**, la arĥitektura termino, front-ono, fronto…

**Gazono**, la kultivita herbotapiŝo, gaz-ono, gazo, la teksaĵo…

**Kanono**, kan-ono, kano…

**Kantono**, kant-ono, kanto, sen komento.

**Gluono**, la elementa partikulo (latine *particula*) fakte gluas la nukleon…

**Karbono**, karb-ono, sen komento.

**Kokono**, kok-ono, same senkomentaj.

**Kriptono**, kript-ono, kripto kaj kripto/ , la pseŭdoprefiksoido kun la signifo: kaŝita; fakte la rara gaso estas malfacile izolebla…

**Kupono** devenas de la franca verbo *couper* = tranĉi, sed kup-ono koneksus kun la fundamenta vorto kupo, latine *cupa* = bareleto.

**Limono** (*Citrus limon*) el rutacoj, limo-ono, koneksa kun la latina lima = limo. Kp. ankaŭ limonado el la ĉapitro dua.

**Nilono** nilona, poliamida rezino, kiun oni ŝerce nomis laŭ la anglalingva frazo "*Nay you look, old Nippons*" ("Jen gapas vi, la oldaj japanoj" – kontaj sole la silkon…), havas ja nenion komunan kun la egipta riverego.

**Opono**, op-ono, sen komento.

**Ozono**, oz-ono, same senkomentaj.

**Patrono**, patr-ono…

**Pensiono**, pensi-ono…

**Piramidono**, piramid-ono…

**Pontono**, pont-ono…

**Radono**, la radioaktiva gaso havas nenion komunan kun rado (latine *rota*), sed jes kun radio.

**Silikono**, silik-ono…

**Stadiono**, stadi-ono…

**Taksono** jes koneksas kun la verbo taksi.

**Trombono**, tromb-ono, trombo, referencas al sia itallingva deveno.

Se oni komparas la riĉan "rikolton" de homonimofobiaj misformaĵoj en la ĉapitro unua, la nulan en la ĉapitro dua, do okaze de ĉi tiu tria troviĝas nur unusola: "lentano" anstataŭ la ĝusta **lantano**. Ĝojiga bilanco spite al tiom ofta homonimeco.

### 4. AR, ER

Ankaŭ la sufiksoj –AR kaj –ER homonime koincidas kun la koncernaj radikfinoj.

Unue pri la –AR-vortoj **fundamentaj**:

**Kataro**, kat-aro, sen komento.

**Omaro** estas okazo pli grava. La scienca nomo de la krustaceo (*Crustacea*) estas *Homarus* = homaro, jes homonima kun hom-aro. Badaŭre, nia Majstro klopodis eviti la ĝenan homonimecon, apoginte sin sur la itala omaro. Tamen, pure scienca teksto devus respekti la kodigitan formon latindevenan, kies *H* aperas en multaj lingvoj, do estas sendube internacia (*cs: humr, de: Hummer, fr: homard, hu: homár, po: homar, sk: homár* k.t.p.). Cetere, la fundamentaĵo povas bone servi por uzo laika.

El la **nefundamentaĵoj** menciindas:

**Barbaro**, barb-aro sen komento.

**Damaro**, (damara) la pinofit-arbo, damo (kp. la ĉapitron unuan).

**Dinaro**, la monunuo, dino la unuo de forto.

**Fulmaro** (*Fulmarus*), la procelarioforma birdo, fulm-aro, fulmo…

**Fumara** acido, fumo…

**Kalmaro** (science *Loligo* kun parencaj genroj), kalm-aro = senventaj tagoj.

**Kantaro**, science kantarido (*Cantharis*, genitive *Cantharidis*).

**Kultivaro** = kulturvario, kultiv-aro.

**Kuraro**, la drasta veneno, kur-aro…

**Miliara**, la termino medicina; oni ne timu konfuzon kun aro da milioj (*Milium*) el la tribo de milieoj, la familio de poacoj, la ordo de poaloj.

**Pedikularo** (*Pedicularis* el la familio de skrofulariacoj, dum la fundamenta pediko devus nomenklature fariĝi pedikulo el pedikuledoj (*Pediculidae*, kohere kun pedikulozo).

**Polara** en NPIV kurioze malkoheras kun la koneksa geometria termino "polajro", kiu devus nature fariĝi polaro (*cs: polára, de: Polare*); jen fortimiga ekzemplo de homonimofobio; bedaŭre, ankaŭ la fundamenta "poluso" apartenas tien ĉi (kp. la ĉaptiron pri –US).

**Radaro**: Ekzistas ankaŭ kurioza provo distingi inter ĝi kaj aro da radoj per "radoaro"; jen rea ekzemplo de troigita timo antaŭ la homonimeco.

**Grosularo**, registrita de *Kavka* (1980) kaj *Høeg* (1988) bedaŭre mankas en NPIV, kvankam aliaj oftaj granatoj (ne "grenatoj"), ekz. almandino, jes enestas.

"**Sakaro**" tute superflue homonimas kun sak-aro, ĉar la fonetike ĝusta formo, respektanta la fontlingvon, estas **saĥaro**.

**Skalaro** koincidas ne nur kun skal-aro, sed ankaŭ kun la fama akvaria fiŝeto *Pterophyllum scalare*, mankanta en NPIV.

"Skapulario" (*scapulare*) estas lanĉita fare de *Waringhien*, sed la latina originalo inspirus pli eble al **skapularo**; la problemeto ja apartenas al la ĉapitro unua; tamen, kiam temas pri la fundamenta "skapolo" (latine *scapula*) estas necese referenci al la ĉapitro pri OL.



**Tenaro** (*thenar*), la elstaraĵo de la dika manfingro, ten-aro?

**Terciaro**, la geologia periodo, estas homonima kun aro da tercioj plurfakaj.

**Ternara** = trikomponanta sistemo, havas nenion komunan kun ternado (latine *sternatio*).

**Velaro** male, senpere koheras kun velo, la mola palato.

Resume oni povas konstati, ke – bonŝance – la esperantlingva leksiko rifuĝis al misformoj nur escepte: omaro, skapulario, adulario, okulario (vd. la ĉapitron unuan).

Kiam temas pri -ER-vortoj, la situacio aspektas simile. Jen 17 nomoj **fundamentaj**:

**Ansero** (*Anser*) el la subfamilio de anserenoj (*Anserinae*) koincidas kun ans-ero (anso estas zamenhofa laŭ NPIV).

**Bordero**, bord-ero, senkomentaj.

**Fiero**, fi-ero?

**Kajero**: la homonimeco kun kaj-ero estiĝis nur post la oficialigo de kajo.

**Kolero**: kp. kun la ĉapitro unua.

**Kulero**: kp. kun la ĉapitro pri KS, kiu proponas la sciencan nomon kulico anstataŭ la laika kulo.

**Litero**, lit-ero, senkomentaj.

**Modero**, mod-ero?

**Mortero**, mort-ero?

**Papero**, pap-ero…

**Papavero** (*Papaver*) estu la scienca nomo por la laika papavo, sed ne por ties ero… NPIV prave konstatas la koherecon kun la alkaloido papaverino, sed malprave registras ankaŭ la misformaĵon "papavino".

**Kukumero** (*Cucumis*, genitive *Cucumeris*), kohere kun la specia epiteto kukumerofolia (*cucumerifolius*). Ja la latina genitivo servas por derivi pluron da vortoj, ekz. *cucumeraceus* = kukumereca; tamen, por uzo laika sendube restu la fundamenta kukumo.

**Parkero**. Ekzistas la fundamenta adverbo parkere, homonima kun park-ere.

**Pasero**, pas-ero…

**Pretero**, pret-ero…

**Sukero**, suk-ero…

**Tolero**, tol-ero; jen trafa ekzemplo por demonstri, ke en konsiderinda okazo, la homonimeco ne ĝenis nian Majstron…

**Tubero**, tub-ero…

**Vespero**, vesp-ero…

**Vipero** estas nefundamenta, sed laŭ NPIV prave servu kiel nomo scienca anstataŭ la fundamenta vipuro, kiu restu por uzo laika. Nomenklature do, la familio estu **viperedoj** (*Viperidae*). Ĉu *Zamenhof* timis la homoniman vipero?

Kaj jen 24 **nefundamentaĵoj**:

**Ariero**, la malantaŭa parto de armeo, taĉmento k.s. certe havas nenion komunan kun kantmelodio, la kristana teologo kaj raso, kiun NPIV rebaptis por eviti la homonimecon per "arja". Nekredebla atako kontraŭ la internacia aspekto (*la: arius, cs: arijský, de: arisch, es: ario, en: Aryan, fr: aryen, it: ariano* k.t.p.). Kial la sola Esperanto timu la homonimecon?

**Bolero**, bol-ero…

**Cicero**, la mezurunuo, tiparo, cic-ero, cico…

**Estero**, la kombinaĵo el organika ĥemio, homonimas kun ero de esto.

**Etaĝero**, etaĝ-ero?

**Helero**, hel-ero?

**Humero**, hum-ero?

**Kaperi** (laŭ *Zamenhof* transitiva verbo), kap-ero?

**Koĉero**, koĉ-ero, koĉo; tamen, parenteze dirite, la NPIVa "koĉo" por *Coccus cacti*, estas el la vidpunkto nomenklatura fonetike dubinda, kvankam prave hispaneska el vidpunkto laika; evidente oni timas konfuzon kun koko, dum ceteraj lingvoj ne timas…

**Latero**, la termino geometria, dum lat-ero estas peco de ligno…

**Leĝera**, leĝ-era, sen komento.

**Masero**, la termino fizika, estas homonima kun ero de maso…

**Omero**, la biblia mezurunuo, omo, la unuo de elektra rezistanco.

**Premiero**, premi-ero, sen komento.

**Pubera**, pub-era…

**Sapero** en NPIV referencas al sapeisto…

**Sidera**, la termino astronomia, sid-era…

**Skotero**, skot-ero…

**Subero**, la plantohisto (korko), sub-ero…

**Supera** (latine *superior*) apenaŭ havas ion komunan kun ero de supo…

**Tempero**, ĉu pentroteĥniko, ĉu termino muzika, devenas de la latina verbo *temperare* = mildigi; koneksaj terminoj estas temperamento, latine *temperamentum* = ĝusta miksiĝo de la korposukoj, temperatura = ĝusta miksiĝo, t.e. adekvata stato…, temp-ero?



**Vivero**, (*Viverra*), la katosimila rabobesto el viveredoj (*Viverridae*), homonima kun viv-ero…

**Vomero** (*vomer*), la naza osto plugilforma, vom-ero, vomi (latine *vomere*).

Resume eblas aserti, ke la -ER-vortoj – krom la unusola okazo de la fundamenta "vipuro" – ne inspiris al misformado.

## 5. AT, IT, OT

Homonimecon povas kaŭzi ankaŭ koincido de la radikfinaj kun la pasivparticipaj vorteroj AT, IT, OT.

5.1. Unue ni turnu atenton al AT

Jen la 12 **fundamentaĵoj**:

**Diplomato** ja sugestus pri diplom-ato, ĉar la verbo diplomati estas transitiva. Tiu ĉi koincido evidente ne ĝenis la kreinton de Esperanto, do tiom malpli ĝi ĝenos terminologon nuntempan…

**Granato** apenaŭ kapablas elvoki konjekton pri neregistrita verbo grani, konekse kun la malnova pez-unuo grano.

**Monato**, tute analoge, ne koheras kun mono. Registrita en NPIV estas la koncerna verbo faktitiva: monigi.

**Muskato** ne referencus al musko, pro manko de la verbo "muski".

**Oblato**. Eĉ se ekzistus verbo "obli", ĝi ne estus transitiva: jes tia estas la faktitiva obligi.

**Palato**. Pali ja estu netransitiva kompare kun la faktitiva paligi.

**Predikato**: prediki estas transitiva, do ekzistas ankaŭ predik-ato.

**Rabato** prezentas situacion iom komikan: ĉu la donanto de rabato estas rabato?

**Rezultato** ŝajnas esti superflua sinonimo de rezulto. Cetere, la oficiala verbo rezulti estas netransitiva, do nekapabla akcepti pasivan sufikson.

Male, **salato** normale estas sal-ata. Bonŝance, neniun ĝenu, ke ekz. kuiritan terpomon oni salas, sen akiri per tio salaton… (Amara ŝerco: la nazio *Rudolf Hess* aprezis Esperanton kiel "*Sprachensalat*" = lingvosalato).

Jes, **soldato** estas sold-ata, kvankam la verbon soldi la vortaroj ne registras. Tamen kp. la francan *solder*, la hispanan *saldar* kaj la italan *saldare*.

**Sublimato** laŭ NPIV = sublimaĵo, ĉar sublimi, laŭ la sama vortaro estas transitiva. Nu, la fundamenta formo tamen establiĝis kiel vaste internacia (*cs+sk: sublimát, de: Sublimat, en+fr: sublimate, es: sublimado, it: sublimato, po+rz: sublimat*). Ĉu Esperanto ĉifru la kodigitan nomenklaturon de ĥemio?

Da **nefundamentaĵoj** estas atendeble pli:

**Agregato**, la vaste internacia zamenhofaĵo, estas termino servanta en pluraj fakoj. Male, la NPIVa "agregaĵo" apenaŭ havas ŝancon akceptiĝi internacie, samkiel "sublimaĵo"...

Male, necesas distingi alkoholaĵon disde **alkoholato** kaj tiun ĉi disde alkohol-ato, ĉar la verbo alkoholi estas transitiva.

**Agato**, la neoficiala misformo de la mineralnomo aĥato (*cs+sk: achát, de: Achat, hr+sl: ahat*) havas nenion komunan kun la netransitiva verbo agi, ĉar nomita laŭ la greka *Aĥates*, la sicilia rivero, kie aĥato abunde troviĝis.

**Asignato** (zamenhofaĵo) distingiĝu disde asign-ato; ja la fundamenta verbo asigni estas transitiva.

**Aglomerato** servas en geologio por nomi specon de vulkanoklasta rokaĵo. NPIV jes registras la zamenhofan verbon aglomeri, sed ne la derivitan terminon "aglomeraJo"; jen nekonsekvenco de la redakta procedo, se oni komparas kun la NPIVaj "agregaĵo, diktaĵo, sublimaĵo" k.m.a.

**Balato**, la natura elastomero, devenas el pluaj arbospecoj, sen konekso kun la fundamenta balo, de kiu apenaŭ ekzistas verbo.

**Barato** estas komike homonima kun bar-ato, sed ĝia pli internacia nomo estus Bharato (de: *Bharata*, kp. *Mahabharatam*, la hinda eposo).

**Batato**, specio de ipomeo, estas sendanĝere homonima kun bat-ato, de la fundamenta verbo bati.

**Brokato** (*cs+sk: brokát, de: Brokat, en: brocade, es: brocado, it: broccado, hr+po+ru: brokat, sv: brokad*) referencas NPIVe al la sinonima "brokaĵo", derivita el la transitiva verbo broki.

**Cedrato** kaj **citrato** apenaŭ sentiĝus homonimaj kun la sufiksaj AT-vortoj, ĉar mankas transitivaj verboj "cedri" kaj "citri". Jes ekzistas analogaĵo al citri, nome violoni.

La zamenhofaĵo **diktato** estas laŭ NPIV "diktaĵo", spite al sia internacieco (*cs+sk: diktát, de: Diktat, en: dictate, es: dictado, hr: diktat, po: dyktat, sv: diktat* k.t.p,). Kiel ajn, temas pri io dikt-ata.

**Dilati**. Ĉu de dilo eblas formi verbon transitivan?

Male, **dukato** etimologie koheras kun duko (*la: dux, ducatus*).

Same, **fermato**, la muzika signo, koheras kun la transitiva verbo fermi, samkiel **formato** kun formi.

**Fortunato** fakte estas fortun-ato (*la: fortunatus, fr: fortuné, it. fortunato*).

**Gagato**, la kaŭstobiolita sedimento, estus homonima al gag-ato, se oni akceptus la transitivan verbon gagi = praktiki gagon. Alilflanke, **galato** malhavas sian homonimon gal-ato, ĉar mankas verbo "gali".

**Gelato**... Ĉu eblas "geli" ion?



**Grenato** estas neoficiala misnomo por la mineralo **granato**, la fundamentaĵo, servanta same por la arbo *Punica granatum*.

**Hemato**. Ĉu cerbumi pri ebleco de transitiva verbo "hemi", t.e. aldoni hemon?

**Hidrato** havas homonimon "hidr-ato", se ekzistus ekstreme dubinda verbo "hidri".

**Honorato** prezentas okazon analogan al Fortunato pro la *la: honoratus, fr: honoré* (*Honoré de Balzac*).

La NPIVa "Kalikato" prave referencas al **Kalkato**; tiu ĉi estas homonima kun kalk-ato de la transitiva verbo kalki.

**Kandidato** apenaŭ kapablas homonimi kun kandid-ato, konekse kun la endomiceto kandido.

Male, la ĥora verko **kantato** koincidas kun kant-ato.

**Karato**, la termino arabdevena, tutcerte ne koneksas kun la fundamenta adjektivo **kara**, samkiel **Karpatoj** kun **karpo**, ĉar la praeŭropa *karp* = roko.

La NPIVa verbo "**kolimati**" (*la+it: collimare*) estas kreita iom fuŝe; por eviti duoble pasivan patricipon "kolimat-ata", oni devus akcepti la pli ĝustan formon **kolimi** (= "kunlimigi"). Kp. ankaŭ la ĉeĥan participon *kolimovaný* = kolimita, samkiel ĉiun ekvivalenton slavlingvan.

**Komato** sendanĝere homonimas kun kom-ato. Ja eventuala verbo "komi" povus esti transitiva analoge al linii, punkti k.a.

**Kombinato** jes montras al la fundamenta verbo kombini.

**Konglomerato** apenaŭ cedos al la neinternacia "konglomeraĵo", analoge al aglomerato, agregato, diktato, sublimato k.m.a. Ne estas konsilinde, ke Esperanto ĉifru la vaste internaciajn terminojn.

**Konkordato** ne povas interpretiĝi kiel konkord-ato, ĉar konkordi estas netransitiva.

**Kvadrato**, *la: quadratus* = pasiva participo de la verbo *quadrare*, do temas pri io kvadr-ata...

"**Laminati**" estas same fuŝa NPIVaĵo kiel "kolimati". Estu **lamini** (*la+it: laminare, cs: laminovati, de: laminieren, es: laminar, fr: laminer* k.t.p.)

**Legato** havas laŭ NPIV du signifojn, sed necesas aldoni la trian, nome la muzikan, kiu devenas el la itala verbo *legare* (*la: ligere*) = ligi. Ĉiuj ĉi signifoj homonime koincidas kun leg-ato, t.e. iu aŭ io legata.

**Lunato** (*la: os lunatum*) apenaŭ interpretiĝus kiel lun-ato...

**Magistrato** kaj magistro estas vortoj zamenhofaj, sed eventuala verbo magistri ne povas funkcii transitive; sekve ne eblas magistr-ato.

**Majorato** ne kapablas elvoki penson pri major-ato, ĉar eventuala verbo majori ne estus transitiva.

Tute same, **manato**, la herbovora mamulo, malhavas homonimon man-ato, pro neekzisto de koncerna verbo "mani".

**Maskato** jes homonime koincidas kun mask-ato, ĉar la verbo maski estas transitiva.

Male, **mulato**, kvankam – pardonpete – iom analoga al la hibrido de azeno kaj ĉevalo, ne povas interpretiĝi kiel mul-ato.

**Okzalato** ne ĝenu ĥemiiston pro "okzal-ato", samkiel **oleato** pro "ole-ato".

Simile, **pirato** ne povas interpretiĝi kiel pir-ato, **poligonato** kiel poligon-ato...

La zamenhofa **postulato** jes koincidas kun la pli vastasenca postul-ato...

**Primato**, registrita en PIV, mankas en NPIV. Kial? Ĉu la ordo *Primates* devus malaperi el la internacia nomenklaturo?

La zamenhofa **referato** estas laŭ NPIV "referaĵo". Kp. diktato k.m.a.

**Sekretariato** ne kapablas elvoki participan homonimon, samkiel **senato**, kvankam ekzistas la monero seno.

Aliflanke, **serato** jes havas sian homonimon ser-ato, ĉar seri povas funkcii transitive.

Same ne tuŝas nian konsideron **sindikato**.

**Somato** eble koincidas kun som-ato, se oni akceptus transitivan verbon "somi".

Male, **sonato** ne havas participan homonimon, ĉar la fundamenta verbo soni estas netransitiva. Tamen, la latina verbo *sonare* povas esti transitiva: *vox sonat hominem* = la voĉo sonas laŭhome. Same la itala *sonare* aŭ *suonare un tango* = ludi tangon, do *suonata* aŭ *sonata* estas fakte son-ata...

**Stakato** estas la pasiva participo de la itala verbo *staccare* = disigi, sed NPIV ne registras verbon staki, sed nur la faktitivon stakigi. Ĉu prave? Ja la itala *staccato* estas pasiva participo de la verbo transitiva...

**Stigmato** povus homonime koincidi kun stigm-ato, se oni akceptus la dubindan NPIVaĵon "stigmo", sed botanike, zoologie kaj cetere tiu ĉi devus fariĝi stigmato, do genitivradike de la greka originalo *stigma*, *stigmatos*.

**Stomato** montriĝas tute analoge, sed NPIV ne aŭdacis lanĉi la terminon "stomo". Jen denove unu el multnombraj ekzemploj de alpaŝo malkonsekvenca...

**Suberata** acido estas en ordo, sed la NPIVa subero signifas histon, kvankam la latina *suber* primare signifas la korkan kverkon, nur sekundare la korkon mem (kp. *de subere cortex* = krusto de la korka kverko; same *pt: cortiça* = korko).



**Terato**, el la greka *teras*, genitive *teratos* = monstro, ne ekzistas en Eo kiel vorto memstara, sed sole kiel scienca pseŭdosufikso. La NPIVa manio memstarigi tiaspecajn vorterojn estas konata: "antropo, petro, speleo" k.a.

**Traktato**, liveranta la participan homonimon trakt-ato, NPIVe "traktaĵo", atendeble laŭ "diktaĵo" k.m.a.

**Traŭmato** ne inspiris la vortaregon NPIV al paralela "traŭmo" laŭ la modelo de "stigmo", do ne povas ekzisti homonima traŭm-ato...

5.2. Due estas loko por IT.

El la **fundamentaĵoj** ni trovis jenan seson:

**Granito** estas plutona magmorokaĵo, sed grano = malnova pezunuo, kp. granato en 5.1.

Oni povas mediti, sed **medito** koincidas kun med-ito: medo = miel-trinkaĵo.

La mineralo **pirito** apenaŭ homonimas kun pir-ito; ree kp. pirato en 5.1.

**Spirita** ne estas spir-ita, jen klasika ekzemplo de homonimeco...

Por fari **viziton**, ne ĉiam oni bezonas vizon...

Da **nefundamentaĵoj** ĉi-koncernaj, en NPIV troviĝas dekoj:

La transitiva verbo **agiti** neniam povas liveri konfuzaĵon, ĉar la netransitiva verbo agi malhavas pasivan voĉon. Ree kp. "agato" en 5.1.

La natria feldspato **albito** havas komunan koloron kun albo, t.e. blanka pastrovesto.

La hidrosulfato alumini-kalia estas **alunito**, precize difinita mineralo, dum la fundamenta aluno indikas pli ĝeneralan grupon de hidrosulfatoj alumini-alkalaj.

La fama fungogenro estas **amanito**, dum Amano = la ĉefurbo de Jordanio.

La fosilia cefalopodo **amonito** ricevis sian nomon laŭ Amono (zamenhofaĵo), la egipta dio.

La aroma herbo el Antaŭa Azio estas **balzamito**, homonima kun balzam-ito; balzamon, la bonodoran rezinon oni akiras el diversaj arboj kaj uzas ekz. por gardi korpon kontraŭ putrado.

**Bandito**: Esperanto ne registras transitivan verbon bandi, sed la itala *bandito* fakte estas la pasiva participo de *bandire* = starigi ekster leĝon.

La mineralo **barito** jes koincidas kun la homonima bar-ito.

**Bonito** laŭ NPIV estas komuna nomo por "ne tre grandaj fiŝoj el la familio de skombredoj"; ĉu vere el *Scombridae*? Ĉiuokaze temas pri tro franceska nomo el iĥtilogia vidpunkto iom enigma. Multaj nacilingvaj vortaroj, ekz. *Wells* (1969) ne registras ĝin.

"Bronkito" devus fariĝi bronĥitido, samkiel "bronko" estu bronĥo (*la: bronchus, el: broghos, de: Bronchie, en: bronchial tube, fr: bronche* k.t.p.)

**Dinamito**: Ĉu ekzistas dinam-ito? Kp. la grekan verbon *dynamai*.

**Ebonito** koincidas kun ebon-ito; ja ebono estas fundamenta termino por malhela ligno de diversaj arboj.

**Ferito**, laŭ NPIV pura fero en tri kristalsistemaj formoj. Eblas aldoni, ke la terminon oni uzas ankaŭ por natura fero kun almiksaĵo de nikelo. Fine, kiel teĥnika materialo, ĝi taŭgas por feromagnetaj radioricevil-antenoj. Aliflanke feritino, laŭ *Portmann & Rogers* (1993) estas proteino stokanta feron; oni timu homonimecon nek kun IT, nek kun IN.

**Filito**, jen rokaĵo estiĝinta pro milda metamorfozo de la sedimenta argilardezo.

**Fluorito**, la kubsistema mineralo, koincidas kun fluor-ito, **fosforito** kun fosfor-ito.

**Gambito**, la ŝaktermino, gambo, la membro.

"Glosito", la inflamo de la lango, estu glositido; cetere okazus koincido kun glos-ito, ja glosi estas verbo transitiva.

**Grafito**, la heksagona formaĵo de karbono, havas nenion komunan kun la nobela titolo.

**Gravito** restas ekster ĉiu konfuz-danĝero kun grav-ito, ĉar eventuala verbo gravi ja estus netransitiva, do sen ebleco akcepti pasivan sufikson.

Male, ĉu **irit-a** povus fariĝi vojo ir-ita?

**Kainito**, la utilega mineralo kalimagnezia, ricevis sian nomon laŭ la greka adjektivo *kainos* = nova, ne laŭ la biblia Kaino.

La NPIVa "kolito" referencas al "kojlito", sed devus esti **kolitido**, ĉar la latina *colitis* havas genitivon *colitidis*.

**Komandito**, la termino financa, sendube koheras kun la fundamenta verbo komandi; ĉar tiu ĉi estas transitiva, povas ekzisti komand-ito, ja kun signifo pli vasta...

**Kordito**, la eksplodaĵo, ne povas havi homonimon kord-ito.

Male, **kredit-o** kaj kred-ito, kvankam homonimaj, tamen diverssignifaj, certe koheras etimologie.

**Kvarcito**, la sedimenta rokaĵo, konsistanta preskaŭ sole el kvarco, apenaŭ estas akompanata de homonimo kvarc-ito.

**Laterito**, la rezidua rokaĵo, ne havas homonimon later-ito.

**Lazurito**, la blua tektosilikato, apenaŭ homonimas kun lazur-ito.

**Lignito**, la sedimento kaŭstobiolita, devenas el ligno, sen homonimi kun lign-ito.

**Limonito**, la fererco, etimologie koheras kun limono, la frukto: la greka *limen* = golfo, *lemon* = marĉa herbejo, perse *limun* = citrono, limon-ito apenaŭ ĝenus.



**Magnetito**, la plej feroriĉa mineralo, estas io alia ol magnet-ito, ĉar la transitiva verbo magneti signifas laŭ NPIV komuniki al ferpeco la altirecon de magneto.

**Magnezito**, jen mineralo magnezi-karbonata, sed magnezo, jen magnezia oksido; magnezi estus verbo transitiva, do ekzistus ankaŭ magnez-ito.

"Metrito" laŭ NPIV referencas al "uterito", sed tiu ĉi ne estas internacia medicina termino. La latina *metritis*, genitive *metritidis*, devus fariĝi en Eo **metritido**.

**Metropolito**, la termino zamenhofa, etimologie koheras kun metropolo, sen povi liveri homoniman metropol-ito.

**Moskito** estas laika nomo por iuj sudregionaj specioj de la genro kulico aŭ familio kulicedoj (*Culicidae*); "mosko", pli ĝuste mosĥo, apartenas al la subfamilio mosĥenoj (*Moschinae*) kaj al la familio cervedoj (*Cervidae*).

**Perlito** havas, krom la difino NPIVa, tiun de alojo ferspeca, la petrologianteĥnologian: vulkanvitro kun globeca teksturo; oni utiligas ĝin precipe prilaborita ekspansie.

**Petit-o** kaj pet-ito...

**Poplito** (*la: poples*, genitive *poplitis*), parto de la gambo; poplo (*Populus*); tiu ĉi arbo devus havi botanikan nomon **populo**, apud la komunuza fundamentaĵo.

**Precipiti** kaj la fundamenta adverbo precipe, ne bezonas komenton.

"Remito" (*cs: remise, de: Remission, en: remission, fr: rémission, it: remissione, la: remissio*) devus esti **remisio** (laŭ *Briquet*, 1932).

"Reniti" (kp. adj, *es+pt: renitente, fr: r'nitent, it: renitènte, la: renitens*) devus esti **renitenti** el la adjektivo renitenta.

**Siderito**, la mineralo, sidera = astronomia tempo.

**Sienito** estas plutona rokaĵo, analoga al granito, sed preskaŭ sen kvarco; sieno = pigmento nomita laŭ Sieno, la itala urbo.

"Spondilito", pli ĝuste **spondilitido** (*la: sponylitis*, genitive *spondylitidis*) = vertebra malsano; spondilo (*Spondylus*) = fosila bivalvulo (*la: Bivalvia* = NPIVe "duvalvuloj").

**Stilito**, stilo, sed mankas transitiva verbo "stili"...

**Suberito** vd. suberata pri AT.

**Termito**, jen homonima duopo: 1. insekto el la ordo de arĥipteroj, 2. miksaĵo kapabla produkti altan temperaturon; termo (zamenhofa) servas en filozofio, algebro k.t.p.

"Trakito" koincidas kun trak-ito, sed tute superflue, ĉar la fonetike pli ĝusta formo estas **traĥito** laŭ la greka, latine transskribita adjektivo *trachys* = aspra; ĝi montras al la surfaco de la hela vulkanaĵo.

**Transito**. Trans-ito ne eblas, ĉar la eventuala verbo transi estus netransitiva: jen vortludo…

**Trilobito** en NPIV referencas al "trilobuloj"; nu, el la vidpunkto nomenklatura, tiu ĉi formo estus tre diskutinda. Apenaŭ ekzistas lingvo, kiu aplikus por la paleozoika artropodo alian formon ol **trilobito**; cetere, eĉ la pasiva sufikso taŭgas Eo-gramatike: lobita triope…

**Vomito** (*la: vomitus* = vomado), vomi (fundamentaĵo).

Post kiam mi elnombris la NPIVajn IT-vortojn, okaze de kiuj teorie ekzistus koincido radikfina kun la sufiksa, okazu reveno al la kvin nomoj de malsanoj je IT: "glosito, kojlito, metrito, rakito, spondilito". Komparante ĉi-specan medicinan nomaron kun ekz. botanika kaj zoologia (aspido, irido, kanntarido k.a.) oni povas konstati, ke *Zamenhof* preferis la radikojn genitivajn, t.e. kun ID: ekz. *Aspis* fariĝis aspido. Ankaŭ multaj nefundamentaj ID-vortoj genitiv-radikaj ekzistas: ĉi-loke sufiĉu *Aphis* = afido. Ĉi-koncerne vd. la ĉapitron pri IS, kie troviĝas atentigo, ke NPIV multajn nomojn lasis nominativ-radikaj, ekz. *Arabis* fariĝis "arabiso".

Bedaŭre, ĉi-loke NPIV surprizas, ke iuj fontlingvaj IS-nomoj de malsanoj (*bronchitis, glossitis, colitis, metritis, rachitis, spondylitis*) subite aperas IT-formaj, do nek nominativ-, nek genitiv-radikaj, sed "nud-radikaj". Tio estas procedo apenaŭ pravigebla el la vidpunkto de internaciaj nomenklaturoj.

5.3. Trie venu OT

Jen la 9 **fundamentaĵoj**:

**Genoto** ŝajnas esti iom enigma nomformo por la rabobesto *Genetta*, kiu pli eble meritus sciencan nomon **geneto** aŭ **ĝeneto** (*cs: ženetka, G=Ĵ, de: Genette, G=Ŝ, fr: genette, G=Ĵ, it: genétta, G=Ĝ*).

**Kalikoto**. De la fundamenta kaliko apenaŭ ekzistas verbo "kaliki"..

**Kapoto**. Same la fundamenta kapo ne havas verbon "kapi".

**Karoto**. Eventuala verbo "kari" estus netransitiva.

**Markoto**. Male, mark-oto estas imagebla, pro la transitiveco de la verbo marki. Nu, ambaŭ homonimoj tre diverĝas laŭsignife.

**Miozoto**, mioz-oto, senkomente.

**Piloto**, pil-oto? Ĉu ekzistas verbo "pili"?

**Raboto**, rab-oto. Jes, rabi estas verbo transitiva. Vd. rabato okaze de AT.

**Trikoto** en NPIV referencas al "trikoŝtofo". Ĉu prave? Laŭ multaj vortaroj temas pri vestaĵo, ne pri ŝtofo. Ĉiuokaze trik-oto signifas ion tre parencan.

Kaj jen NPIVaj **nefundamentaĵoj**:

**Aĝioti** estas la zamenhofa verbo el la terminologio financa, samkiel la oficiala aĝio. Ĉu do eblas "aĝi-oto"?

**Baloti**, bal-oto? Kp. pri AT.



**Devota**, dev-ota?

**Ergoto**, erg-oto? Ĉu estas iom imagebla verbo "ergi"?

**Fagoto**, fag-oto? Ĉu eblas "fagi" arbaron, samkiel oni pipras nutraĵon, t.e. aldonas pipron?

**Folioto** (*Pholiota*) estas fungo, sed ĉu eblas foli-oto, se NPIV konsideras la verbon folii netransitiva?

**Galioto**, la ŝipo, homonime koincidas kun gali-oto, ĉar galio estas ne nur la genro el rubiacoj, sed ankaŭ la ĥemia elemento, do oni povas galii, samkiel sali ion.

**Grioto**, la ĉerizo acidgusta, homonimas kun gri-oto, ĉar sendube eblas grii manĝaĵon.

**Heloto**. Male, hel-oto ne eblas pro la netransitiveco de heli.

**Hipnoto**. Tamen hipn-oto funkcius, ĉar hipni signifus aldoni la muskon *Hypnum*.

**Ingoto**, la metalbriko, allasas homonimecon kun ing-oto, ĉar ingi estas transitiva, signifante "enmeti en ingon" aŭ "enmeti samspecan komputoran programon".

**Kaloto**. La fundamenta substantivo kalo ne diras, ĉu povas ekzisti transitiva verbo "kali".

**Kanoto**, la zamenhofaĵo por nomi promenan boaton, sendube homonimas kun kan-oto, ĉar eventuala verbo "kani" estus transitiva.

**Kuloto**, apenaŭ povas homonimi kun kul-oto, se la fundamenta kulo devus cedi al kulico, el la vidpunkto de la zoologia nomenklaturo.

**Litoto**, lit-oto? Apenaŭ ekzistas transitiva verbo "liti".

**Magoto** same ne akompaniĝas de transitiva "magi".

**Maroto** same ne de "mari".

**Mungoto** jes homonimas kun mung-oto, ĉar mungi estas verbo transitiva.

**Oceloto** el feledoj (*Felidae*) teorie koincidus kun ocel-oto, se oni akceptus transitivan verbon "oceli".

**Papiloto**, same koincidus kun "papil-oto".

**Peloto**, la pilketo, sendube povas esti pel-ota…

**Rizoto**, riz-oto? Ĉu eblas manĝaĵon "rizi", samkiel sali?

**Roboto**, rob-oto? Ĉu eblas "robi" sin, samkiel ĉapeli sin?

**Sapoto**, la speco de manilkaro, certe koincidas kun sap-oto, ĉar ekzistas la transitiva verbo sapi.

**Skleroto** povus koincidi kun skler-oto, se ekzistus transitiva verbo "skleri". Eble menciindas, ke la greka adjektivo *skleros* (= dura) devenas de la transitiva verbo *"skello"* (= mi durigas).

**Ŝaloto**, ŝal-oto? Kp. rob-oto, do "ŝali" analogus al "robi", ĉapeli k.t.p.

**Ŝamoto**, ŝam-oto? Ree analogaĵo.

Resume pri AT, IT, OT eblas konstati, ke la participaj sufiksoj generas abundon da homonimoj, sen ke oni devus timi konfuzon en eventuala kunteksto.

## 6. ED, (ET), EG

Jen estu atento pri okazoj, kie radikfinan ET oni misformis per ED, por eviti koincidon kun ET sufiksa. Fine sekvu okazoj de radikfina EG, koincida kun EG sufiksa.

### 6.1. ED

Da **fundamentaĵoj** mi trovis sole 5. (Enkrampe listiĝas po du ekvivalentoj etnolingvaj):

**Bufedo** (*fr: buffet, it: buffétto*); nia Majstro evidente timis la homonimecon kun buf-eto, sed ĉi-okaze estas menciinde, ke la fundamenta bufo devus servi pli eble por uzo laika, dum la nomo scienca estu **bufono** el la familio de **bufonedoj** (*Bufonidae*).

**Bukedo** (*fr: bouquet, ro: buchet*), por ke buk-eto fundamente servu sole kiel malgranda buko…

**Cigaredo** (*fr: cigarette, de: Zigarette*); la kreinto de Esperanto nepre volis distingi inter la blanka "Ĉerkonajlo" kaj la bruna cigar-eto… Nu, etnolingvoj ne bezonas distingi helpe de ED…

**Pikedo** (*fr: piquet, it: picchétto*); NPIV distingas eĉ la du nociojn, nome la militistan kaj la kartludan; ĉu tiaj specialaĵoj en kunteksto povus konfuziĝi kun la homonima pik-eto, t.e. malgranda piko?

**Planedo** (*fr: planète, la: planeta*); sen analizi, ĉu la timo antaŭ homonimeco estis bone motivita, mi tuŝu almenaŭ la problemon, kiu estiĝas pro la fundamenta vortformo: nek Fundamento, nek NPIV serioze konsilos al ni, kiel esperantigi terminojn parencajn al la "planedo"; ĉu teni konsekvence la misforman ED ekz. por "planedoido"? La etnolingvoj ne havas tiun problemon (*cz: planetoid, de: Planetoid, en: planetoid, es: planetoide, fr: planetoïde, pt: planetoide, ru: planetoid*, k.t.p.). En NPIV la termino simple mankas. Ĉu ĝia "planedeto" ĉifru la terminon plene internacian? Ĉu Esperanto ne estu **internacia** planlingvo? Plue: kiu motivo gvidis la redakcion de NPIV por ne registri la terminon "planedologio"? Ĉu tial, ke ĝi spitus la internaciecon? Male, troviĝas en la vortarego **planetario**, kiu – mirinde – ne signifas arion pri malgranda plano, sed aparaton "kiu projekcias el interno de duonsfero bildojn de Suno, Luno, planedoj…". Kial ne "planedario" analoge al la pli supre menciita "planedeto"? Kien malaperis la kohereco, postulata ekz. de *Suonuuti* (1998)? Ĉu ne estus plej honeste, se oni koncedus, ke la fundamenta planedo bonege servu en kuntekstoj komunaj eĉ popularsciencaj, sed en la



strikte sciencaj restu la plene internacia **planeto**, sen suferi pro homoinofobio?

Inter la "homonimogenaj" ED-vortoj **nefundamentaj** eblas elnombri jenajn 11:

"Arbedo" certe devus ne konfuziĝi kun arbeto. Kontraste al PIV, NPIV konsideras ĝin evitinda, proponante 1. trunkarbusto, 2. tufarbusto. Tamen el la vidpunkto terminologia, la botanikistoj sendube preferus la terminon **frutiko** (latine *frutex*, kp. ekz. kun *Potentilla fruticosa* = potentilo frutikeca), el kiu oni facile derivus la terminojn **duonfrutiko** (latine *suffrutex*, ekz. *Paeonia arborescens* = peonio arbeca), **frutiketo** (ekz. eriko), la adjektivon **frutikeca** k.t.p.

"Bankedo" (*en+fr: banquet*); ĉu bank-eto povus kuntekste kolizii kun banket-o? Eble en jena ŝerca frazo: "En la banko oni okazigis banketon".

"Barbedo" (*fr: barbette*), la tre speciala militista termino, apenaŭ konfuziĝus kun malgranda barbo…

"Bonedo" (*fr: bonette*), la speco de velo, bon-eto…

"Etikedo" (*fr: étiquette*) laŭ NPIV estas distingenda disde etiketo, tamen signifanta ankaŭ "etikedon". Por plue cerbumi, oni demandu, kio estas etiketo…

"Kasedo" (*cs: kazeta, de: Kassette, en: casette, es: caset, it: cassétta* k.t.p., ĉie nur T, nenie D!); laŭ NPIV preferinda ol la sinonima kaseto. Ĉu oni ne timu pri kas-eto aŭ kaz-eto, foje renkonteblaj?

"Kaskedo" (*fr: casquette, es+pt: casquete*) persistas en NPIV, kvankam jam *Grosjean-Maupin* (1947) prave esperantigas la francan vorton per **kasketo**.

"Kornedo" (*es+pt: corneta, fr: cornette*) laŭ NPIV ne signifas la blovinstrumenton, sed kapveston kaj standardoportiston, dum **korneto** laŭ ĝi signifas la blovinstrumenton kaj funelforman ilon por surduloj. La paronima "kornedo" estas NPIVa specialaĵo – kuriozaĵo, nerenkontebla en etnolingvoj…

"Limedo" por *Citrus limetta* = citro limeta estas bedaŭrinda misformaĵo por la plene internacia formo kun T, kiun NPIV deklaras "evitinda". Validas ĝuste la malo, ĉar konfuziĝo kun eta limo apenaŭ havas sencon.

"Paledo" (*en: pallet*). Ĉu ne sufiĉus ankaŭ por NPIV la termino absolute internacia: **paleto**? Kiel oni esperantigu la anglan verbon *palletize*, la participon *palletized*, la substantivon *palletization*. Ĉu ilin misformi per ED laŭ la instigo de NPIV?

"Rakedo" estas en NPIV rezervita por la pilkoĵetilo kaj por analogforma aparato, ebliganta paŝi sur neĝo. Ĉu la oficiala **raketo** (*cs: raketa, de: Rakete, en: rocket, es+pt: raqueta, fr: raquette, it. racchetta, ru: raketa*, k.t.p.) ne toleru, laŭ la uzo internacia, ankaŭ tiujn ĉi du signifojn krom la artfajraĵo kaj kosmopafaĵo?

"Renedo" (*cs: reneta, de: Renette, es: reineta, fr: reinette, it: renétta, pt: reineta, ru: ranet*, k.t.p.). Ĉu la pomvario povus konfuziĝi kun malgranda reno? Jen homonimofobio certe ridinda…

"Ĉaledo", transprenita el EB (1988) kaj baraktado inter ĝi kaj ĉaleto tamen indikas, ke NPIV iom dubas, kiel esperantigi la francan *chalet* kaj la portugalan *chalé*.

"Navedo". La sama situacio montriĝas okaze de **naveto** (*fr: navette, pt: naveta*), kiun NPIV referencas al "navedo", eble opiniante, ke eblus konfuziĝi kun preĝejparto…

Tamen unu esperiga simptomo: NPIV ne adoptis la EB-an "plakedo" (*en+fr: plaquette*). Ĉu tio promesu futuran "tagiĝon" de pli taŭga leksiko esperantlingva?

Aliflanke ŝajnas instrue, listigi NPIVaĵojn, ĉu fundamentajn, ĉu aliajn, kiuj restis nemisformitaj, kvankam ili kapablus generi homonimecon:

6.2. ET

**Aĉeto** koincidas kun aĉ-eto, t.s. iom eta aĉo…

**Aneto** (*Anethum* el apiacoj), an-eto?

**Baleto**, bal-eto, sen komento.

**Boleto** (la fungogenro *Boletus* el *Boletaceae*), bol-eto?

**Blanketo**, blank-eto, sen komento.

**Etiketo**, vd. pli supre.

**Gameto**, la seksa ĉelo, gamo 1. serio de noto, 2. la tria grafemo de la greka alfabeto.

**Gazeto**, perioda publikigaĵo, gazo 1. teksaĵo, 2. Gazo, la havenurbo inter Egipto kaj Israelo.

**Kareto**, kar-eto, sen komento.

**Kaseto**, vd. pli supre.

**Kateto**, la ĉeorta latero de triangulo, ĉu same malgranda kato?

**Koketo**, kok-eto, sen komento.

**Kometo**, jen brila modelo por planeto, ne "planedo", vd. pli supre.

**Korneto**, vd. pli supre.

**Korseto**, la laĉebla subvesto, korso (zamenhofa), la larĝa strato.

**Korveto**, malgranda ŝipo korv-eto, malgranda korvo el korvedoj (*Corvus, Corvidae*)…

**Kvinteto**, kvint-eto, sen komento.

**Limeto**, laŭ NPIV evitinda (vd. pli supre).

**Menueto**, menu-eto, sen komento.



**Mineto**, magmorokaĵo neregistrita en NPIV, sed min-eto = malgranda mino, la termino plursignifa.

**Nepeto** (*Nepeta* el lamiacoj), kvankam homonima kun malgranda nepo, restas en NPIV nemisformita, sed *Nepa* el *Nepidae* suferas misformiĝon al "nepao" (vd. la unuan ĉapitron), por ne esti konfuzata kun nepo… Foje oni timas homonimon, foje ne, jen malkonsekvenca alpaŝo…

**Pipeto**, pip-eto, sen komento.

**Ripeto**, rip-eto, same superfluas komenti.

**Soneto**, poemo, son-eto…

Aparte esperiga estas la fakto, ke ekzistas nek fundamentaj, nek oficialaj, nek neoficialaj precedentoj por misformi ekz. botanikan aŭ zoologian nomon per la radikfina ED. Oni kredu, ke ankaŭ la pli supre elnombritaj misformaĵoj malaperos el la scienca Esperanto-leksiko.

6.3. EG

Da vortoj, kies radikfina EG koincidas kun la sufiksa, troviĝas nur kelko. La unusola **fundamentaĵo kolego,** ne bezonas komenton. El la **nefundamentaj** eblas listigi seson:

**Agrego**: agr-ego (kp. ankaŭ la ĉapitron pri AT: agregato).

**Galego**: gentano de Galegio, n.or. de Hispanio, estas homonima kun granda galo, sekreciata de hepato.

**Nimego**: la nederlanda, Nimo, la langvedoka urbo.

**Omego**: la lasta grafemo de la greka alfabeto, omo: la unuo de la elektra rezistanco.

**Onego**: la rusa rivero, on-ego, sen komento.

**Stratego**: la greka strategos estas kunmetita el stratos = militista kampo, ago = mi gvidas; strato: la latina stratum = sternita.

## 7. EN, IN

Aparte konsiderinda estas la tradicia emo misformi per EN la fontlingvan radikfinan *IN*. Ankaŭ ĉi-okaze rolas la timo, ke ĝi konfuziĝus kun la IN sufiksa.

7.1. EN

Jen 12 nomoj **fundamentaj** kun enkrampe indikitaj ekvivalentoj latinaj, nomenklature kodigitaj:

"Azeno" (*asinus*). Sendube ĝi povas pluservi por uzo laika, sed en sciencaj tekstoj pli konvenus **azino**, kvankam homonima kun la heterociklaĵo.

"Delfeno" (*Delphinus*). Por uzo scienca nepre servu **delfino**. Kial? La malgranda cetaco internacie establiĝis kun I (*cs: delfín, de: Delphin, es+hu+kr+po+sl: delfin, el: delfis, genitive delfinos, fr: dauphin, ru: deljfin*, k.t.p.).

La saman nomon portas unu el la borealaj konstelacioj kaj unu el la sportaj stiloj de konkura naĝado. Evidente, la problemo tuŝas ne nur zoologion, kie delfino apartenas al la familio de delfinedoj (*Delphinidae*) kaj al la subfamilio de delfinenon (*Delphininae*) kaj tie ekzistas alia cetaca genro delfinaptero (*Delphinapterus*), la ĉarma "hela baleneto" Laŭ la delfino, la botanika nomenklaturo enkondukis la genronomon **delfinio** (*Delphinium*). Ĉi-okaze estas laŭdinde, ke la botanika redakcio de NPIV ne aŭdacis trudi la misan formon "delfenio", por resti konforma al la fundamenta "delfeno", sed akceptis la neoficialaĵon kun I, spite al E. Sed la kohereco inter delfino kaj delfinio konsistas en tio, ke la florburĝono de delfinio laŭforme aspektas delfinece. Temas ankaŭ pri ĥemio: la alkaloidon **delfinino** oni ekstraktas el delfinio. Aliflanke **delfinidino**, pigmento ligita al saĥaridoj, kaŭzas la ruĝan koloron ekz de vinberoj. Sendube neniu organika ĥemiisto aŭdacus – spite al la absolute internacia nomenklaturo – lanĉi la misformojn "delfenino" kaj "delfenidino".

"Ermeno" (*erminea*) science fariĝu **ermineo**. (La fungo *Lepiota erminea* = lepioto erminea!)

"Frakseno" (*Fraxinus*) estu **fraksino**, ĉar la greka *fraxis* = brido. Ja la ligno taŭgis por fari el ĝi bridon. NPIV eĉ registras la botanikan genron fraksinelo (pli moderne diktamno), kies folioj similas fraksinon.

"Gelateno" en NPIV referencas al ĝelo; la franca *gélatine* sugestas, ke pli taŭga termino estus **ĝelatino**.

"Jasmeno" (*Jasminum*), samkiel antaŭaj okazoj, estas misformita tute superflua, ĉar ne "minacas" homonimeco ekz. kun jasm-ino…

"Karpeno" (*Carpinus*) devas esti **karpino**, sen timi homoniman konfuzon kun la fiŝfemalo…

"Plateno" (*Platinum*) internacie establiĝis kun I (*cs: platine, de: Platin, en: platinum, es: platino, it: plàtino,* k.t.p.) do prave ankaŭ en Esperanto: **platino**, homonima kun presmaŝina tabulo kaj kun plat-ino…

"Rosmareno" (*Rosmarinus*) estu **rosmarino**, ĉar la latina *ros* = roso, *marinus* = mara; la homonimeco rosmar-ino, t.e. femalo de rosmaro (*Odobenus rosmarus*) apenaŭ kunportas danĝeron de konfuziĝo.

"Rubeno" (*rubinus*) internacie ne ekzistas kun E (*cs: rubín, de: Rubin, en: ruby, es: rubí, it: rubino, ru: rubin* k.t.p.), do ankaŭ planlingve restu **rubino**, sen timi homonimecon kun rub-ino.

"Sukceno" (*sucinum*) havas la internacian nomon **sukcinito**.

"Tendeno" (*tendo*, genitive *tendinis*), do **tendino**, kohere kun **tendinitido**, (*tendinitis*, genitive *tendinitidis*).

Nemirinde, ke la franceskaj PIV kaj NPIV tre volonte sankciis la EN-procedon:

"Bukceno" (*Buccinum*) devas esti **bukcino**.



"Fokseno" (*Phoxinus*), la dolĉakva fiŝeto, estu **foksino**.

"Ingveno" (*la: inguen*, genitive *inguinis*, *cs: inguina*, adj. *ingvinální, de+es+fr+pt: inguinal, it: inguinale*), do ĝuste **ingvino**.

"Lameno" nepre estu **lamino** (*la: lamina*) kohere kun **laminario** kaj **laminato**; ĉu lamino povas konfuziĝi kun lam-ino, femalo de la sudamerika parhufulo?

"Lupeno" laŭ NPIV estas preferinda ol la zamenhofa **lupino** (*Lupinus*) = lupherbo, (*ĉs: lupina, de: Lupine = Wolfsbohne*); do, la homonimeco kun femalo de lupo estas eĉ bonvena, ĉar elvokiva!

"Meleagreno" (*Meleagrina*) fariĝu **meleagrino**, kvankam homonima kun femalo de meleagro; cetere, NPIV referencas al pinktado.

"Muskardeno" (*Muskardinus*) provas distingi la gliredon disde la malsano kaŭzita de la fungo *Muscardina*; nepre konvenu **muskardino** por la ronĝulo kaj **muskardinozo**, laŭ la internacia uzo, por la malsano.

"Pingveno" (*Pinguinus, cs: pingvín, de. Pinguin, en: penguin, es+it: pinguino, fr. pinguin, pt: pinguim*), do **pingvino**, kohere kun pingvikulo (NPIV).

"Poleno" estas interesa misformaĵo de la latina *pollen*, genitive *pollinis*; la itala vorto *polline* klare montras, ke la genitiva radiko estas pli produktiva ol la nominativa; kp. ankaŭ *en: pollinate, fr: polliniser, pollinisation, pollinique, it. pollínico*, sed la greka *palino* = mi ŝutas, donis nomon al palinoanalizo, palinografio, palinologio, palinoskopio, do jen dilemo, ĉu esperantigi laŭ la greka modelo **palino**, ĉu laŭ la latina **polino**…

"Saĥaleno" estas fortimiga misformaĵo de la insulnomo **Saĥalino**. Tiu ĉi formo estas ne nur fontlingva, sed ankaŭ plene internacia, prave uzita ankaŭ en PM (1970); arbitran perfortadon de internaciaj nomoj oni forte kontraŭbatalu.

"Salveleno" (*Salvelinus*) devas fariĝi **salvelino**; ankaŭ ĉi-okaze restas la enigmo, kial NPIV misformis la fiŝnomon, se ne minacas homonimeco kun hipoteza "salvel-ino"…

"Salveno"; la rivero enfluanta en Andamanan maron, originale nomiĝas *Salvin* aŭ *Salwin* aŭ *Thanwin*, do **Salvino**, eventuale **Tanvino**.

"Serpenteno" draste spitas la internacie kodigitan mineralnomon (*la: serpens* = serpento, ĉar la serpentin-rokaĵoj foje similas haŭton de serpento; *cs+ru: serpentin, de: Serpentine, en+fr: serpentine, es: serpentina, it: serpentino*, do ankaŭ planlingve **serpentino**, sen timi homoniman koincidon kun femalo de serpento.

"Skvateno", ree enigma misnomo por **skvatino** (*Squatina*), parenca al ŝarkoj.

"Stameno" estu **stamino**, derivita de la genitiva radiko (*stamen, staminis*), kp. kun ingvino, tendino k.a., *it: stami(g)na.*

"Verbezeno" estas laŭ NPIV preferinda ol "verbesino", sed ambaŭ formoj estas misaj: Esperanto havu la formon **verbezino** por *Verbesina*, kies intervokala *S* redoniĝas per Z (kp. ekz. rezino, uzino).

"Vimeno" (*vimen,* genitive *viminis*), do **vimino** aŭ plennome saliko vimina (*Salix viminalis*).

Aliflanke oni zorge distingu: ne ĉiuj NPIVaj nomoj kun EN estas misformitaj; ekz la "marporko" apartenanta al cetacoj estas **foceno** (*Phocaena*).

7.2. IN

Male, oni konstatu, ke tre multaj NPIVaj vortoj kun la radikfina IN eskapis el misforma procedo. Komprenebla ĝi estas okaze de la **fundamentaĵoj**, ekz. maŝino, muslino, rezino, ruino, urino. Aldonendaj estas du propraj nomoj Berlino kaj Kalvino, povantaj servi kiel bonaj malekzemploj por la pli supra "Saĥaleno"

Da **nefundamentaj** IN-vortoj estas tro multe. Mi elektu iujn: albino, angino, anilino, balzamino, benzino, disciplino, doktrino, gilotino (laŭ la franca kuracisto *Guillotin*), glicerino, kumino, margarino, medicino, morfino, naftalino, nikotino (laŭ la franco *Nicot*), origino (laŭ la genitiva radiko de la latina *origo, originis*), parafino, pepsino, retino, ricino.

"Rutino" meritas pli da atento: en la difinoj NPIVaj mankas tiu pri la flavonoida glikozido, entenata en la planto **ruto** (*Ruta graveoens*). Jen okazo por konfrontiĝi kun la radikteorio de NPIV, kiu opinias, ke la radiko estas rut/ kaj la sufikso estas /in. Tradicie, Esperanto konsideras, ke la radiko estas rutin/ , do ke IN konsistigas la radikon. Nun la redakcio de NPIV bonvolu ekspliki, kial IN en nikotino konsistigas la radikon, kvankam devenante de *Nicot*, kaj kial IN en rutino estas devenanta de ruto, do temas pri sufikso, ne konsistaĵo de la radiko… Analogaj arbitraĵoj pure subjektivaj, en NPIV svarmas. Resume, neniu kapablas instruiĝi, kio estas radiko kaj kio estas afikso.

Sekvu la elnombrado de la nemisformitaj IN-vortoj:

Stearino, tamburino, tanino, turbino, vakcino, vazelino. Laŭdinde, ke ili restis nemisformitaj, kvankam kelk-okaze "minacas" homonimeco. Tiom malpli kompreneblas ekz. "keroseno" kompare kun la ĵus elnombritaj ĥemiaĵoj. Ja ne ekzistas "keroso". Nepre estu **kerozino** (Z, ĉar temas pri la fontlingva S intervokala, samkiel pri la pli supra **verbezino** kaj la ĵuse lasta **vazelino**. Evidente, pli akurata redaktado de NPIV estu plenumita…

Enkadre de la mineraloj (akvamarino, aventurino, kalamino, silvino kaj turmalino) neniel "minacas" homonimeco, sed ekzistas ankaŭ mineralo **nikelino** NiAs), la grava nikel-erco; NPIV mencias nur la samnoman alojon de kupro, nikelo kaj zinko.



Restante en mineralogio, eblas trovi en la vortaro de *Høeg* (1988) 24 mineralonomojn kun la radikfina IN. Aliflanke troviĝas tie nur unusola mineralnomo, kiu same estas nomo de la ĥemia elemento, misformita per EN: plateno. Ĉi-okaze la vortaristo referencas al la fundamentaĵo registrita en PIV.

Konklude eblas esperi, ke fakaj vortaristoj nepre evitos la malbonŝancan EN-procedon, kiu nepardoneble perturbu la internacie kodigitajn nomenklaturojn de ĥemio, mineralogio, biologio kaj aliaj sciencoj.

## 8. IK

Plena Analiza Gramatiko (1980, p. 403) difinas: "IKo estas neoficiala (pseŭdo)sufiksoido por formi la nomon de scienco, okupiĝo k.t.p. el la nomo de respektiva isto. Ekz. poeto – poetiko, stilisto – stilistiko". Samloke troviĝas: "En la vortoj dinamiko, muziko, optiko k.t.p. iko estas apartenaĵo de radiko".

Nu, jen la fonto de sennombraj koincidoj generantaj homonimecon. La sekvaj ekzemploj atestu, ke nenifoje tia homonimeco alportis emon al misformado, bonŝance.

Ankoraŭ estu permesata atentigo, ke *Zamenhof* uzis la terminon lingvistiko, ne "lingviko", kiu estas trovebla en NPIV. Same mi, kiel profesia geologo, ne aŭdacus lanĉi "kristaliko, mineraliko, petriko" kaj similajn monstraĵojn, kiuj spitus al la internacie establitaj kristalografio, mineralogio, petrologio k.t.p.

Unue, pri la **fundamentaj** IK-vortoj:

**Amiko** homonimas kun "*ars amandi*"…

**Arseniko**, la toksa kombinaĵo de arseno, certe ne estas scienco pri tiu ĥemia elemento.

**Artiko**, art-iko. Sen komento.

**Brasiko** (*Brassica*) ne estu scienco pri la ŝiposnuro (braso estas zamenhofaĵo).

**Butiko**, but-iko, ĉu okupiĝanta pri butado?

**Efiko**. Efo = mezurunuo por sekaĵoj…

**Filiko**, fil-iko. Sen komento.

**Formiko** (*Formica*). Ĉu formiko estu scienco pri formoj?

**Fortiko**. Ĉu fort-iko estu parto de fiziko pri fortoj?

**Kaliko**, kal-iko. Sen komento.

**Komuniko**, komun-iko, ĉu scienco pri komunoj?

**Kritiko**, ĉu krit-iko pri la kritaj statoj?

**Maniko** tamen koheras kun manoj, sen esti scienco pri ili.

**Mastiko**, certe ne scienco pri mastoj.

**Muziko**, jen unu el la radikfinaj ekzemploj de PAG. Ĉu vere?

**Peniko**, pen-iko. Sen komento.

**Perdriko** (*Perdix*), laŭ la nomenklatura vidpunkto devus fariĝi **perdiko**, sen esti scienco pri perdoj…

**Persiko** prave koheras kun persoj, sen esti scienco pri ili.

**Prediko**, pred-iko. Sen komento.

**Pumiko**, la malpeza vulkanaĵo, homonimas kun pum-iko, konekse kun la rabobesto el feledoj (*Felidae*).

**Radiko**, ĉu ankaŭ scienco pri radoj?

**Saliko** (*Salix*), ĉu ankaŭ pri saloj?

**Siliko** (*silex*), ĉu ankaŭ pri siloj?

**Soriko** (*Sorex*), la insektovorulo, sed sor-iko. Ĉu pri filiko- aŭ fungo-soroj?

**Testiko**, la virseksa glando, certe ne scienco pri testoj…

**Tropiko**, trop-iko: Ĉu pri vortofiguroj?

**Tritiko** (*Triticum*), ne pri muzikaj tritoj?

Due, pri la **nefundamentaĵoj**:

**Aerostatiko**, homonima kun -iko pri aerostataj (zamenhofaĵo) aparatoj.

**Agariko** (*Agaricus*), la fungo, homonima kun -iko pri agaro.

**Arniko** (*Arnica*), la kuraca planto, certe havas nenion komunan kun Arno, la toskania rivero.

**Atlantiko** etimologie jes koheras kun atlanto, la skulptaĵo kaj la vertebro.

**Aŭriko**, la velo, homonimas kun aŭr-iko, t.e. pri aŭroj.

**Aŭtentiko**, aŭtent-iko, sen komento.

**Balistiko**, homonima kun balist-iko, eĉ kun bal-ist-iko…

**Batiko**, devenanta el la malaja lingvo, havas nenion komunan kun la verbo bati, dum bat-iko estus "instruo", kiamaniere bati…

**Betoniko** (*Betonica*) el lamiacoj estas homonima kun beton-iko (ĉu scienco pri betono?).

**Cerviko** (*Cervix*), la genitivradika nomo por mallarĝa parto de organo, homonimas kun cerv-iko, ĉu parto de zoologio pri cervospecioj, ekz *Cervus elaphus*, aŭ eĉ pri cervenoj (*Cervinae*) kaj cervedoj (*Cervidae*)?

**Dalmatiko**, la longmanika vesto, homonime koincidas kun dalmat-iko, rilata al la dalmata gento.

**Dialektiko**, la filozofia termino, sendube estas io alia ol scienco pri dialektoj, kies establita formo estas dialektologio.



**Dinamiko**, la parto de meĥaniko, estas homonima kun dinam-iko, kiu okupus sin pri la dinamoj.

**Diplomatiko** laŭ NPIV = diplomologio. Ĉu vere? Kio do estus diplomat-iko?

"Distiko" ne koheras kun distaj aferoj, ĉar la versduo devus nomiĝi respekte al la fontlingvo: **distiĥo**.

**Dominiko**. la virnomo etimologie koheras kun la verbo domini, kaj tiu ĉi kun la latina substantivo *dominus* = sinjoro.

**Doriko** jes rilatas al Doro kaj Dorio.

**Ekonomiko**, ekonom-iko, ekonomo ne bezonas komenton, sed la ĝenerale uzata "NPIV-nesta" grupigo de vortoj ne funkcias ĉi-okaze: ekonom/o estas registrita aparte de ekonomi/o kaj aparte de ekonomik/o. Kp. ekz. kun la nesto: ekolog/o, -io…

**Ekscentriko**, la teĥnika termino, estas homonima kun ekscentr-iko, kies adjektivo ekscentra povas signifi laŭ *Zamenhof*: ekstravaganca, originala…

**Ekzotika** = ekzota, la neoficiala adjektivo laŭ NPIV.

**Elektroniko**, elektron-iko, jes teĥniko rilata al elektronoj.

**Encikliko**, la papa cirkulero, dum encikl-iko, ĉu geometrio pri enciklaĵoj?

**Eriko** (*Erica*), er-iko, sen komento.

**Erotiko**, erot-iko, eroto? Ŝajnas, ke la NPIVA adjektivo erotik/a povus interpretiĝi kiel erot-ika, se NPIV ĝenerale inklinas al la "nesta" grupigo de vortoj.

**Etiko**, et-iko, sen komento.

**Eŭgeniko**, eŭgen-iko, Eŭgeno, sen komento.

**Fuliko** (*Fulica*), la nigra akvobirdo, ful-iko de la verbo fuli (*la: fullare, fr: fouler, it. folare*).

**Georgiko**, la poemo pri "georgoj" = terkulturistoj, do fakte georg-iko…

**Germaniko** (*Germanicus* = germana), do german-iko pri germanoj…

**Gimnastiko**, gimnast-iko, laŭ NPIV prave situas en la nesto de gimnast/o, -ik/o, ne aparte kiel gimnastik/o. Ree kp. kun ekonomio.

**Gnomiko**, gnom-iko, gnomo, samamaniere en NPIV.

**Gotiko**, male registrita aparte de goto.

**Grafiko**, graf-iko, grafo kiel nocio geometria.

**Harmoniko**, la muzikilo, homonimas kun harmon-iko, ĉu parto de fiziko pri la harmonoj?

**Heliko** (*Helix*), la gastropodo, sed hel-iko, ĉu pri helaĵoj?

**Hepatiko** (*Hepatica*), la hepatkuraca planto, sed hepat-iko = hepatologio, ĉu ne vere?

**Hermetiko**, laŭ NPIV la zamenhofa adjektivo hermeta = hermetika, sendube prave, laŭ la tre internacia uzo.

**Indiko**, ind-iko, ĉu pri indaj aferoj?

**Kaciko**, la indiana tribestro, homonimas – pardonpete – kun kac-iko, ĉu scienco pri penisoj?

**Kanoniko** estas homonima kun kanon-iko, ne pri pafilegoj, sed prave pri ekleziaj reguloj.

**Kantiko**, ĉu kant-iko ne troviĝu sub kant/i?

**Kariko** (*Carex, Carica*) kaj kar-iko, sen komento.

**Klasiko**, klas-iko, same senkomentaj.

**Kleriko**, kler-iko, klerulo…

**Kliniko**, klin-iko, sen komento.

**Koliko**, la ventrodoloro, kol-iko, ĉu ventrodoloro, ĉu koldoloro?

**Komiko**, kom-iko, sen komento.

**Koniko**, la geometria termino, bone koheras kun konoido, sed malbone kun la fundamenta konuso (vd. la ĉapitron pri –US).

**Korintika** prave koheras kun Korinto.

**Korniko** (*cornix*), korn-iko; la latina diminutivo *cornicula* montras al korneto.

**Korsiko**, kors-iko, sen komento.

**Kortiko**, kort-iko, same.

**Kroniko**, kron-iko, same.

**Lariko** (*Larix*), la falfolia pingloarbo, lar-iko, ĉu pri laroj (*Larus*) aŭ pri Laroj, la lokaj dioj?

**Liriko**. Jes, origine temis pri kantoj, akompanataj de liro, la muzikilo. Tamen, lir-iko povus temi krome pri la itala mono…

**Logiko** logas al pensado…

**Metriko** en NPIV situas duloke, unue sub metro kiel metr-iko, due memstare kiel metrik/o. Jen motivo por iom cerbumi…

**Miriko** (*Myrica*), ekz. *cerifera*), mir-iko, senkomente.

**Moldaviko** (*Dracocephalum moldavicum*), sed moldav-iko, ĉu pri la civitanoj de Moldavio?

**Moniko**, mon-iko, sen komento.

**Narkotika** en NPIV referencas al narkota, narkot-iko, ĉu scienco pri narkotaĵoj, narkotismo, narkotuloj?

**Naŭtiko**, sed naŭt-iko, ĉu pri la muzikaj naŭtoj?



**Optiko ne** povas esti homonima al opt-iko, ĉar la de PIV kaj NPIV "inventita" memstara "opt/o" fakte ne ekzistas en internacia terminologio. Ekzistas sole la pseŭdoprefiksoidoj, do radikpartoj opt/ (ekz. en optiko) kaj opto/ (ekz. en optometro). Opt/on oni trovas nek en *Waringhien* (1957), nek en *Krause* (1967), nek en *Wells* (1969). Memstarigi pseŭdoprefiksojn ekz. antrop/o, petr/o, spele/o k.t.p. estas kondamninda procedo, ĉar ĝi spitas internacie kodigitan sciencan leksikon!

**Organika** (zamenhofaĵo) povas homonimi kun organ-ika el hipoteza scienco pri organoj.

**Paniko**, pan-iko, senkomentaj.

**Plastiko**, plast-iko same ne bezonas komenton.

**Portiko**, la arĥitektura termino, port-iko?

**Puniko** (*Punica*), la granat-arbo, referencas al la latina adjektivo *punicus* = purpure ruĝa, sed pun-iko eble havus nenion komunan kun la fundamenta verbo puni. Krome, Punika rilatas al Kartago.

**Raliko**, la marista ŝnuro, povus homonimi kun ral-iko, ĉar ralo (*Rallus*) estas gruforma birdo.

**Romanika**, roman-ika, jen plejado da terminoj parence al Romo, romano, romanco, romanĉo k.m.s.

**Rustika**, rust-ika, sen komento.

**Saloniko** en NPIV prave referencas al Tesaloniko.

**Semantiko** ŝerce aludu pri semantoj…

**Signifiki** invitu al cerbumado lige kun la fundamenta verbo signifi…

**Sindiko** (zamenhofa), sind-iko, sed la NPIVa Sindo referencas al la tre dubinda rivernomo "Induso" (kp. la ĉapitron pri -US).

**Skandiko** (*Scandix*), skand-iko, ĉu pri skandado? La plantonomo rilatas al la latina verbo *scandere* = grimpi.

**Spadiko** (*spadix*), la infloresko, spad-iko: ĉu pri glavoj?

**Statistiko**, statist-iko, statisto (zamenhofa).

"Stokastisto", respekte al la fontlingvo devus fariĝi **stoĥastiko**: samfonetike ĝi validu pri stoĥasto.

**Taktiko**, takt-iko, senkomente.

**Tektoniko**, tekton-iko, ĉu pri *Tectona* el verbenacoj? Male, la NPIVa "tekton/o" kiel termino geologia, estas al mi, la koncerna profesiulo, tute nekonata. Pri la manio memstarigi pseŭdoprefiksojn vd. okaze de opt-o…

**Toniko**, ton-iko, ĉu pri tonoj, ĉu pri medikamentoj?

**Trafiko**, traf-iko, senkomente.

**Tragiko**, trag-iko, ĉu rilata al la homaj oreloj?

**Tuniko**, tun-iko, senkomente.

**Variko**, var-iko, senkomente.

**Veroniko** (*Veronica*) el skrofulariacoj havas sendube nenion komunan kun la itala urbo Verono.

Do, jus mi estas listiginta pli ol cent homonim-okazoj lige kun -IK. La ekzemploj klare demonstras, ke:

1. la homonimeco abundas ĉi-konceme;
2. ne eblas ĝin forigi el Esperanto;
3. estas nek necese, nek konsilinde misformi la vortojn pro la homonimeco;
4. la homonimeco apenaŭ povas ĝeni en kuntekstoj;
5. la -IK-vortoj de NPIV troviĝas parte enkadre de "nestoj", parte ekster ili, do la koncepto pri radikoj kaj afiksoj de Esperanto impresas en la vortarego kiel konsiderinde svaga.

**9. IL**

En ĉi tiu ĉapitro ne temas pri -IL-, kiu misformus radikfinon de vorto, sed male pri tia -IL-, por kiu indas pledi, kvankam ĝi povas koincidi kun -IL-sufiksa.

Inter la **fundamentaĵoj** troviĝas jena seso:

**Aprilo** certe ne ĝenas kiel ilo por kapti aprojn.

**Facila** apenaŭ havas ion komunan kun faco, la termino geometria.

**Humila**, male senpere koheras kun humo el la vidpunkto etimologia, tamen sen rilati al ilo.

**Morbilo**, jes estas speco de morbo, kvankam ne ties ilo.

**Pupilo** (*pupilla*), la okul-aperturo, ja ne estas ilo por fabriki pupojn.

**Vanilo** (*Vanilla*) el orĥidacoj, estas nomo indiandevena, sen konekso kun la latina adjektivo *vanus* = vana.

Da **nefundamentaĵoj** -IL-nomaj ekzistas multe pli:

**Acetilo**, la radikalo $CH_3CO$-, koincidas kun acet-ilo; acetato estas zamenhofa, laŭ NPIV.

**Akrilo**, homonima kun akr-ilo, estas organikĥemia pseŭdoprefikso por plejado da derivitaj terminoj, ekz. akrilaldehido, akrilamido, akrilato.

**Amilo**, ree el la organika ĥemio, sed ne koneksa kun amo...

**Arilo** samfaka, sed ne koneksa kun aro.

**Aspergilo** (*Aspergillus*) estas mikroskopa hifomiceto- (ŝim-) genro, kies sporangio fakte similas ilon por aspergi, do la homonimeco eĉ bonvenas.



**Bacilo** (*Bacillus*). La latina *bacillus* = bastoneto estas diminutivo de *baculum* = bastono. Aliflanke la laŭ NPIV zamenhofa baco estis germana monero.

**Berilo**, la fama ciklosilikata mineralo, estas nomo grekdevena: *beryllos* = bela antikvaĵo (pro la beleco de la kolora juvelŝtono); aliflanke, bero estas nomo germandevena.

**Bombicilo** (*Bombycilla*), la genro de birdoj paseroformaj, liverus homonimecon, se entomologoj esperantigus la silk-papilion ne per "bombikso" sed per bombico (kp. kun la 12-a ĉapitro pri KS;

**Bulbilo** (*bulbillus*), la supertera kvazaŭbulbeto, koincida kun bulb-eto;

**Buterilo** estas laŭ NPIV radikalo de buterata acido; tamen, la ĥemie kodigita nomo estas **butirilo** (aŭ butanoilo), kaj la koncerna acido: **butirata**; Eo ne rajtas misformi la internacian nomenklaturon; tio evidentiĝas ekz. en la lingvo germana, kiu ne lanĉis "*Butteryl*" anstataŭ la ĝusta *Butyryl*, kvankam butero estas germane *Butter*, angle *butter*; oni respektu la severe gardatan tutmondan uzon de la ĥemiistoj; alia okazo montriĝas ekster ĥemio: ekz. por la fungo *Collybia butyracea* eblus rekomendi la nomon kolibio butereca, ne "butirica", al kiu mankus la elvokiveco de butero;

**Butilo**, denove radikalo organikĥemia, homonime koincidas kun la ĝardenista but-ilo;

**Cedilo**, laŭ NPIV zamenhofa nomo por la diakrita subsigno, ja ne estas ilo por cedi;

**Ĉenilo**, laŭ NPIV speco de pasamentaĵo, koincidas kun ĉen-ilo;

**Etilo**, la radikalo $C_2H_5$-, estas homonima kun eta ilo (ileto);

**Fenilo**, la radikalo $C_6H_5$-, povus sendanĝere homonimi kun fen-ilo, t.e. harsekigilo;

**Formilo**, la radikalo de formiata acido estis en PIV, mankanta en NPIV, sed ne en *Portman-Rogers* (1993), povus neverŝajne konfuziĝi ekz. kun ilo por formi ĉapelon;

**Fragila**, latine *fragilis* el la verbo *frangere*, havas nenion komunan kun fragoj, ĉar la genronomo *Fragaria* devenas de la latina verbo *fragrare* = bonodori;

**Gerilo**, la partizanmilito, homonime koincidas kun la mezurunuo gero kaj la verbo geri (= segi juntcele), do ger-ilo estas la koncerna aparato;

**Gracila**, homonima kun grac-ila, devenas de la latinaj *gracilis* kaj *gratiosus*, tiuj ambaŭ de *gratia* = graco;

**Grenadilo** estas laŭ NPIV *Passiflora edulis*; tamen, la brazila nomo *granadilla* koncernas alian specion de pasifloro: *P. quadrangularis*; ĉar ne temas pri kodigita botanika nomo, ni ne plu analizu la koincidon kun "grenad-ilo";

**Kokilo** (germane *Kokille*) estas trovebla en *Haferkorn* (1967), sed mankas en NPIV; temas pri daŭra metala formujo, t.e. muldilo, en kiun oni gisas

metalurgian ardaĵon; la termino estas transprenita ankaŭ de *Krause* (1983); interese, ke NPIV ne bezonis registri ĝin, kvankam temas pri tipa franceskaĵo *coquille*, hibrida el *coque* kaj la greka *konĥilion* = konko;

**Koronilo** (*Coronilla*), genro el fabacoj, dum korono estas la plej ekstera, maldensa suntavolo;

**Manilo** aŭ manila kanabo homonimas kun man-ilo;

**Mantilo** estas hispaneska vestotuko, dum **manto** (*Mantis*) apartenas al ortopteroj, familio mantedoj (*Mantidae*);

**Metilo** la radikalo $CH_3$-, koincidas kun met-ilo;

**Mutili** (latine *mutilare*) estas prenita el la greka *mytilos* = stumpita; ĝi koincidas kun mut-ila;

**Naftilo** estas unuvalenta grupo el naftaleno, dum naft-ilo povas esti instalaĵo por akiri mineralan oleon;

**Pistilo**, la flor-organo, pist-ilo, per kiu oni pistas: jen homonima duopo, kunekzistanta tute sendanĝere;

**Rutilo**, la titandioksida mineralo, ricevis sian nomon laŭ la latina *rutilus* = ruĝeta, dum ruto (*Ruta graveolens*), la fama kuracplanto, estas nomo grekdevena: *rytos* = likva, ĉar oni uzadis rut-ekstrakton en vino, akvo kaj vinagro;

**Senila**, sen-ila: ĉu ni komentu?

**Serpilo** (*Thymus serpyllum*), la bonodora planto el lamiacoj (laŭ PIV eksmode labiacoj), estas nomita laŭ la greka verbo *herpydzein* = rampi, latine ĝi sonas *serpere*; aliflanke serpo eble rilatas al *sarpere* = fortranĉi, serp-ilo do estus pleonasma por serpo; el la nomo *serpyllum* deriviĝas la speci-epitetoj *serpyllaceus* = serpileca kaj *serpyllifolius* = serpilofolia, apartenantaj al aliaj plantoj iom similaj al serpilo;

**Servila**, t.e. servemaĉa, simptome homonimas kun serv-ila;

**Spirilo**, el la latina *spira* = ŝraŭbkanelo, estas eŭbakterio helice tordita, dum la homonima spir-ilo povus signifi spir-aparaton;

**Strobilo** (latine *strobilus*, greke *strobilos*) estas infloresko kaj fruktaro de pinofitoj, dum strobo (*Pinus strobus*) = pino stroba: ekzistas ankaŭ pluraj speci-epitetoj: *strobilaceus* = strobileca, *strobilifer* = strobiloporta, *strobiliformis* = strobiloforma k.a.;

**Tetrilo**, la organik-ĥemia eksplodaĵo, ŝajnas homonimi kun la fundamenta tetro (*Lyrurus tetrix*), birdo el galloformaj (laŭ NPIV "galinoformaj" = *Galliformes*), familio tetraonedoj (*Tetraonidae*);

**Uranilo** estas radikalo $UO_3$-; ĝi premisus la element-nomon urano, ne uranio laŭ NPIV; tiu ĉi vortaro ne registras la salnomon uranato, jes troviĝantan en *Portman-Rogers* (1993); multaj lingvoj, ekz. la germana, estas ĉi-rilate pli bonŝancaj: *Uran, Uranat*.



**Verticilo** (*verticillus*), jen tri aŭ pli da folioj, floroj aŭ branĉetoj, kreskantaj ĉirkaŭe el unusola nodo; vertico (zamenhofa laŭ PIV, sed oficiala laŭ NPIV) havas pluron da signifoj geometriaj.

**Vinilo**, laŭ la tradicia (triviala) nomenklaturo, racie estas nomata etenilo $CH_2$=CH-.

Do, jen finiĝis la "parado" de okazoj nefundamentaj, kiuj dokumentas, ke en Esperanto povas homonime koincidi IL radikfina kun sufiksa. Tio estas siaspece ĝojiga, ĉar ĝi konfirmas pravecon de la starpunkto, ke sole pro homonimeco ne estas dezirinde misformi nomenklaturan originalaĵon.

Tamen necesas mencii, ke timo pro la sufikso IL ekzistis, sed en okazoj tre raraj. Ne pretendante pri kompleta traserĉo de la leksiko scienca en Esperanto, mi menciu kelkon da ekzemploj:

**Aglo**, la fundamenta nomo por la rabobirdo kaj same por la konstelacio ekvatora (*Aquila*) estiĝis por eviti la homonimecon kun akv-ilo. Malgraŭ tio, nepre ne estus rekomendinde uzi la fundamentaĵon en okazoj strikte nomenklaturaj. Ekz. *Aegironema aquila*, la fosilia (ordovicia) braĥiopodo, pli eble devus resti **egironomo akvila**. Kun *Aquila* koheras propraj nomoj, ekz Akvilono (NPIV), *Aquilonia, Aquilius, Aquilianus*.

**Fringo**, jen plua birdnomo fundamenta. Laŭ la internacie kodigita nomenklaturo ornitologia, nepre pli ĝusta **fringilo** (*Fringilla*) el la familio fringiledoj (*Fringillidae*), france *fringilidées*, ŝajnis elvoko ĉe nia majstro impreson de la ilo, kvankam li mem neniam lanĉis verbon "fringi" kun signifo hipoteza...

**Mirtelo** (*Vaccinium myrtillus*), t.e. vakcinio iom simila al eta mirto, estas la tria fundamentaĵo. Evidente, la botanika nomo devus havi la formon **vakcinio mirtila** aŭ unuvorte **mirtilo** (fr: *myrtille*).

El **nefundamentaĵoj** meritas atenton "mitulo". Ties oficialigintoj kurioze misformis la nomenklaturan originalon *Mytilus*. La manĝebla marmolusko nomiĝu **mitilo**. Strange, ke por eviti koincidon kun la sufiksa IL, oni riskis la same (sen)danĝeran UL: mit-ulo.

Nenion komunan kun homonimfobio havas la NPIVa "penicilo" anstataŭ la ĝusta **penicilio** (*Penicillium*). Rolas tie manio produkti vortarajn nestojn, ĉi-okaze inventi la radikon penicil/ . Laŭ la tradicia koncepto pri Eo-radikoj, penicilino kaj penicilinazo estas memstaraj, kvankam parencaj kun penicilio (kp. ankaŭ la latinan adjektivon *penicilliformis* = peniketforma).

La planton *Perilla* el lamiacoj, NPIV rebaptis al "periljo", timante koincidon kun per-ilo. Tamen, la hispaneska LJ impresas kurioze: la planto havas nomon ja hinddevenan, estante kultivata krome en Ĉinio, Japanio kaj aliaj landoj aziaj.

**10. IS, ID**

NPIV registras, laŭ nia kalkulo, 35 okazojn kun la radikfina IS. Plej ofte ĝi celas eviti koincidon kun la fundamenta sufikso ID. La radikfina ID estas prava tial, ke la greka kaj latina lingvoj klare preferas **ne** la radikojn nominativajn, sed la genitivajn. Same faras nomenklatura-terminologia praktiko, internacie kodigita. Tamen, kiel oni konstatos pli malsupre, la situacio ne estas tiom simpla, ke eblus ĉiun NPIVan IS anstataŭigi per ID.

**Fundamentaĵon** kun la radikfina IS mi ne trovis, sed NPIV registras du precedentojn zamenhofajn: Pariso kaj Tespiso. Laŭ la ĝenerala procedo de *Zamenhof* en okazoj analogaj, la filo de Priamo kaj la posta amato de Heleno, devus nomiĝi Parido, dum la helena poeto, rigardata kiel kreinto de la teatro, devus porti la nomon Tespido. Tio konformus al la grekaj radikoj genitivaj.

Inter la vortoj **nefundamentaj** oni zorge distingu:

10.1.

En la tria deklinacio latina ekzistas substantivoj, kies nominativo kaj genitivo estas samformaj, ekz. *anguis* (prononcata *angvis*). Ĝia neoficiala ekvivalento esperantlingva estas laŭ NPIV "angviso". Laŭ la nomenklature motivita modelo, pli ĝusta nomo estas **angvo**, ĉar tiu *IS* en la latina ne konsistigas la radikon. Tion oni povas konstati jam dative: *angui*, kie la konsonanto *S* malaperas. Jen kial la zoologoj kodigis la familian nomon *Anguidae* (ne "*Anguisidae*"). Do, en Esperanto, la familinomo estu **angvedoj** (ne "angvisedoj").

Analoga misformaĵo NPIVa estas "aksiso" anstataŭ la ĝusta **akso**. Ja la vertebro, alinome epistrofeo, funkcias kiel vera akso por la pli supra atlanto.

Ankaŭ "feliso" el la sama deklinacio devus fariĝi **felo** el la familio de **feledoj** (*Felidae*), ne "felisedoj", kvankam alportanta la signifon nomenklaturan de felo apud la fundamenta.

Same "kaniso" estu **kano**, familinome **kanedoj** (*Canidae*), nepre ne "kanisedoj"; la homonimeco kun la komuna plantnomo apenaŭ ĝenas.

"Maniso, manisedoj" nepre fariĝu **mano**, **manedoj** (*Manidae*); NPIV eĉ ofertas por la familio "manisuloj"... Nu, ĉu la homonimeco kun la membro (latine *manus*) kaj la sendenta mamulo (latine *Manis*) kapablus konfuziĝi en ajna kunteksto?

Same "perniso" estu **perno**, duvorte **perno apovora** (*Pernis apivorus*), laike vespobuteo.

Same "pieriso, pierisedoj" estu **piero, pieredoj** (*Pieris, Pieridae*); ĉi-okaze la bone konata blanka papilio liveras homonimecon apenaŭ gravan: pi-ero.



Ekstreme enigma restas la NPIVa "Rodiso" por la insulo en Egea maro; ja en la greka originalo *Rodos* kaj la latina formo *Rhodos* **ne** aperas *IS* nominativa, tiom malpli genitiva, do la esperantlingva nomo estu **Rodo**, kiu estas registrita same en NPIV kaj homonime koincidas kun la fundamenta nomo por eksterhavena parto de maro.

Ankaŭ *Semiramis*, NPIVE "Semiramiso" devas esti **Semiramo**, ĉar en la greka genitivo *Semirameos* ne troviĝa *IS*.

Fine al la ĵus traktita vort-kategorio apartenas la medicina nomo koncernanta la vermoforman parton de la cerebelo: *vermis*. La NPIVa misformaĵo "vermiso" devas esti simple **vermo**, apenaŭ konfuzebla ekz. kun lumbriko, tamen elvokanta la ĝustan formon.

10.2.

Tute specialaj okazoj estas la grekaj *Drimys* kaj *Stachys*. Ilia komuna modelo de la greka deklinacio estas *iĥthys* = fiŝo. Ĉar tiu ĉi modelo konservas sian ipsilonon kiel radikparton, oni devas por Esperanto akcepti la radikon iĥti/ : kp. la fundamentan iĥtiokolo kaj pluron da NPIVaj iĥti-vortoj, el kio sekvas ne la NPIVa "stakiso", sed **staĥio**. Tamen, *Drimys* el la familio de *Drimeaceae* eble meritus la nomon **drimeo** aŭ **drimo**, sed nepre ne la NPIVan "drimiso".

10.3.

Alitipan, sed la plej oftan genitivon de la tria latina deklinacio kaj analoge de la greka, prezentas jeno: dum en la nominativo troviĝas *IS*, en la genitivo estas *IDIS*, greke *IDOS*. Jam ĉapitrokomence estas tuŝitaj la grekaj *Paris* kaj *Tespis*.

"Aciso" devas esti **Akido**. Temas pri nomo de la rivereto dekliva de la sicilia vulkano Etno; latine *Acis*, *Acidis*, greke *Akis*, *Akidos*. Same nomiĝis la mitologia paŝtisto, amanto de la nimfo Galateo.

NPIVa barakto inter IS kaj ID estas konstatebla okaze de "Adoniso", la filo de la cipra reĝo kaj **adonido**, la plantnomo. La moderna botanika nomo por la printempa genro estas **adonanto** (*Adonanthe*), dum adonido restas por *Adonis aestivalis*.

"Arabiso" (*Arabis*) devas esperantiĝi per **arabido**.

"Artemiso" (*Artemis*, genitive *Artemidos*). do **Artemido**.

"Baŭcis" en NPIV neasimilita nominativo greka, genitive *Baucidos*, do **Baŭcido**.

"Beliso" (*Bellis*, genitive *Bellidis*), do **belido**, kp. *Arabis bellidifolia* = arabido belidofolia.

"Berberiso" (*Berberis, Berberidaceae*): **berberido**, **berberidacoj**.

"Brizeis", ree neasimilita (*Briseis, Briseidos*), **Brizeido**, la amatino de Aĥilo.

"Dafniso" (*Dafnis*, genitive *Dafnidos*), do **Dafnido**, la sicilia junulo, dia filo.

"Daktiliso" (*Dactylis*, laŭ la greka *daktylos* = fingro; la latina specimeno *dactylides* = fingreca), do **daktilido**.

"Epuliso" (*epulis, epulidis*), do **epulido**, la benigna tumoro inter dentoj.

"Krizeis" (*Ĥryseis, Ĥryseidos*), **Ĥrizeido**, la sklavino de Aĥilo.

"Jaspiso" (*iaspis, iaspidis*), do **jaspido**.

"Lapiso" (*lapis, lapidis*), do **lapido**, kohere kun **lapidara** (NPIV).

"Oziriso" (*Osiris, Osiridos*), **Ozirido**, la egipta dio.

"Sifiliso" (*syphilis, syphilidis*), **sifilido**, nomita laŭ *Syphilus*.

"Temis", ree neasimilita, **Temido**, la helena diino de justeco.

"Tetiso": **Tetido**. Laŭ NPIV 1. patrino de Aĥilo, 2. mardiino. Al tio necesas mencii, ke la saman nomon ricevis la pramaro, ekzistanta ekde paleozoiko ĝis paleogeno. NPIV neglektis tiun ĉi gravegan nomon geologian.

"Tigriso": **Tigrido**, la rivero mezopotamia.

"Zeŭksiso": **Zeŭksido**, la helena pentristo.

Okazokapte: Kiel kvalifiki la NPIVan "sistemon" de formoj asimilitaj (ekz. "Artemiso") apud la neasimilitaj (ekz. "Baŭcis", tiu ĉi eĉ kun Ŭ, kiu ne troviĝas en la helena originalo; krome, la edzo de Baŭcido estis Filemono laŭ NPIV. Do, la edzon oni asimilis, la edzinon ne. Kie la egalrajteco?

10.4.

Atenton meritas ekzisto de **fundamentaĵoj**, bazitaj sur la radiko genitiva:

**Aspido** (originale *Aspis*), do ne "aspiso".

**Taŭrido**, ne "Taŭriso", estas zamenhofa, laŭ NPIV.

Ankaŭ da (ne)oficialaj ID-vortoj devenantaj el fontlingvaj IS-vortoj estas konsiderinda nombro, kiu levas pravan demandon pri enigma kriterio, iganta NPIVon foje elekti IS-formon, foje ID-formon: afido (*Aphis, Aphididae*), afidedoj, ne "afisedoj" laŭ la pluraj precedentoj NPIVaj, agrostido (*Agrostis*), amarilido (*Amaryllis, Amaryllidaceae*), ne "amarilisacoj" laŭ la NPIVa precedento "berberisacoj", sed ĝuste amarilidacoj, amirido (*Amyris*), antemido (*Anthemis*), antilido (*Antyllis*), arakido, pli ĝuste araĥido (*Arachis*), askarido (*Ascaris*), Atlantido (*Atlantis*), Aŭlido (*Aulis*), celtido (*Celtis*), dorido (*Doris*), Eneido (*Aeneis*), epakrido (*Epacris*), erantido (*Eranthis*), fizalido (*Physalis*), Forido (*Phoris*), hamamelido (*Hamamelis*), hipurido (*Hippuris*), izatido (*Isatis*), karotido (greke *karotis*), kaŭkalido (*Caucalis*), klamido, pli ĝuste ĥlamido (*Chlamys*), klematido (*Clematis*), kobitido (*Cobitis*), krepido (*Crepis*), kuspido (*cuspis*), liknido, pli ĝuste liĥnido (*Lychnis*), mirido (*Myrrhis*), nefrolepido (*Nephrolepis*), nereido (*Nereis*), oksalido (*Oxalis*), orkido, pli ĝuste orĥido (*Orchis*), otido (*Otis*), piramido (*pyramis*), pterido (*Pteris*).



Komparante tiujn ĉi ID-formojn kun la antaŭe traktitaj IS-formoj, oni ne povas eviti la konkludon, ke NPIV prezentas al la scienca publiko nomenklaturon apenaŭ planlingvan…

Fine ankoraŭ estu mencio, ke tri NPIVaj IS-formoj devas traktiĝi alimaniere:

"Eleŭziso" (*Eleusis*, genitive *Eleusinos*) la helena vilaĝo apud Ateno, devas esti **Eleŭzino**.

"Loriso" (*Loris, Lorisidae, Lorisinae*) devas esti **lorizo**, **lorizedoj**, **lorizenoj**, ĉar temas pri *S* intervokala, kiu en Esperanto fariĝas Z (kp. Eleŭzino).

"Salamiso" (*Salamis*, genitive *Salaminos*) devas esti **Salamino**, la historie fama helena insulo.

## 11. IV

En NPIV legiĝas: "Suf. montranta, ke iu aŭ io povas, kapablas fari ion (aktiva ideo responda al la pasiva ebl)". La antaŭa PIV asertis, ke la sufikso estas "neoficiala", dum PAG (1980, p. 466), ke temas pri "neoficiala sufiksoido"; aliflanke, prave PAG (p. 477) parolas pri "pseŭdo-sufiksoido", do radikparto IV en ekzemploj jenaj: nominativo, indikativo, defensivo, ofensivo, efektiva k.t.p. Interesaj estas okazoj de homonima koincido inter IV sufiks(oid)a kaj IV radikfina, analoge, kiel estis en la ĉapitroj antaŭaj.

Inter la **fundamentaĵoj** troviĝas jena oko:

**Adjektivo**, la latina verbo *adicere*, etimologie identa kun la esperantlingva adicii, origine signifas "alĵeti", do adjekto estas "alĵetaĵo". Certe ne perdiĝu tempo por solvi la gramatikan rebuson de la vorto adjekt-iva.

**Aktiva**. Same oni ne cerbumu, kion povus signifi eventuala verbo "akti", apartena al la oficialaĵo: akto.

**Dativo**. Male, bonorde ekzistas la transitiva verbo dati, do dat-iva signifus: kapabla indiki daton…

**Efektiva**. Laŭ PIV, la verbo efekti estas netransitiva, sed ĉu la adjektivo efekt-iva signifu: efektopova?

**Genitivo**. Jen bela komplikaĵo por ĉiu, kiu suferus pro homonim-fobio. NPIV registras la radikon gen/ kaj la "sufikson" (laŭ mi nepre pseŭdosufikson, do radikparton) –gen/ , tiun eĉ kun du diversaj signifoj. Tamen, ĉu geno, la hereda elemento, povas verbiĝi? Se jes, kiusence? Kaj: kombini sufikson pasivan IT kun la aktiva IV estus absurde. Nu, mi rememorigu la eksterordinare paciencan leganton al la supre menciita PAGa "pseŭdosufiksoido" = radikparto. Ŝajnas, ke NPIV tute perpleksigis la nocion de radiko en Esperanto.

**Konservativa**. Analoga absurdaĵo estus ankaŭ ĉi-okaze kombini AT-IV.

**Masivo** bone elvokas amasigon de maso, kvankam verbo "masi" apenaŭ estas renkontata.

**Olivo** (*Olea*), la utilega oleoriĉa frukto de arbo, meritanta la internacie kodigitan nomon **oleo** el la familio de **oleacoj** (*Oleaceae*), apenaŭ povus iel koneksi kun la fundamenta konjunkcio: ol. Tamen, NPIV registras ne la botanikan nomon de la arbo, t.e. "olivarbo" = genronome **oleo**. Tiom malpli ĝi registras la nomon familian: **oleacoj**, kvankam de plantnomoj apenaŭ popularaj ĝi ne preterlasas la okazon. Ĉu tiom fortas la timo antaŭ la homonimeco inter la grasa likvo kaj la utilega arbo?

Pri la **nefundamentaĵoj** mi estu pli konciza: ja ripetiĝas analogeco kun la fundamentaĵoj.

**Adventiva**, la termino botanika, etimologie koheras kun la tempo antaŭkristnaska.

**Agresiva**, laŭ NPIV zamenhofa, estas iom malfacile distingebla de agresema.

**Akreditivo**. Laŭ NPIV ekzistas la zamenhofa transitiva verbo akrediti.

**Akuzativo**, **alternativo**, **aperitivo**, senkomentaj.

**Arkivo**. Laŭ la fontlingva kaj fundamenta fonetikoj, mi voĉdonus por **arĥivo**: ja ĝi devenas de la latina *archivum* kaj tiu ĉi de la greka *arĥe* = komenco. Alian etomologion havas **arko**, latine *arcus*.

Konfuzi la grafemojn-fonemojn Ĥ kaj K signifas krom aliaj ĝenoj kreadon de superfluaj homonimoj en la sfero terminologia.

**Aviv(ad)o** el EB (1988) mankas en NPIV.

**Demonstrativo**, **detektivo**, **direktivo**, **diskursivo**, **durativo**.

**Ekzekutivo** kunportas homonimon nedezirinde amaran: ekzekut-ivo.

**Faktitivo**, **fakultativo**, **finitivo**, **gingivo**, **incizivo**, **iniciativo**, **indikativo**, senkomentaj.

**Injektivo** = speco de parolsono, injekti (zamenhofa) estas verbo transitiva, do injekt-ivo estus kapabla enŝprucigi likvon...

**Intesiva**, **interpozitivo**, **karminativo**, **komparativo**, **kompletiva**.

**Konektivo**, la mezenĥima histo, homonimas kun kapablo konekti. En ekz. mikologia terminologio oni renkontas la epiteton *connectivus*.

**Kooperativo**, kultivi, sen komento.

**Kursivo**. Se NPIV allasas la netransitivan verbon "kursadi", oni devus premisi ankaŭ la same netransitivan "kursi"...

**Lokativo**, **motivo**, senkomentaj.

**Objektivo**, jen plejado da nocioj diversfakaj...

**Optativo**, **paliativo**, **partitivo**, **pasiva**, **perspektivo**, **pozitivo**, **predikativo**, **primitiva**, **progresiva**, senkomentaj.



**Prospektivo**, la scienco etimologie koheras kun prospekto...

**Radioaktiva**, **recesiva**, **recitativo**, **refleksivo**, **relativa**.

**Respektiva**, jen tri homonimoj konsiderinda diverssencaj: re-spekt-iva, respekt-iva, respektiv-a.

**Retrospektivo**, **rilativo**, senkomentaj.

**Salivo**, kvankam iom salhava (malforte alkala), liveras la homonimecon sal-iva, t.e. kapabla meti salon ekz. supen. Ŝerce dirite: gastej-kuiristo emas esti tro "sal-iva", por ke la gastoj mendu pli da biero...

**Sedativo**, **sensitivo**, **solivo**, **spekulativa**, **stativo**, **subjektiva**, **transitiva**, **vokativo**, **volitivo**, senkomentaj.

Jen ni superrigardis iujn okazojn de teorie aŭ praktike ebla koincido, kiun liverus radikfina kaj (pseŭdo)sufiks(oid)a IV. Tamen mi volonte konstatas, ke NPIV nenial provis – pro tiaspeca koincido – misformi ajnan el la listigitaj vortoj. Tio estas laŭdinda, nur domaĝe, ke same oni ne procedis en okazoj aliĉapitraj.

## 12. KS

Per jena, jam dekdua ĉapitro. estu atento pri Eo-vortoj, kiuj originas el la tria latina deklinacio, speciale el jenaj tipoj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| nominative | *pax* | genitive | *pacis* |
| " | *index* | " | *indicis* |
| " | *calix* | " | *calicis* |
| " | *vox* | " | *vocis* |

Ni vidas, ke la genitiva radiko ĉiam havas la konsonanton *C* anstataŭ *X* en la radiko nominativa. Tamen, okaze de *EX*, la genitiva ŝanĝo tuŝas eĉ la vokalon: *IC*. Ĝuste tiu ĉi tipo interesas nin, enkadre de naturscienca nomenklaturoj, unuavice. Por Esperanto sin proponas kvar ebloj:

- EKS apogata sur la radiko nominativa,
- IC sekvanta la pli produktivan radikon genitivan,
- IK same laŭ genitivo, sed fonetike adaptita.
- **Nudaj** radikoj, t.e. post forigo de la finaĵoj, ĉu nominativa ĉu genitiva.

Nu, EKSaĵon **fundamentan** mi ne sukcesis trovi... Tamen, da **nefundamentaj**, NPIV povas oferti multon. Prave ili estu kritikendaj:

"apekso" (*apex, apicis*) fariĝu **apiko**, ĉar la botanikaj speci-epitetoj *apicalis* kaj *apiculatus* klare pledas por la formo genitiva, kaj ĉar ekzistas ankaŭ la NPIVaĵo **apika** = krude vertikala;

"demodekso" (*Demodex*), la parazita akaro, meritas esperantiĝi **demodiko** kaj la koncerna mamul-malsano **demodikozo** (ne "demodeksozo" laŭ NPIV);

"haruspekso" (*haruspex*), la etruska, poste oldromia pastro, kiu divenadis estontecon el best-internaĵoj, estus **haruspiko**; ja la germana pluralo estas formita laŭ la latina *Haruspizes*, la koncerna "arto" estas latine *haruspicina*, ĉeĥe *haruspictví*, germane *Haruspizin*;

"ibekso", la alpa kapro, ĝuste **ibiko**, sendanĝere koheras kun la helena poeto *Ibikos*;

"karekso" estu nepre **karico**; jen du botanikaj speci-epitetoj *caricifolius*, *caricinus* kaj unu fitocenologia ordo *Caricetale*, en Esperanto **karicofolia**, **karic(ec)a**, **karicetalo**; aliflanke **kariko** (*Carica*) el **karikacoj** (*Caricaceae*), laike melonarbo, liveras melonsimilajn berojn, la t.n. papajojn;

"kodekso": jen ni rimarkigu, ke la same NPIVa **kodicilo** demonstras produktivecon de la formo genitiva: temas ja pri diminutivo el *codex*;

"kortekso" estas fare de NPIV io alia ol **kortiko**, jen distingo tre kurioza, spitanta la internacian medicinan uzon, kiu respektas la radikon genitivan; kortikoterapio, kortikotropa, kortikostimulatoro k.t.p.; ekz. neŭrofiziologo distingas inter procesoj kortika kaj subkortika (cetere kp. ankaŭ mian traktaĵon el 2003);

"kvadruplekso" (kp. ankaŭ kun alia NPIVaĵo "dupleksa") estu **kvadrupliko** (kp. ekz. kun la zamenhofa **duplikato**);

"murekso", la gastropodo, devus esperantiĝi **murico** (latine *Murex*, itale *múrice*) kaj la familio **muricedoj** (*Muricidae*);

"rumekso" (*Rumex*) el poligonacoj estu **rumico**, kohere kun la specia epiteto *rumicifolius* = **rumicofolia** kaj kun la fitocenologia **rumiciono**;

"ulekso" el fabacoj estu **ulico**, kohera kun la specia epiteto *ulicinus* = ulic(ec)a.

Tamen, mi devas konfesi, ke iuj EKSaĵoj ne meritas riproĉon. Ekz. indekson oni ne konfuzu kun indico, komplekson kun komplico kaj kompliko, polekson kun la fundamenta polico, kvankam la latina *pollex*, genitive *pollicis*, italiĝis *pollice*, distinge de polizia!

Aliflanke, la genitivan tendencon subtenas silico (latine *silex*, *silicis*), vertico (*vertex*, *verticis*), kohera kun verticilo, vortico, la fundamentaj pumiko, soriko kaj siliko, tiu ĉi kohera kun silikato, silikono, silikozo. En ĥemio, ĥemia teĥnologio, mineralogio, petrologio kaj biologio svarmas multaj internacie kodigitaj terminoj barakte inter IC kaj IK: silica ĝelo, siliceoj (spongoj), *siliceus* = botanika speci-epiteto, silicido, silicigi, silicikolaj organismoj, silicito, silikatigo, silikofito, silikoflagelatoj, silikoapatito, silikoborokalcito, silikoilmenito, silikomagneziofluorito, silikomonazito, silikotelito k.a., ĉiuj derivitaj el la latina genitivo.

Finante la parton pri la latinaj *EX*-vortoj, mi tuŝu la supre menciitan eblecon de nudaj radikoj. Kiel modelo servu jenaj tri **fundamentaĵoj**: *Atriplex* = atriplo, *Culex* = kulo, *Cimex* = cimo. Nu, tiu ĉi procedo, pro sia rezulta



koncizeco, taŭgas pli eble por uzo laika. Nomenklature nepre taŭgus **atriplico**, ĉar la specia epiteto *atriplicifolius* logus al **atriplicofolia**, **kulico** kaj **kulicedoj**, ĉar la familio estas latine *Culicidae*, kaj **cimico** kaj **cimicedoj**, ĉar la latina familio estas *Cimicidae*. Krome *Cimicifuga* = **cimicofuĝo**, planto kontraŭcimica. Ja kohereco estas premiso de sciencaj procedoj, dum el NPIV neniu divenus konekson inter "cimo" kaj "cimicifugo". La nomenklatura logiko estu konservenda.

Jen ĉio, kion mi deziris diri pri la vortoj, kies latinaj originaloj finiĝas per *EX*, do eblas transiri al tiuj, kiuj finiĝas per *IX*.

Atendeble, vane ni serĉus tiajn inter la **fundamentaĵoj**. Ne apartenas tien ĉi la greka *onyx*, genitive *onychos*, do onikso restas ekster niaj riproĉoj. Tamen zamenhofa, laŭ NPIV, estas bombikso (*Bombyx*); tiu ĉi formo ne koheras kun la latina famili-nomo *Bombycidae*, kun la birdogenro *Bombycilla* kaj kun la botanika speci-epiteto *bombycinus* = silk-laneca. Sendube por la biologiaj nomenklaturoj pli bonorda situacio ekestus pro **bombico**, **bombicedoj**, **bombicilo** (jes en NPIV) kaj fine **bombic(ec)a** (por la botanikaj specioj).

Aliflanke, rebapti Felikson al "Felico" estus nekonvene, Male, "helikso" por la orelparto, se nomenda **helico**, certe ne konfuziĝus kun la terminoj geometriaj aŭ teĥnikaj. Al la helic-aĵoj ni revenos ankoraŭ pli poste.

Sekvu "kalitrikso", la malgranda simio, kiu en Esperanto meritas la nomon **kalitrico** (*Callithrix*) el **kalitricedoj** (*Callithricidae*).

Nian genitiv-radikan starpunkton subtenas NPIVaj ICaĵoj. Ne tuŝas nian konsideron la unusola ICa fundamentaĵo adventico, ĉar ĝi ne devenas de *IX*: *Tunica adventitiae*. El la **nefundamentaj** mi elnombru apendicon kaj la oficialan helicon. Tiu ĉi jes interesas nin tre, ĉar ĝi ŝajnas konveni ĉial. Laŭ NPIV ĝi esprimas unu nocion geometrian kaj du nociojn teĥnikajn. Al la tri signifoj eblus aldoni la pli supre menciitan, nome tiun de la "helikso" orelanatomia. Fine, la zoologoj probable ne hezitus uzi **helico** ankaŭ por la gastropoda molusko, tiom pli eble, ĉar la koncerna familio estas nomata latine *Helicidae*, do **helicedoj**. La kohero etimologia inkludas ankaŭ la genron *Helicella* el la familio *Hygromiidae*. Fine la geometriaĵo **helicoido** (NPIV) kompletigus la planlingvan impreson.

La elnombradon ni daŭrigu per direktrico kaj matrico. Tiu ĉi estas zamenhofaĵo (laŭ NPIV). Meretrico apenaŭ interesos natursciencan nomenklaturiston…

Kaj nun, kiuj latinaj originaloj fariĝis en Eo la IKaĵoj?

Da **fundamentaĵoj** ekzistas sepo:

filiko (*filix*) apud la speci-epiteto *filicifolius*, *filiciformis* kaj *filicinus* pli eble devus fariĝi "filico", se ne temus pri la fundamenta kaj bone establita nomo. Cetere, la scienca genronomo estas **driopterido** (*Dryopteris filix mas*), dum

la subklasnomo *Filices*, klaso filikopsidoj (*Filicopsidae*) pravigas la fundamentan formon de filiko;

histriko (*Hystrix*, familio *Hystricidae*) eble meritus, por la nomenklatura uzo, eĉ devus fariĝi **histrico** kaj ĝia familio **histricedoj**;

kaliko (*calix* aŭ *calyx*) bone koheras ekz. kun kalikanto (*Calycanthus*), neregistrita en NPIV;

mastiko (*mastix*), mastiki (france *mastiquer*);

perdriko (latine *Perdix*, hispane *perdix*), por scienca uzo fariĝu **perdiko** (la perdika viando latine nomiĝas *perdicalis*);

radiko (*radix*) liveras plejadon da speci-epitetoj: *radicalis, radicans, radicantissimus, radicatus, radicosus, radiculatus*;

saliko (*Salix*), jen la lasta fundamentaĵo, genitive kreita el la latina *IX*-nomo; sed NPIV registras ankoraŭ unu zamenhofaĵon: cerambiko (*Cerambyx*), la koleopteron el *Cerambycidae*, do ŝajnas, ke nomenklature pli konvenus **cerambico** kaj **cerambicedoj**.

El la **nefundamentaj** NPIVaĵoj genitiv-radikaj mi tuŝu:

cerviko (*cervix*): por la IK-formo pledas ankaŭ la latina adjektivo *cervicalis* (prononce kun k), ekz. *glandulae cervicales* = cervikaj glandoj;

heliko por la uzo nomenklatura devus fariĝi **helico** kaj **helicedoj**, kiel ni menciis pli supre;

korniko (*cornix*) el korvedoj: la latina lingvo havas ankaŭ la diminutivon *cornicula* = korniketo; la etimologia konekso kun korno (*cornu*) estas evidenta;

lariko (*Larix*) el la subfamilio de larikoideoj (*Laricoideae*);

skandiko (*Scandix*) el apiacoj: la latina verbo *scandere* = grimpi, ja la planto emas apogi sin sur najbaraj arbustaĵoj;

spadiko (*spadix*), la spikforma infloresko;

tamariko (*Tamarix*) el tamarikacoj (*Tamaricaceae*);

tortriko (*Tortrix*) nepre fariĝu **tortrico**, nokta papilio el **tortricedoj** (*Tortricidae*).

Tute aparta okazo estas la NPIVa "verniso", kiu apogas sin sur la franca *vernis*. Al ni ŝajnas, ke pli mature estus, apogi la nomon sur la latina *vernix*, genitive *vernicis* aŭ sur la itala *vernice*, do **vernico**. Temas ja pri la tipa *IX*-nomo.

Nun venas vico de la *AX*-nomoj:

Iliaj AKS-formoj ne troviĝas inter la **fundamentaĵoj**. Tamen, laŭ NPIV, zamenhofa estas antrakso. La greka *anthrax*, genitiva *anthrakos* kaj latine *antracis*, liveris plejadon da terminoj derivitaj el la radiko genitiva: antraceno, antracito, antrakobionto, antrakogramo, antrakofila, antrakonito, antrakokseno, antrakozo k.t.p., inter kiuj klare dominas la AK-formoj. Do, por uzo scienca, preferinda estas antrako. Registrante antrakozo apud "antrakso", NPIV demonstras malemon al planlingva scienca leksiko...



AC-formoj **fundamentaj** ekzistas:

minaci (*minax*, genitive *minacis*);

sagaca (*sagax, sagacis*).

La **nefundamentaj**:

aŭdaci (*audax, audacis*);

tenaca (*tenax, tenacis*).

La **nefundamentaj** AK-formoj:

bombako (*Bombax*), bukorako (*Bucorax*), korako (*corax*) kun pirokorako (*Pyrrhocorax*), limako (*Limax*), kiun ni emus nomenklature modifi al **limaco**, familie **limacedoj** (*Limacidae*), panako (*Panax*), smilako (*Smilax*), nomenklature pli ĝuste **smilaco** (kohera kun *smilacifolius, smilacinus*), stirako (*Styrax*), kiu devus cedi al **stiraco** (*Liquidambar styraciflua* = likvidambaro stiracoflua, storako (*storax*) kaj torako (*thorax*). Jen klara NPIVa prefero de la radikoj genitivaj, kun kiuj kontrastas misaj AKS-formoj:

"borakso" ne harmonias kun la genitiv-forma mineralnomo **boracito** neregistrita en NPIV;

"klimakso" (greke *klimax*, genitive *klimakos* = ŝtuparo) devus esti **klimako**, kohere kun klimakterio;

"krakso" (*Crax*) devas esti **kraco** el **kracedoj** (*Cracidae*).

Restas pritrakti nomojn devenintajn el la latinaj OX-nomoj. La nominativajn OKS-formojn ni ne trovis. Ekz. stomokso el *Stomoxys* kaj tokso el *toxinum* havas nenion komunan kun la deklinacia modelo *vox, vocis*. Al la OC-formoj apartenas feroca (*ferox, ferocis*), al la OK-formoj la fundamenta ezoko (*Esox*), tre bone utiligebla en la sfero laika, dum la nomenklatura sendube preferus **ezoco** el **ezocedoj** (*Esocidae*) kaj ordo **ezocoformaj** (*Esociformes*).

Laste ni tuŝu nomojn devenintajn el la latinaj *UX*-nomoj. La nominativa formo ekzistas en la fundamentaĵo nukso, certe bonege servanta komunuze, dum en la sfero scienca planlingve impresus **nuco**, kohera kun **nucifrago** (*Nucifraga*) = "nuksorompulo" kaj kun la botanika speci-epiteto *nuciferus* = "nuksoporta". Aliflanke, la fundamenta kruco kun krucifikso, kun la speci-epitetoj *cruciatus, crucifer, cruciformis, cruciger*, kun la genronomo *Crucianella* k.t.p. bone dokumentas la produktivecon de la radiko genitiva.

La nefundamenta "halukso" registrita en NPIV, kvankam taŭga por uzo laika, science devus nomiĝi haluco; ja genitiv-radika estas ankaŭ la itala *alluce*. Same "Polukso", la fama pugnobatalanto, la frato de Kastoro, estu Poluco.

El la **fundamentaj** UK-formoj estu menciita duko (latine *dux*).

Resumante la ĉapitron, ni povas ĝoje konstati, ke la genitiv-radikaj formoj konsiderinde superregas la nominativ-radikajn, antaŭ kiuj necesas averti perspektivajn aŭtorojn de sciencaj vortaroj. Tiamaniere ili garantios la planlingvan trajton de Esperanto.

## 13. OL, UL

Jen alia problemo: la radikfina UL, koincidanta kun la sufiksa UL, ofte logas al misformado per OL, sed foje kondukas al aliaj solvoj, kiel ni vidos pli poste. Ĉar foje restas la nemisformita UL, generiĝas leksika ĥaoso, plej bedaŭrinda en okazoj nomenklaturaj.

La situacion ni demonstru helpe de **fundamentaĵoj**:

Fenkolo (*Foeniculum*), frangolo (*Frangula*), karbunkolo (*carbunculus*), kukolo (*Cuculus*), kupolo (*cuppula*), lupolo (*lupulus*), muskolo (*musculus*), orakolo (*oraculum*), pilolo (*pilula*), pirolo (*Pyrrhula*), popolo (*populus*), primolo (*Primula*), ranunkolo (*Ranunculus*), regolo (*Regulus*), skapolo (*scapula*), skatolo (*scatula*), skrofolo (*scrophula*), titolo (*titulus*).

Tamen, same **fundamentaj** estas:

Angulo (*angulus*), betulo (*Betula*), fistulo (*fistula*), gratuli (*gratulari*), inokuli (*inoculare*), insulo (*insula*), kalkulo (*calculus*), kapsulo (*capsula*), makulo (*macula*), postuli (*postulare*), spegulo (*speculum*), tabulo (*tabula*).

Kaj nun ni komparu, ĉu – enkadre de la fundamenta leksiko – minacis koincido inter UL radikfina kaj sufiksa, por pravigi la misformadon helpe de OL: kuk-ulo, kup-ulo, lup-ulo, pop-ulo, reg-ulo? En aliaj, supre elnombritaj okazoj ĝi ne minacis kaj tamen ili havas la OL-formojn. Aliflanke, bet-ulo, grat-ulo, kalk-ulo, ok-ulo kaj post-ulo ne embarasis, kvankam generantaj ia koincidon. Jen enigmo…

Memkomprene, la koincido, kvankam neglektebla, konsiderinde pliiĝas kun la kreskado de la vorttrezoro nefundamenta, kiun nepre postulas la moderna lingvo, uzata en diversaj hom-aktivadoj. Ekz. la fundamenta pirolo poste kreis superfluan homonimecon: por *Pyrrhula* ja povus resti **pirulo**, sed por *Pirola* taŭgas **pirolo**, mem homonima kun la heterocikla kombinaĵo.

Parenteze: pop<u>o</u>lo, jes bonege servanta fundamentaĵo, aspektas nekohere kun la nefundamentaj pop<u>u</u>lacio kaj pop<u>u</u>lara…

Kaj: ĉu la fundamenta regul-o ne timis homonimecon kun reg-ulo, samtempe timante tiun kun la birdo *Regulus*, do misforminda al regolo?

Aŭ: skatul-o koincidas kun la zamenhofa skat-ulo, ĉar skato estas germana kartludo, sed misformita per OL ĝi poste homonimiĝis kun skatolo = 3-metil-indolo… Jen kiel dubinda procedo estas evitado antaŭ homonimoj.



Fine: skrof<u>o</u>lo, al kiu tute ne minacis koincido kun la normala UL-formo, nun malkoheras kun skrof<u>u</u>lario, la planto kuracanta ĝuste la skrof<u>u</u>l(oz)on…

Bedaŭre, da **nefundamentaj** OL-formoj "elkoviĝis" abunde:

"Ampolo" (*ampulla*), "drakunkolo" (*dracunculus*), "ferolo" (*Ferula*), "galinolo" (*Gallinula*), "garolo" (*Garrulus*), "granolo" (*granula*), "medolo" (*medulla*), "ovolo" (*ovulum*), "primolo" (*Primula*), "ranunkolo" (*Ranunculus*), "rapunkolo (*rapunculus*), "rubekolo" (*rubecula*), "strangoli" (*strangulare*), "tinunkolo" (*tinnunculus*), "tragolo" (*Tragulus*), "ungolo" (*ungula*).

Bonŝance, NPIV jes registras ankaŭ la nomenklaturajn UL-formojn. Lokoŝpare mi menciu almenaŭ pingvikulo (*Pinguicula*), kvankam EB (1988) misformis ĝin al "pingikolo". Tamen, ĝuste la nekonsekvenco de NPIV fortimigas la biologojn, medicinistojn k.a.

La nomenklatura ĥaoso estas potencata per alia procedo, evitanta la originalan UL-formon, ĉu okaze de iuj fundamentaj, sed precipe de ceteraj nomoj: la radikfina U estas simple eliminata:

"aŭriklo" (*auriculus*), "furunklo" (*furunculus*), "infundiblo" (*infundibulum*), "karbunklo" (*carbunculus*), "karunklo" (*caruncula*), "klaviklo" (*clavicula*), "koliklo" (*colliculus*), "kuniklo" (*cuniculus*), "kutiklo" (*cuticula*), "lodiklo" (*lodicula*), "mandiblo" (*mandibula*), "pediklo" (*pediculus*), "perpendikla" (*perpendicularis*, kp. kun la zamenhofa perpendikulara), "poplo" (*Populus*), "radiklo" (*radicula*), "receptaklo" (*receptaculum*), "retinaklo" (*retinaculum*) – tiun ĉi kp. kun la NPIVa retik<u>u</u>lo (*reticulum*) – "saniklo (*Sanicula*), "tabernaklo" (*tabernaculum*), "tentaklo" (*tentaculum*), "trabeklo" (*trabecula*), "utriklo" (*utriculus*), "versiklo" (*versiculus*).

Kiom senpripensa estas tiu ĉi procedo, ekzemplu "foliklo" (*folliculus*), kiu malkoheras kun la NPIVa **folikulino** kaj kun la medicina (*Yamazoe*, 1995) folik<u>u</u>lito, pli ĝuste **folikulitido** (*folliculitis*, genitive *folliculitidis*). Eĉ pli kurioze impresas la provo distingi helpe de la du procedoj: "aŭriklo" koncernas la planton (*Primula auricula*), sed "aŭrikulo" la moluskon (*Auriculus*). Tia malsistemeco ne garantias bonan reputacion de neŭtrala planlingvo. Tiom malpli ĝi donas konsilon ekz. al botanikisto aŭ zoologo, verkanta en Esperanto.

Tute esceptaj nomoj, dokumentantaj eviton de la radikfina UL, estas la oficiala "lavendo" (*Lavandula*) kaj la fundamentaj libelo (*Libellula* el *Libellulidae*), merlo (*merula*), monedo (*Monedula*) kaj fine pediko (*Pediculus* el *Pediculidae*). Sendube ili bone servas por uzo laika, dum la nomoj sciencaj estu **lavandulo** (ankaŭ registrita en NPIV), **libelulo** el **libeluledoj**, **merulo** = turdo merula, **monedulo** kaj **pedikulo** el **pedikuledoj**.

### 14. OR

Ĉi-okaze temas pri pseŭdosufiksoido, do radikparto. Laŭ PAG (1980, 477) *Migliorini* eĉ proponis fari el OR sufiksoidon kun la signifo: maŝino. En lia propono mi vidus apenaŭ avantaĝon por la Esperanto-leksiko (*Kavka*, 1984, 1986). Ideon similan al tiu de *Migliorini* havis ankaŭ pliaj terminologoj, sed mi ne ŝarĝu la kadron de jena ĉapitro per tro multe da referencoj. Memkomprene, mi estus tre distanca de timo antaŭ homonimeco, se tamen oni trudus OR kiel sufiksoidon, negrave kun ajna signifo. Fine meritas aludon, ke OR mem estas fundamenta radiko, la nomo de la ĥemia elemento. Eble oni emus rideti pro koncernaj homonim-okazoj, sed kiam estis akre disputate pri komputILo aŭ komputORo, unu el la "gravaj" argumentoj kontraŭ komputoro estis la timo, ke komput-oro povus signifi salajron por komputado. La aŭtoron, kiu estis subjekto de tiu ĉi homonim-fobio, mi prefere ne nomu, por ne denove lin embarasi.

Okupante nin pri OR-vortoj, ni ja inkludu ankaŭ da ATOR-vortojn (PAG, 477) kaj ADOR-vortojn (EB, 1998, 676). En la unuaj aperas krome la homonimeco particip-sufiksa, en la duaj ag-sufiksa, eĉ apart-radika, nome pro la fundamenta verbo: adori.

Antaŭ ol elnombri la unuopajn nomojn, estu al mi permesate apliki jenajn du mallongigojn: f = fundamenta, z = zamenhofa.

Jen la OR-vortoj **fundamentaj**:

1. aŭtoro. Ĉu laŭ la plej supre menciita propono ĝi signifu ankaŭ maŝinon por fabriki aŭtojn? Certe, plu mi rezignu pri ŝercaĵoj.
2. doktoro: dokta = klerega.
3. doloro; dolo = jurscienca termino.
4. humoro; humo (z).
5. kantoro; kanti (f).
6. kaporo; kapo (f). Anstataŭ "kaporo", la scienca nomo estas kaparido (*Capparis*) el kaparidacoj (*Capparidaceae*).
7. kastoro; kasto.
8. koloro; kolo (f).
9. kontoro; konto.
10. laboro; labo = anatomia termino.
11. likvoro; likva.
12. memoro; mem (f).
13. odoro; odo.
14. pulvoro; pulvo (f).
15. putoro; puto (f). La scienca nomo estas **putorio** aŭ mustelo putoria (*Mustela putorius*)
16. redaktoro; tutcerte ne maŝino por redakti.
17. sonori; soni (f).
18. tajloro; tajli.
19. valoro; valo (f).



20. aŭroro; aŭro = medicina termino.
21. numeratoro; numero (f).

Sed nun sekvu la OR-vortoj oficialaj

22. aktoro; akto.
23. aligatoro; ĉu al-ig-at-oro?
24. amatoro; ami (f).
25. ambasadoro; ambasado.
26. diktatoro; dikti (f).
27. direktoro; direkti (f).
28. Ekvadoro; ekvo (*Equus*).
29. ekvatoro; same.
30. furoro; furo = albino de putorio.
31. inspektoro; inspekti.
32. konduktoro; kondukti.
33. kreditoro; kredi (f), kredito.
34. majoro; majo (f).
35. matadoro; mato.
36. mentoro; mento (f).
37. meteoro; meteo?
38. motoro; moto (z).
39. oratoro; oro (f).
40. radiatoro; radio (f).
41. retoro; reto (f).
42. rigoro; rigi (z) = marista termino, Rigo.
43. sektoro; sekto.
44. tenoro; teni (f).
45. teroro; tero (f).
46. toreadoro; torei.
47. traktoro; trakti (f).

Kaj jen la OR-vortoj neoficialaj:

48. agoro; agi (f).
49. akumulatoro; akumuli.
50. amoro; ami (f).
51. Andoro; Andoj.
52. aŭditoro; aŭdi (f).
53. debitoro; debito (z).
54. dekoro; dek (f).
55. depresora; presi (f).
56. detektoro; detekti.
57. devori (PIV); devi (f), vori.
58. dilatatoro; dilati.
59. ekscitatoro, eksciti (f).
60. ekstensoro; ekstensi.

61. fazoro; fazo.
62. fetoro; feto.
63. fleksoro; fleksi (f).
64. fluoro; flui (f).
65. fulgoro (*Fulgora*); fulgo (f).
66. generatoro; generi.
67. Gregoro; grego.
68. hororo; horo (f).
69. induktoro; indukti.
70. injektoro; injekti (z).
71. komodoro; komodo (f).
72. Komoroj; komo (f).
73. kompresoro; kompreso (f).
74. kondensatoro; kondensi.
75. kondensoro; same.
76. kontaktoro; kontakto.
77. konvertoro; konverti (f).
78. Luksoro; lukso (f).
79. masoro; maso (f).
80. minora; mino (f).
81. mukoro; (*Mucor* el *Mucorales*, *Zygomycetes*); muko (z).
82. nestoro; nesto (f).
83. Pandoro, la mitologia virino; pandoro, la muzika instrumento, nomita laŭ ŝi: pando, la rabobesto.
84. pastoro; pasto (f).
85. piloro; pilo.
86. pletoro; pleto (f).
87. poliporo (*Polyporus* el *Polyporaceae*); polipo.
88. pretoro; preta (f).
89. produktoro; produkti (f).
90. prokuratoro; prokuri (z).
91. prokuroro; same.
92. prospektoro; prospekto.
93. pudoro; pudo (z).
94. reflektoro; reflekti (z).
95. reformatoro; formo (f).
96. refraktoro; refrakti.
97. regulatoro; regulo (f).
98. rekvizitoro; rekvizito (z).
99. repetitoro; peti (f).
100. rotatoro; roto (f).
101. rotoro; same..
102. rumoro; rumo (f).
103. Salvadoro; salvo.



104. saporo (latine *sapor*, itale *sapóre*, france *saveur*, hispane *sabor*, portugale *sabor*); sapo (f).
105. sensora; senso.
106. soforo (*Sophora* el *Fabaceae*); sofo (f).
107. spektatoro; spekti.
108. statoro; stato (f).
109. stuporo; stupo (f).
110. tensoro; tenso.
111. Timoro; timi (f).
112. toporo; topo (marista termino).
113. transformatoro; formo (f).
114. kolektoro; (PIVa, sed laŭ NPIV evitinda); kolekti (f).
115. komputoro (laŭ PIVS, sed laŭ NPIV reference al komputilo); komputi.
116. kursoro; (laŭ PIVS, sed laŭ NPIV reference al montrilo 2); kurso.
117. procesoro; proceso (f).
118. pikadoro; piki (f).
119. –ador/ . Tiun ĉi "sufikson" lanĉis *Eichholz* (EB, 1988, 676), en kies Slipara Vortaro eblas legi: "Teknika sufikso indikanta neaŭtonoman konstrumaŝinon, kiu estas daŭre regata de homo." La inventinto eksplikas: "Mi proponas tiun ĉi novan sufikson, por ke oni povu distingi tiujn 'adorojn' de 'atoroj', do de maŝinoj, kiuj plimalpli aŭtomate funkcias, ekz. levatoro, asfalt-sekigatoro, oleobruligatoro." Nu, NPIV ne adoptis 'adoron', sed jes 'atoron', kiun ĝi – laŭ mi malprave – nomas "sufikso"...
120. kaliforo (*Calliphora* el *Calliphoridae*) troviĝanta en EB (1988), ne transiris en NPIV, eble ĉar la diptero ŝajnis al ĝi tro speciala, kvankam laŭ ni temas pri tre ofta genro de muŝoj; kalifo.

Nun ni provu koncize statistiki nian OR-vortareton laŭ la koncernaj kategorioj. Se ni neglektas la okazojn, kiuj evidente havas nenion komunan kun la latinidaj sufiksoj –ORE, -EUR, -ER (ekz. 6, 15, 48, 51, 57, 83, 106, 120), ni konstatas, ke por iloj (maŝinoj, aparatoj k.s.) restas 38, 40, 47, 49, 56, 58, 59, 66, 69, 70, 73, 74, 75, 76, 77, 79, 94, 96, 97, 100, 101, 108, 112, 113, 114, 115, 117, 119, **t.e. 28 okazoj** (23 %). El ili 40, 49, 58. 59, 66, 74, 97, 100, 113, t.e. **9 okazoj** (7,3 %), estas la -ATORoj.

Por la kategorio de persona aganto servas 1, 2, 5, 16, 18, 22, 24, 25, 26, 27, 31, 33, 34, 35, 36, 39, 41, 46, 52, 53, 67, 71, 82, 84, 88, 89, 90, 95, 107, 118, **t.e. 34 vortoj** (29%).

Jam tiu ĉi fakto malpledas por intenco, rezervi eventualan -OR- sufikson por maŝinoj. Inter niaj 34 vortoj ni trovas same -ATORojn: 24, 26. 39. 90, 107, eĉ -ADORojn: 25, 35, 46, 118.

Por la ceteraj plej diversaj nocioj – ĉu konkretaj, ĉu abstraktaj – restas do pli ol duono da vortoj de ni registritaj.

Memkomprene, mi flankenlasis la vortojn, kiujn ne eblas derivi de Eo-radikoj, do akuzi pro "homonim-danĝero", ekz. profesoro (ĉar ne ekzistas "profeso") aŭ inhibitoro (ĉar ne ekzistas "inhibiti").

**Resume:**

- Ĉu ne estus pli prudente, almenaŭ provizore, el taktika vidpunkto (*Kavka*, 1984), rezigni pri lanĉado de novaj sufiksoj, ekz. -OR, -ATOR, -ADOR, kaj preferi akceptadon de internacie normigitaj, bone kompreneblaj por terminologo kaj nomenklaturisto, terminoj?
- Ĉu Esperanto prave rezignu pri homonim-fobio, konsidere al tiom ofta koincido de radikfinaj-sufiksaj okazoj?

## 15. PUS

Rigardante en la biologia mondo iujn nomojn, kiuj finiĝas per -PUS (*Apus, Bradypus, Dasypus, Dipus, Haematopus, Lagopus, Macropus, Ornithopus, Orycteropus, Phalaropus*), unuavide oni emus konjekti, ke ili gramatike apartenas al la latina dua deklinacio laŭ la modelo *servus*, genitive *servi*. Ho ve, la vero montriĝas esence alia. Temas pri nomoj grekaj, kie la postjungita *-pus*, genitive *-podos*, signifas: piedo. Ĉar la genitiva radiko, ĉu en la latina, ĉu en la greka lingvo, estas nekompareble pli produkltiva ol la radiko nominativa, oni ne miru, ke la famili-nomoj deriviĝas de la genitivo: *Bradypodidae*, *Dasypodidae* k.t.p.

En PIV tute prave registriĝis antipodo, apodo, artropodo, cefalopodo, dekapodo, dipodo, gastropodo, miriapodo, rizopodo, skafopodo, sed bedaŭrinde "bradipo, dazipo, falaropo, lagopo, makropo, ornitopo, orikteropo". Eĉ troviĝis tie "apuso", atestanta, ke la redaktoroj malprave atribuis la vorton al la supre nomita modelo *servus*: anstataŭ *a/pus*, oni analizis ĝin *ap/us*! Tiun ĉi mison provas iom mildigi NPIV: apuso = apodo. Tamen, ĉu – por konservi ioman kontinuecon vortaristan – vere necesis registri la diletante interpretitan "apuson"?

Eble utilos proksimume traduki la PIVajn -podojn:
antipodo ("kontraŭpiedo")
apodo ("senpiedo")
cefalopodo ("kappiedo")
dekapodo ("dekpiedo")
dipodo ("dupiedo")
gastropodo ("ventropiedo")
miriapodo ("dekmilpiedo")
rizopodo ("radikpiedo")
skafopodo ("kavpideo").



Okaze de la ceteraj -podoj, NPIV procedas "pitiece", hezitante rezigni pri "bradipo, dazipo, falaropo, lagopo, makropo, ornitopo kaj orikteropo", kies ĝustaj formoj estas:
bradipodo ("lantpiedo")
dazipodo ("denspiedo")
falaropodo ("brilpiedo)
lagopodo ("leporpiedo")
makropodo ("grandpiedo")
ornitopodo ("birdpiedo")
orikteropodo ("fospiedo").

Nu, kiamaniere NPIV "solvis" la ĝenan nomenklaturan problemon? Al ni sufiĉu unusola ekzemplo, dokumentanta, ke NPIV iom pli ol PIV instruiĝis pri la greka lingvo: makrop(od)o! Elegante, ĉu ne vere? Oni elektu inter makropodo kaj "makropo". Ĉu "makropo" servu por uzo laika, dum "makropodo" por scienca? Tamen oktopodo, kvankam eble plej proksima al laikoj, ne havas sian ekvivalenton, nome "oktopo". Ĉu sole redakta preterlaso? Sed tiaokaze en la vortaro mankus ankaŭ la laikaj "antipo" por kontraŭpiedulo, "gastropo" por la ĝardenheliko k.t.p., k.t.p.

Memkomprene, ĉiuj zoologiaj famili-nomoj devas sekvi la modelojn *Bradypodidae* = bradipodedoj, *Dasypodidae* = dazipodedoj k.t.p. Ja la nomenklatura leksiko de Esperanto konsekvence obeu la internacie kodigitajn principojn. Alie, la zamenhofa **plan**lingvo fariĝus eĉ malpli planeca ol scienca lingvo nature evoluinta.

## 16. UM

Aparta ĉapitro estu dediĉita al la problemo de la radikfina UM, per kiu Esperanto foje klopodas eviti homonimecon. Ni provos demonstri, ke tiaspeca klopodo apenaŭ povas esti taksata kiel bonŝanca,

La latina *UM*, estante finaĵo neŭtra, ne konsistigas radikon. Ekz. en *verbum*, genitive *verbi*, la radikon formas sole tiu *verb*, kiel prave agnoskis la kreinto de Esperanto per la fundamenta vorto **verbo** (ne "verbumo"), komparebla kun la angla kaj rumana *verb*, franca *verbe*, itala *vérbo*, hispana kaj portugala *verbo*. Do, estas simptome, ke inter **fundamentaĵoj** vane ni serĉus ion analogan al "verbumo". Resumo, volumo k.a. ne apartenas al la kategorio, ĉi-loke traktata.

Tamen, okaze de **nefundamentaĵoj**, la situacio impresas esence alia, foje eĉ ŝoka:

"albumo" – kial ne sufiĉus **albo**, sendanĝere homonima kun la blanka pastrovesto? Kp. la germanan pluralon *Alben*, la latinan pluralon *alba*;

"arumo" (*Arum* el *Araceae*) nepre devus fariĝi **aro** el **aracoj** (ne "arumacoj");

"cekumo" (*caecum*) kontrastas kun la zamenhofa **sakro** (*os sacrum*), kiu ne timis la homonimecon kun la fundamenta verbo **sakri**; male, **ceko** bone koherus kun la ĥirurgia termino **cekostomio**, bedaŭrinde mankanta en NPIV;

"datumo" estas vera kuriozaĵo, spitanta la fundamentan **dato**, kiu senriproĉe servus por ajna donitaĵo; Esperanto, laŭ NPIV, "fieras" eĉ pro la tria koneksa termino, nome "dateno", formita laŭ la germana pluralo *Daten*, dum la pluraloj latina kaj angla estas *data*; la lingvo franca kontentigas sin per *données* = donitaĵoj; pli da font-indikaj detaloj havas Pekoteko (1992);

"filtrumo" (*philtrum*): eventuala konfuzo inter la vizaĝa anatomio kaj la verbo filtri apenaŭ okazus, do sufiĉas **filtro**;

"filuno" devas esti **filono**, greke *fylon*, germane *Stamm*; havas nenion komunan kun la greka *fyllon*, latinigita *phyllum* = folio; NPIV kun sia referenco al la greka "*phylum*" perfekte dokumentas sian mankhavan regon de la oldgreka lingvo; konekse kun filono eblas mencii ekz. filogenezo, konekse kun *fyllon* ekz. filoksero; aliflanke filantropo rilatas al la greka *fileo* = mi amas;

"forumo": la latina **forum** havas la radikon *for*, do en Esperanto sufiĉu **foro**, spite al la homonima fundamentaĵo **for**;

"franciumo" en NPIV prave referencas al **francio**;

"galiumo" (*Gallium*) same prave referencas al **galio** 2;

"geumo" (*Geum*) devas esti **geo**;

"harmoniumo": kial **harmonio** ne havu ankaŭ la kvaran signifon, nome tiun de la muzika instrumento?

"heliumo" estas laŭ NPIV zamenhofaĵo, sed *Portman-Rogers* (1993) prave registras nur **helio**;

"hilumo (*hilum*), laŭ *Hradil* (1979) devas esti **hilo**;

"iliumo" aŭ eĉ "iljo" (*os ilium*): ĉi-okaze NPIV tute prave referencas al **ilio**;

"indiumo" (*Indium*), laŭ NPIV zamenhofa, sed prave estas referencate al **indio**;

"kambiumo" (*cambium*) devas esti la fundamenta **kambio**, memkomprene kun ankaŭa signifo botanika;

"krinumo" (*Crinum*) el amarilidacoj, certe devas esti **krino**, apenaŭ konfuzebla kun ĉevalharo;

"kvantumo" estas laŭ NPIV distingenda de la fundamenta **kvanto**, sed ceteraj lingvoj ne sentas tian bezonon: angle *quantum* por ambaŭ nocioj, france *théorie des quanta*, germane *Quantentheorie*, itale *teoria die quanti* k.t.p.

"kuriumo" (*Curium*) fariĝu la zamenhofa **kurio** kun kroma signifo de la ĥemia elemento;



"mediumo": certe sufiĉas **medio** ankaŭ por la nocio spiritisma, same kiel faras aliaj lingvoj, ekz. la germana, kp. ekz. *Krause* (1983): *Medium* = "mediumo", *Phys.* medio;

"maksimumo" estas tre malbonŝanca oficialaĵo, timante la same oficialigitan "**maksimon**", la principon de konduto; kp. la germanan pluralon *Maxima*, la italan *massimo*, la hispanan kaj portugalan *máximo* k.t.p.; kial la sola Esperanto "umu"?

"minimumo", tute sama afero; kial ne sufiĉu **minimo**?

"litrumo" kaj "litrumacoj" por *Lythrum* kaj *Lythraceae* timas la tute sendanĝeran koincidon kun la mezurunuo por likvoj; la planto devas esti **litro** el la greka *lythron* = sangaĵo, la mezurunuo same **litro** el la greka *litra* = pundo;

"optimumo" malkoheras kun optimismo kaj optimisto, do estu **optimo**;

"paliumo" havas en NPIV du tre distancajn signifojn, do ankaŭ la anatomia termino, nome la cerebra kortiko estu nur **palio**, sen timi koincidon kun la lingvo de budhismo…

"planumo" por la plata krani-osto nepre devas fariĝi **plano**;

"premiumo" timas la fundamentan vorton **premio**, kiu senriproĉe povas servi ankaŭ en aferoj asekuraj;

"radiumo" malkoheras kun radioaktiveco, radioterapio k.t.p.; certe la fundamenta **radio** povas signifi ankaŭ la ĥemian elementon;

"referendumo" fariĝu **referendo**; cetere kp. *Waringhien* (1957): referend(um)o…

"rektumo" (*rectum*) estas ja la lasta **rekta** parto de la dika intesto, kial do timi la fundamentan substantivon kun la signifo geometria? Cetere kp. la supran "cekumo";

"serumo" de NPIV prave referencas al **sero**;

"sporotrikumo" (*Sporotrichum*) devas esti **sporotriĥo**;

"sternumo" (*sternum*), jen osto, kiu sternas sin meze de la homa antaŭbrusto, do **sterno**; cetere kp. kun ceko, rekto, sakro;

"stratumo" malkoheras kun stratigrafio, stratosfero k.a., do nepre sufiĉas **strato**, la fundamentaĵo, kapabla servi diversfake;

"taliumo", laŭ NPIV zamenhofa, referencas al **talio** 2, kiu nature koheras kun taliaj kombinaĵoj, kun la italaj *tallio*, *tallico* k.a.

Kaj nun, NPIV-posedanto provu objektive prijuĝi laŭ ĝia leksiko **botanika** (agerato – *Ageratum*, agropiro – *Agropyrum*, akonito – *Aconitum*, aneto – *Anethum* k.t.p., sed: "aliumo" – *Allium*, "arumo" – *Arum*, "geumo" – *Geum*, "krinumo" – *Crinum* k.t.p.).

**ĥemia** (aluminio – *Aluminium*, acido – *Acidum*, albumino – *Albuminum*, arĝento – *Argentum* k.t.p., sed: "heliumo" – *Helium*, "kuriumo" – *Curium*, "radiumo" – *Radium* k.t.p.).

**medicina** (antibiotiko – *Antibioticum*, cerebelo – *Cerebellum*, cerebro – *Cerebrum*, kranio – *Cranium* k.t.p., sed: "cekumo" – *caecum*, "iliumo" – *ilium*, "rektumo" – *rectum*, "sternumo" – *sternum* k.t.p.),

**kiu** el la du lingvoj – nome la latina kaj Esperanto – estas pli facila, ĉar pli regula, sed **kiu** estas pli malfacila, ĉar enigme tro kaprica?

## 17. US

Tute analoge kiel okaze de UM, el terminoloiga-nomeklatura vidpunkto evidente ĝenas, en Eo, iuj nomoj kun la radikfina US. Ree, la ĝeno konsistas en tio, ke la latinaj ekvivalentoj **ne** havas tiun *US* kiel radikparton, sed nur kiel finaĵon, malaperantan en deklinaciaj formoj, derivaĵoj, kunmetaĵoj, dum en Eo temas pri kohera parto de la radiko.

Da koncernaj **fundamentaĵoj** ekzistas kvin:

– fokuso (*focus*); nia Majstro simple klopodis eviti la homonimecon de la optika termino kun **foko** (*Phoca*). Tamen, eventuala konfuzo ne ŝajnas esti probabla, se oni konsideras realajn kuntekstojn zoologian kaj optikan respektive; sendube, tute bone kapablus servi **foko** kiel ekvivalento de la hispana, itala kaj portugala foco; la Eo-terminoj bifoka, hiperfoka k.a. aspektus malpli pezmovaj ol tiuj de *Verks* (1906): "bifokusa, disfokuseco, hiperfokusa, kunfokusa" kaj tiuj de NPIV: "fokusdiseco, enfokusigi, dufokusa";

– konuso (*conus*): tre simila situacio, demonstranta ĝenan malkoherecon kun la terminoj geometriaj, ekz. koniko, konikoido, konoido, konometro, optikaj konoskopo, konoskopio, kun la geologia strukturo koninkona (angle *con-in-cone*) k.t.p., do tute bone sufiĉus **kono**, malgraŭ la homonimeco kun la fundamenta verbo **koni**: ja **konifero** = konojn (t.e. strobilojn) portanto…; finfine oni komparu kun la rumana *con*, la franca *cône*, portugala *cone*, hispana kaj itala *còno*;

– korpuso (*corpus*, genitive *corporis*), en NPIV havas jam du signifojn, kial do ne sufiĉu la fundamenta **korpo** kun la signifoj ceteraj? Se ne ĝenas la polisemio en medicino aŭ geometrio, ĉu ĝenu la militista kaj lingvista?

– moruso (*Morus*) kaj "morusacoj" (*Moraceae*) sendube fariĝus pli bone digesteblaj por botanikisto kiel **moro** kaj **moracoj**; la homonimeco kun la fundamenta **moro** (el la latina *mos*, genitive *moris*) apenaŭ ĝenus, se ekzistas la etimologie parenca embriologia termino **morul-o**, homonima kun mor-ulo;

– poluso (*polus*) alportas ĝenojn analogajn al konuso, nome la malkohercon kun multaj internacie kodigitaj terminoj: polara, polarimetro, polarizi, polarografo, polaroido k.a., do okulon frapas ekz. la difino en NPIV: polara = "havanta nenulan dupoluson aŭ dupolusdenson"; kial uzi por elektro la



verbon "polusigi", sed por lumo "polarizi", se temas pri analogaj fenomenoj? Aliaj lingvoj prave ne distingas: ekz. la angla *polarisation charge*, *current*, *of light*, *plane*, *tube* k.t.p.

– Kiel zamenhofa estas laŭ NPIV ankaŭ krokuso (*Crocus*); ĝia latina nomo devenas de la greka *kroke* = fadeno (t.e. stamino, NPIVe "stameno"), ĉar la "fadenoj" estis uzataj por flave kolorigi; la botanika nomenklaturo uzas la speciajn epitetojn *crocatus* kaj *croceus*; laŭ la itala *cròco*, en Eo bone servus por uzo scienca de pli natura nomo **kroko**, bone kohera kun la mineralnomo **krokoito**, pro la koloro; jen koneksoj atentindaj.

La US-nomoj **nefundamentaj** alportas eĉ pli multajn ĝenojn el la vidpunkto nomenklatura:

"alvuso" (*alvus, alveus, alveolus*) etimologie koheras kun la fundamentaĵoj alveolo, alveolito kaj kun ceteraj terminoj ekz. alveografo, alveolaro, kie ĉie la latina finaĵo *US* forfalas; ankaŭ la botanika speci-epiteto *alveiflorus* (= kavaflora) apartenas tien ĉi, do sufiĉus **alvo**;

"antuso" en NPIV referencas al pipio, kvankam la latina genronomo de paseroformaj birdoj estas *Anthus*, do **anto**;

"apuso" = apodo, vd. la ĉapitron pri PUS;

"arkuso" estas laŭ NPIV prave evitinda, ĉar sufiĉas **arko** 2;

"boluso", france kaj rumane *bol*, itale *bòlo*, devas esti **bolo**, speco de argilo, ja ekzistas **bolecaj** grundoj, sen timi la fundamentan verbon boli;

"ciruso" (*Cirrus*) estiĝis pro timo, ke **ciro**, la nubnomo, povus konfuziĝi kun la homonima fundamentaĵo; al la nomenklaturo de nuboj ni revenos pli sube;

"*citruso*" (*Citrus*) fariĝu **citro**, kvankam homonima kun la muzika instrumento, tamen kohera kun citralo, citrata acido, citrino, citrofeno, citrono k.a. terminoj; cetere ankaŭ NPIV allasas la mallongigon citr/o por uzo ĥemia, dum ni supozas, ke ĝi bone servu ankaŭ en botaniko k.a. fakoj;

"faluso" (*Phallus*) devus esti **faliko**, laŭ la greka *fallikos* = peniso;

"funguso": ankaŭ por medicino devas fariĝi la fundamenta **fungo**, bone kohera kun fungicido, fungistaza k.a. terminoj;

"iduso": la fiŝo *Leuciscus idus* devus esperantiĝi leucisko **ida**;

"Induso" (latine *Indus*, genitive *Indi*, greke *Hindos*): la hinda riverego enfluanta Hindan oceanon, memkoprene estas **Indo**;

"kaluso" (latine *callus, corpus callosum*): en medicino, zoologio, botaniko k.t.p. certe kapablas bone servi la fundamenta **kalo**;

"klonuso": laŭ *Yamazoe* (1995) la angla *clonus* signifas kaj **klono**, kaj "klonuso", el kio rezultas, ke ne estas necese distingi; cetere klono bone koheras kun klonorĥiazo k.a. terminoj;

"kornuso": por la latinaj *Cornus* kaj *Cornaceae* nepre taŭgas **korno** kaj **kornacoj** (ne "kornusacoj"; la homonimeco kun ekz. bova korno apenaŭ ĝenus, male, la "arbusto" NPIVa (science **frutiko**) ricevis sian nomon laŭ la lignodureco, memoriganta pri korno (latine *cornu*);

"koruso" estas fortimiga lingva monstro: eĉ la Ĥ-alergia NPIV referencas al la fundamenta **ĥoro**, tamen registrante la malkoheran derivaĵon "koreografo";

"kumuluso" = **kumulo**, vd. pli sube;

"lokuso" laŭ NPIV termino oratora, laŭ *Waringhien* (1957) geometria, france *lieu*, nepre estas superflua, ĉar plene sufiĉas la fundamenta **loko**; jen citaĵo el Teofrasto: "*cum tractat locos ab Aristotele ante tractatos*";

"lotuso" laŭ NPIV havas kvar signifojn, unue genronomon de planto el fabacoj; ĉar la genitivo de *Lotus* estas *Loti*, devas esti en Eo **loto**, kvankam homonima kun la fundamenta verbo **loti**, kun la patriarĥo **Loto** kaj kun la samnoma rivero en Francio; due planton el nimfeacoj *Nymphaea lotus* = nimfeo lota, trie planton *Nelumbo nucifera*, kvare mitologian frukton, sed por ĉi tiuj du plene taŭgus la nomo **Lotoso**: kp. la germanan *Lotos*, la italan *loto* kaj la saman nomon en multaj aliaj lingvoj krom la franca kaj angla; "maluso", laŭ NPIV el rozacoj, sed laŭ la plej moderna botanika sistemo el **malacoj** (*Malaceae*), nepre ne "malusacoj"; la subfamilio laŭ NPIV estas "malusoideoj"; nu, la botanika speci-epiteto *maliformis* = maloforma, laike pomoforma, do oni ne timu la botanikan genronomon **malo**;

"nevuso" fariĝu **nevo**, ankaŭ dermatologie;

"nimbuso" sekvas en NPIV la nomojn **nimbo**, kiu plene sufiĉas ankaŭ por la nubo, kaj "nimbostratuso"; el tio evidentiĝas la malkohereco en la derivado: kial ne kunmetis NPIV la nomon al "nimbusostratuso"?

"paduso" senhezite fariĝu **pado**, sen timi malprobablan koincidon kun irvojeto; cetere, en la botanika nomenklaturo ekzistas la specia epiteto *padifolius* = padofolia, laŭ simileco de la folioj al tiu de *Prunus padus*;

"panuso" (latine *pannus*, genitive *panni* = tukopeco, distinge de *panis* = pano); sendube, la plej natura esperantigo de la medicina termino estus **panno**;

"papiruso" por la planto *Cyperus papyrus* estas absolute nekohere kun la derivaĵoj papirolog(i)o, do **papiro** bone servu kaj por la specio de cipero, kaj por la papereca materialo, kiun pretigadis la egiptanoj;

"piruso" laŭ NPIV signifu la fruktoarbon el "rozacoj": laŭ la moderna sistemo, *Pyrus communis* = **piro komuna** apartenas al malacoj (*Malaceae*); nepre la fundamenta **piro** signifu ne nur la frukton sed ankaŭ la koncernan arbon; cetere NPIV mem registras la nomon **terpiro**, kiel tuberan helianton, do la planton, ne la frukton;



"prunuso" laŭ NPIV signifu la fruktoarbon, ree el "rozacoj"; laŭ ni temas pri amigdalacoj (*Amygdalaceae*); nepre la fundamenta **pruno** signifu ne nur la frukton, sed ankaŭ la koncernan arbon *Spiraea prunifolia* = spireo **prunofolia**, ne "prunusofolia";

"Reguluso" laŭ NPIV estas la ĉefstelo en la konstelacio de Leono, dum **Regulo** laŭ la sama vortaro estas vira nomo; kial tiu ĉi senbaza distingo, se la latina originalo ambaŭ-okaze samas: *Regulus*, genitive *Reguli*? Konsekvence ankaŭ la stelo nomiĝu **Regulo**; krome ankaŭ la birdo *Regulus* nomiĝu **regulo**, ne "regolo" (kp. la ĉapitron 11);

"rubuso" el rozacoj (ĉi tie la famili-nomo estas prava) trankvile homonimu kun la fundamenta **rubo**, ĉar la latina genronomo *Rubus* devenas de la adjektivo *ruber* = ruĝa, tute same kiel *Rubia*, konata pro la ruĝa tinkturo;

"Siriuso" demonstras apenaŭ kompreneblan timon, ke en iu reala kunteksto oni povus konfuzi la stelon kun la ŝtato **Sirio**;

"stiluso" estu **stilo** (greke *stylos*, latine *stilus*, signifanta stangon, skribilon k.a.); la fundamenta vorto nepre sufiĉas ankaŭ por la stangetforma parto de floro, kiel cetere dokumentas la forme kaj etimologie koheraj NPIVaĵoj: **stileto**, **stilito**, **stilobato** (ĉu la redakcio ne timis baton per stangeto?);

"stratuso" = **strato**, samkiel la urba strato, ankaŭ la ĉiela strato estas kvazaŭ sternita; nome, la latina supino *stratum* apartenas al la verbo *sternare* = sterni; do oni ne timu la homonimecon, sed male aprezu la elvokivecon de la nomoj;

"taksuso": la latina *Taxus* koheras kun la helena verbo *tasso* = mi ordigas, ĉar la pinglofoliaj vicoj estas orde aranĝitaj; jen la kohereco kun la latina verbo *taxare* kaj kun la fundamenta verbo **taksi**; NPIV, anstataŭ bonvenigi la etimologian konekson, timas la homonimecon, rifuĝante al la misformado per la nominativa finaĵo US, kvankam etnolingvoj tion ne faras: ĉeĥe kaj slovake *tis*, hispane *tejo*, hungare *tiszafa*, itale *tasso* (konforme al la greka verbo), kroate, serbe kaj slovene *tisa*, pole *cis*, rumane *tisă*, ruse *tiss*; plue, la ĝusta familia nomo taksacoj (*Taxaceae*) en la "planlingva" vortarego transformiĝas per "taksusacoj"; ĉu do, spite al la kodigita nomenklaturo de la organika ĥemio, estu "taksusolo" anstataŭ la ĝusta **taksolo**?

"taluso": NPIV ne timis la homonimecon de la tarsa osto (*talus*) kun la vegeta korpo (*thallus*), nature lasante por ambaŭ la nomon **talo**, sed jes timis la homonimecon de tiuj ĉi kun la termino inĝeniera;

"Taŭruso" (latine *Taurus*, genitive *Tauri*, itale *Tàuro*) sen ajna dubo estu **Taŭro**;

"tinuso": la latinaj nomoj genra estas *Thunnus* (familia *Thunnidae*, ne *Scombridae* laŭ NPIV), la specia *thynnus*; en la jaro 2001 ni demonstris, ke en neniu el la etnolingvaj ekvivalentoj troviĝas la nominativa finaĵo US kiel

la radikparto; samloke ni proponis, ke la genronomo en Esperanto estu **tunno**, kaj la specia epiteto **tinno**;

"traktuso" devas esti **trakto**, kaj medicine, kaj alifake;

"tribunuso" estu **tribuno**, la fundamentaĵo, ne nur por la podio, sed ankaŭ por la romia oficisto aŭ oficiro; cetere, la fundamenta vorto bone koheras kun la oficialaĵo **tribunalo**;

"viruso": la fundamenta **viro** senhezite signifu ankaŭ la subĉelan organismon, kiu estas la objekto de la scienco virologio (ne "virusologio" laŭ NPIV); ja la sama vortaro registras la koncernan malsanon **virozo**, bedaŭre kun la referenco al "virusozo"; neregistritaj fare de NPIV estas **viroido**, **virogena**, **virostatika** k.a.;

Laŭ la promeso pli supra, nun ni resumu la nomenklaturon de nuboj, kiu ja konsistigas la US-problemon. Laŭvice ni listigu unualoke la nomon latinan, dualoke ties simbolon, trialoke nian Eo-nomon kaj lastaloke la NPIVaĵon:

– Alte situantaj nuboj: (proksimume supermare 5 – 13 km):
*Cirrus*, *Ci*, ciro, "ciruso"
*Cirrocumulus*, *Cc*, cirokumulo, neregistrita en NPIV
*Cirrostratus*, *Cs*, cirostrato, neregistrita en NPIV

– Mezalte ŝvebanta nubo (proksimume 2 – 7 km supermare):
*Altocumulus*, *Ac*, altokumulo, neregistrita en NPIV

– Malalte ŝvebantaj nuboj (ĝis 2 km)
*Stratocumulus*, *Sc*, stratokumulo, neregistrita en NPIV
*Stratus*, *St*, strato, "stratuso"

– Vertikalaj nuboj (pluretaĝaj):
*Altostratus*, *As*, altostrato, neregistrita en NPIV
*Nimbostratus*, *Ns*, nimbostrato, "nimbostratuso", registr. ĉe stratuso
*Cumulus*, *Cu*, kumulo, "kumuluso"
*Cumulonimbus*, *Cn*, kumulonimbo, "kumulonimbuso", registr. ĉe stratuso.

Trarigardante la "sistemon" de NPIV, ni konstatas, ke la radikparto US neniam aperas meze de la kunmetitaj nomoj: ne eblas ekz. "nimbusostratuso", do fakte ne temas pri kunmetaĵo, sed pri unusola radiko; same okaze de "kumulonimbuso" temas pri unusola radiko, dum pli sistema estus la kunmetaĵo "kumulusonimbuso"... Dio scias, de kie NPIV ĉerpas sian inspiron por la scienca leksiko de Esperanto...

Fermante la US-probleman ĉapitron kaj samtempe la tutan konsideron pri la homonimoj en Esperanto, ni konfesu, ke ne ĉiam ni kapablis diveni realan motivadon de NPIV. Ekz. ĉu ne ŝajnas esti plene absurda la procedo de ĝiaj kompilintoj okaze de *Cyperus papyrus*: cipero, sed ne "ciperuso", "papiruso", sed ne papiro. Se oni nepre timus homonimecon kun cip-ero, kial oni ne elektis la konsekvencan "ciperuso"? "Papiruson" ni jes komprenas, ĉar oni timis homonimecon kun pap-iro...



## Bibliografio


*Albault A.* (1995): La du ĉefaj grafemo-fonemikaj sonoj. – La stato kaj estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto, 155-191. – Prelegkolekto de la unua simpozio de la Akademio de Esperanto, kiu okazis en Prago 1994-07-07/14. *KAVA-PECH, Dobřichovice.*

*Blanke D.*, red. (1979): Esperanto. La internacia Lingvo – sciencaj aspektoj, 237 p. – Kulturligo de GDR, Centra Laborrondo Esperanta, *Berlin.*

*Blanke D.* (1979): Kelkaj problemoj de la vortfarado de la germana lingvo kaj de Esperanto. – samloke, 116-134.

*Blanke D.* (1985): *Internationale Plansprachen. Eine Einführung.* 408 p. *Akademie-Verlag, Berlin.*

*Brzeziński W.A.* (1990): Strukturo de nomo en biologiaj sciencoj. – Akademiaj Studoj, 322-330. *Esperanto-Press, Bailieboro.*

*Cumberlidge N., Sachs R.* (1997): Ĉu vi estas *Homo sapiens* aŭ *Antropo regnotipa*? – Sci. Rev., 9-18. *Niederglatt.*

*Eichholz R.* (1988). Esperanta Bildvortaro. 880 p. – *Esperanto-Press, Bailieboro.*

*Eichholz R.* (1992): Per-komputora termino-kolekto (Pekoteko). Vol. I-III, 1816 p. – *Esperanto-Press, Bailieboro.*

*Gilbert W.* (1962): Planlingvaj problemoj. 100 p. – Stafeto, Beletraj kajeroj 12. *J. Régulo, La Laguna.*

*Golden B.* (1990): Ganao, Ganeo aŭ Gano? – Akademiaj Studoj, 119, *Esperanto-Press, Bailieboro.*

*Grosjean-Maupin E.* (1947): Plena Vortaro de Esperanto kun Suplemento. 511+63 p. – Sennacieca Asocio Tutmonda, *Paris.*

*Haferkorn R.* (1962): *Technisches Wörterbuch Deutsch-Esperanto.* 85 p. – *Esperanto-Press, Cardiff.*

*Høeg T.A.* (1988): *Mineralnavn* (norvega, esperanta, angla). – *Universitetsbibliotekets hustrykkeri, Oslo. Skrifter: 15. 264 p.*

*Høeg T.A.* (1989): Geologia Vortaro (esperanta kaj norvega-esperanta), 117 p. – *Universitetsbibliotekets hustrykkeri, Oslo. Skrifter: 18.*

*Hradil J.* (1979): Esperanta Medicina Terminaro. – 63+10 p. Universala Medicina Esperanto-Asocio.

*Kalocsay K., Waringhien G.* (1980): Plena Analiza Gramatiko de Esperanto. 599 p. – Universala Esperanto-Asocio, *Rotterdam.*

*Kavka J., Mlynář F.* (1982): Botanika Vortaro de *F. Mlynář*. – Sci. Rev., 69-86. Pizo.

*Kavka J., Pumpr T.* (1972): Poŝatlaso de la Mondo. Kontribue al geografia nomenklaturo en Esperanto. – Sci. Rev., 3-27. *Beograd.*

*Kavka J.* (1977): Esperantigo de la ĉeĥoslovakaj loknomoj. – Sci. Rev., 119-128. Ĉapeko.

*Kavka J.* (1980): La fonemo Ĥ kaj ties transformoj en la internacia scienca leksikologio. – Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko, Kolekto de la seminariaj referaĵoj, 93-100. *Ústí nad Labem.*

*Kavka J.* (1980): Laŭsistema vortaro de la rokaĵmineraloj. – Sci. Rev., 59-92. Pizo.

*Kavka J.* (1981): Onomastiko en fakterminoj konsidere ilian esperantiĝon. – Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko, Kolekto de la referaĵoj de la konferenco, 1, 6-14. *Žilina.*

*Kavka J.* (1982): Ĉu "likeno" aŭ "liĥeno"? – Sci. Rev., 98-99. Pizo.

*Kavka J.* (1983): *Lingua latina versus* Esperanto. – Starto, 1, 7-8. *Praha.*

*Kavka J.* (1983): Pli morta ol latina? – Monato, 5, 24. Brasschaat.

*Kavka J.* (1984): Kioma ŝanco por Esperanto-afiksoj en scienca terminologio? – Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko, Kolekto de referaĵoj el la internacia seminario, 140-151. Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Scienca-Teĥnika Sekcio, Brno.

*Kavka J.* (1985): Iom da nomenklatura medito: $OsO_4$. – Starto, 1, 12. *Praha.*

*Kavka J.* (1986): Pri nove proponataj afiksoj el la vidpunkto taktika. – Sci. Rev., 43-49. Pizo.

*Kavka J.* (1987): Esperantlingva nomenklaturo de la fungogenro rusulo. – Sci. Rev., 21-31. Pizo.

*Kavka J.* (1990): Proceso. – Starto, 6, 26-27. Praha.

*Kavka J.* (1993): Asimilado de propraj nomoj – natura proceso en Esperanto. – Starto, 4, 13-15. *Brno*

*Kavka J.* (1996): Kontribue al PIV. Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature. 32 p. – *Kava-Pech, Dobřichovice.*

*Kavka J.* (1997): Vortaristoj procedu pli kritike. – Esperanto, 5, 89, *Rotterdam.*

*Kavka J.* (1997): Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature 11. – Starto, 3, 15-19. *Brno.*

*Kavka J.* (1997): Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenkalture 12. – Starto, 4, 16-21. *Brno.*

*Kavka J.* (1997): Ĥ en mineralnomoj. – Sci. Rev., 44–51. *Eschwege.*

*Kavka J.* (1998): Averto antaŭ danĝeraj terminoj. – Starto, 2, 5– 6, *Brno.*

*Kavka J.* (1999): Kial "procezo"? – La Gazeto, 82, 8. *Creuë.*

*Kavka J.* (1999): Natursciencaj terminoj en PIV (statistika sondo pri ties ĝusteco). - Prelegaro KAEST (1998), 85-91. *Kava-Pech, Dobřichovice.*

*Kavka J.* (2000): Baza premiso por la scienca leksiko de Esperanto. – Sci. Rev., 39-43. *Eschwege.*

*Kavka J.* (2001): Pledo por ĥolesterolo. – La Gazeto, 92, 18. *Creuë.*

*Kavka J.* (2001): Esperantigo de germanaj nomoj, precipe por la bezono naturhistoria. – Sci. Rev., 3-16. *Eschwege.*



*Kavka J.* (2001): Morfologio de fungoj. - Prelegaro KAEST (2000), 113-122, *Kava-Pech. Dobřichovice.*

*Kavka J.* (2001): Tunno tinno. – Sci. Rev., 51-52, *Eschwege.*

*Kavka J.* (2001): Somere lumegas la liĥnidoj. – Starto, 3, 92. *Brno.*

*Kavka J.* (2001): Sciencaj mineral-nomoj en Esperanto. – Inter Ni (ĉiumonata gazeteto por esperantistoj en *Halifax-Dartmouth, Upper Rawdon* kaj aliloke en Nov-Skotio). N-ro 186, 3. *Halifax.*

*Kavka J.* (2002): La grekdevena EI. Pri diskurso. – Sci. Rev., 48. *Eschwege.*

*Kavka J.* (2002): Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature 13. – Starto 1, 9-12. *Brno.*

*Kavka J.* (2002): Defio por UEA. Ĉu Esperanto havos science fidindan vortaron? – Esperanto 106. *Rotterdam.*

*Kavka J.* (2002): Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature 14. – Starto, 2, 41-44. *Brno.*

*Kavka J.* (2002): Pli da koherego en la scienca leksiko. – Sci. Rev., 141-144. *Eschwege.*

*Kavka J.* (2002): La Nova PIV (SAT 2002). – Starto, 3, 74/75. *Brno.*

*Kavka J.* (2002): Kvankam belaspekta, tamen plorinda! Kial? – Sci. Rev., 215-216. *Eschwege.*

*Kavka J.* (2003): Scienca Vortaro de Esperanto (akompane al la nova PIV). – Sci. Rev., 1-56. *Eschwege.*

*Kavka J.* (2003): *Claudius et Chloris.* – Sci. Rev., 105. *Eschwege.*

*Kavka J.* (2003): Ne "kortekso", sed kortiko. – La Gazeto, 2, 7. *Creuë.*

*Kavka J.* (2003): (Mal)planlingveco de la scienca leksiko en Esperanto. – Sci. Rev., 187-190. *Eschwege.*

*Kavka J.* (2004): Pseŭdoteorio pri (ne)analizebleco de vortoj en Esperanto. – Sci. Rev., 147-149. *Eschwege.*

*Kleczek J.* (1961): *Astronomical Dictionary – Astronomiĉeskij slovarj – Astronomisches Wörterbuch – Dictionnaire Astronomique – Dizzionario Astronomico – Astronomický slovník. 972 p. – Nakl. Čsl. Akad. Věd. Praha*

*Krause E.-D.* (1983): *Wörterbuch Deutsch-Esperanto.* 596 p. *VEB Verlag Enzyklopädie Leipzig.*

*Mészáros B., Støp-Bowitz C.* (1987): Enkonduko en la biologion. – Fokuso, 4, 8-30. Esperanto-Centro. *Budapest.*

*Modrijan F.* (?): Elementoj latinaj en Esperanto. 47 p. – Esperanto-Klubo. *Ljubljana.*

*Pabst B.* (1989): Inversa Vortaro de Esperanto. 91 p. – Esperanto-Centro. Paderborno.

*Perko K.* (1989). Rimarkoj pri la esperantigo de germanaj onomastikaĵoj. – Sci. Rev., 33-36. *Niederglatt.*

*Pióro J.* (1980): Kemia nomenklaturo Internacia. – Propra eldono. Varŝavo.

*Portmann D., Rogers D.* (1993): Kemia kaj Scienc-teknika Vortaro. Esperanta – Angla – Germana. 297 p. – *Naperville*.

*Sachs R.* (1996): Zoologia nomenklaturo, medicina terminaro kaj Internacia Lingvo. – Sci. Rev., 14-26. *Niederglatt*.

*Sachs R.* (2001). Biocenozo kaj zoonozoj. – Sci. Rev., 11-12. *Eschwege*.

*Sachs R.* (2003): Sanoaspektoj dum vojaĝoj en forajn landojn. – Scienca Revuo, 149-161. *Eschwege*.

*Sachs R.* (2004): Iom da parazitologio. – Sci. Rev., 205-213. *Eschwege*.

*Simon K.-H., Ullrich I.* (2000). Spertoj sur la vojo al terminologia prilaborado de la forstfaka lingvo. – Sci. Rev., 32-41. *Eschwege*.

*Seldan C.A. ten* (1950): Klopodo pri starigo de sistemo de kvazaŭ-afiksoj en Esperanto. – Esperantologio, 215-227. *Einar Munksgaard. Copenhagen.*

*Støp-Bowitz C.* (1995): Pri zoologia kaj botanika nomenklaturo. – Sci. Rev., 38-39. *Niederglatt*.

*Suonuuti H.* (1998): Terminologia gvidilo. 38 p. – Universala Esperanto-Asocio. *Rotterdam*.

*Szerdahelyi I.* (1976). Skizo pri morfemiko en Esperanto. – Sciencaj Komunikaĵoj, 11-24. Aldono al Budapeŝta Informilo.

*Verks K.* (1906): Elementa fotografa optiko. 79 p. – Presa Esperantista Societo. *Paris*.

*Waringhien G.* (1957): *Grand Dictionnaire Espéranto-Français*. 367 p. – *Librairie Central Espérantiste. Paris.*

*Westermayer M.* (1981): *Internationales Chemie-Wörterbuch – Internacia Kemio-Vortaro – International Chemical Dictionary.* 100+75+75+71 p. – *Selbstverlag. Tübingen.*

*Wiener F.I.* (1950). Ŝajnprefiksoj. – Esperantologio, 144-151. – *Einar Munksgaard, Copenhagen.*

*Yamazoe S.* (2001): Angla-Esperanta Medicina Vortaro. 720 p. – UMEA *Shinoda*-Kuracejo. *Kraków*.

*Zillmann U., Mutschmann F.* (2000). Kompendio de la plej gravaj parazitoj ĉe malgrandaj kaj laboratoriaj bestoj. – Sci. Rev., Faka kromkajero. *Eschwege*.

---------------------

**Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto** (1970). 1300 p. – Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris*.

**Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, Suplemento** (1987): 45 p. – Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris*.


**La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto** (2002). 1264 p. – Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris*.

**Poŝatlaso de la Mondo en Esperanto** (1971). 55 p. – *Kartografie. Praha.*

**Dankesprimo**

Aparta danko estas ŝuldata al la kompilinto de Inversa Vortaro, *Bernhard Pabst* (1989). Sen tiu ĉi verko apenaŭ estus realigebla la serĉado de paradigmaj vort-okazoj, bazitaj sur fontlingva (plejparte latina) radikfino. Ja mi limigis min al koincidado kun iuj Esperanto-sufiks(oid)oj. Tamen, la ĉefa danko apartenu al la prezidanto de ISAE, prof. d-ro *Rüdiger Sachs*, pro ĉiuj laboroj ligitaj kun la aperigo en Scienca Revuo.

Prago, januaro 2009



*Josef Kavka*

*Lužná 7 – Vokovice*
*CZ – 160 00 Praha 6*
Ĉeĥio

Doktoro pri natursciencoj,
kandidato de teĥnikaj sciencoj,
profesia petrologo,
interesata de nomenklaturo,
ties etimologio kaj semantiko.